

IL POPOLO CINIO

中國報道

7 1988



Kamparana familio

La vilaĝo Ŝiĝjaĝuang de Anĉiŭ-gubernio, Ŝandong-provinco, estas tipa nordĉinia vilaĝeto. Nove konstruitaj du-etaĝaj domoj staras unu apud alia ĉe kampoj. La strato de la vilaĝo estas ombrata de arboj. Sur ĉiu pordo de korto kaj ekranmuro malantaŭe estas algluitaj ruĝaj paperpecoj kun versparoj kaj granda ideogramo "Feliĉo" respektive. La tuta vilaĝo aspektas bonorda, pura kaj vigla.

En la vilaĝo loĝas 240 familioj, kiuj kamplaboras de generacio al generacio. Ili riĉigas sian vivon per diligenta laboro. En la lastaj jaroj, kvankam ĉiuj familioj konstruis novajn domojn kaj aĉetis televidilon kaj aliajn luksajn objektojn, tamen ili ankoraŭ estas diligentaj en laboro kaj simplaj en vivo.

Kamparana familio






Brodantaj maljunulinoj



Pordo de korto kun loka gusto



Post rikolto



Parto de la vilaĝo

ENHAVO

SUR LA KOVRILO:

Gong Li, ĉefrolulino de la filmo
"Ruĝaj Sorgoj"

VIVO DE ORDINARAJ ĈINOJ:

Kampanara familio

Fotoj de **LIŬ SIGONG**

Taj'ŭan-insulo, perlo en maro

Teksto de **ŜEN AJMIN**

SUR LA DORSKOVRILO:

[ĈINAJ POŜTMARKOJ] Pejzaĝoj de
Taj'ŭan

- 2 Grava paŝo en demokratiigo
- 5 Pli da produktaĵoj por la popola vivo
- 7 Kiel Ĉinio traĥtas la industrian polucion?
- 50 VOJAĜO LAŬ JANGZI-RIVERO (19): Vojaĝo al la regionoj
ĉe Hanŝuj-rivero
- 17 Sincera espero de ĉinaj famuloj
- 19 Roterdamo bonvenigas vin!
- 20 Kontrolo de lingva unueco
- 21 SUR NIA LIBROBRETO: Laŭtema vortaro kompletigita
- 24 ESP-NOVAĴOJ
- 23 POR KOMENCANTOJ: Ombro kaj homo; Aglo; Fosaĵo
- 26 Superkonduktivo feliĉigos la homaron
- 29 Doktorino Ni Jiŝin
- 37 Jang Ŭenŝuj kaj lia ostomedolita hospitalo
- 40 ĈINA MEDICINO: Pri ĉinaj medicinaĵoj (I)
- 43 Sportoj populariĝas en Ŝunde-gubernio
- 46 Esotera disĉiplo (Novelo)
- 57 ĈINA LITERATURO:
Poetoj en la meza periodo de Tang-dinastio
Poemoj el la meza periodo de Tang-dinastio
- 62 Mondfamo el "sorgokampo"
- 31 ĈINAJ ARTOJ: Brokatoj de Ĉinio
- 12 Teraj kasteloj en Fuĝjan
- 65 ENCIKLOPEDIETO DE ĈINIO: Antikva eduk-sistemo de
Ĉinio — ŝu'jŭan-o
- 45 Antikva ĉina Rubik-kubo — Liŭtong
- 9 ĈINAJ MOROJ: Matenaj manĝetoj en Kantono
- 67 PLADOJ KAJ LEGENDOJ: Helluna bongusta koko
- 10 KURANTAJ AFEROJ
- 68 INTER NI: Por plibonigi "El Popola Ĉinio"
- 23 42 KORESPONDI DEZIRAS
- 25 Lokoj menciitaj en ĉi tiu numero

JARABONTARIFO			Britio	£	8.00	Japanio	Yen	3000	Svisio	SF	25.00
Aŭstralio	\$A	15.00	Finnlando	Fmk	64.00	Jugoslavio	Din.	1500	Usono	US\$	12.00
Aŭstrio	Sch	200	Francio	FF	90.00	Nederlando	Gld.	34.00	Kanado	Can\$	14.00
Belgio	BF	550	Hispanio	Ptas	1200	Nov-Zelando	NZ\$	20.00			
FR Germanio	DM	30.00	Italio	Lit	18000	Portugalia	Esc	1100			
Por aliaj landoj en Eŭropo: £ 8.00 US\$ 10.00 Por aliaj landoj en Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko: £ 5.00 US\$ 6.50											

Grava paŝo en demokratiigo

Ĉe la manifestiĝo de la unuapaŝaj efikoj de la ĉirkaŭdek-jara reformado de ekonomio, nun en la tagordon eniris politika reformado, kies komencon signis la 13-a Tutlanda Kongreso de la Komunista Partio de Ĉinio en la lasta oktobro.

En la 1-a Sesio de la 7-a Tutlanda Popola Kongreso okazinta en Pekino de la 25-a de marto ĝis la 13-a de aprilo de la

kuranta jaro, kun partopreno de 2 900 reprezentantoj, montriĝis senprecedenca entuziasmo, kio signis novan gravan paŝon en reformado de la politika sistemo kun perfektigo de la socialisma demokratio kiel centro.

EFEKTIVE ĈIU DONIS SIAN VOĈON

Ĉinaj kaj alilandaj raportistoj vizitintaj la kongreson jam raportis multe pri ĝia varma etoso.

Unu el ili diris, ke ĉi-jare demokratio altiĝis kiel leviganta kurzo. Lia vorto spegulis, ke oni efektive sentis la malsamecon inter la ĉi-foja kongreso kaj la antaŭaj.

Ma Ŝitu, verkisto kaj reprezentanto el Siĉŭan-provinco, estis profunde impresita: "Mi estas reprezentanto ekde la Unua Tutlanda Popola Kongreso. Je la komenco de la ĉi-foja kongreso mi pensis, ke ĝi estos tia, kiaj la

Rezolucio aprobita




antaŭaj. Aŭskulti la raporton pri la registara laboro, kiu sendube estas ĉioamplaksa kaj perfekta, doni taŭgajn sed senefikajn vortojn, serioze levi mian manon en voĉdonado — jen ĉio, kion mi devos fari. Sed la kunvenoj en la lastaj tagoj vere surprizis min. La reprezentantoj havas fortan konscion partopreni en politikaj aferoj kaj estas pli viglaj en politika diskuto. Oni trovas sin en tute nova medio.”

La kongreso estis laŭdata de ĉiuj pro tio, ke unue, en la elektado de ĝia Konstanta Komitato la nombro de la kandidatoj kaj tiu de la elektotoj ne estas egalaj, kio rezultigis, ke 9 kandidatoj ne estis elektitaj, dum en la elektado en la antaŭaj kongresoj la egalnombro inter kandidatoj kaj elektotoj garantiis, ke ĉiuj kandidatoj estis elektitaj; kaj due, senprecedence viglis la novaĵraportado. Televido, radio kaj ĵurnaloj ĉiutage detale raportis pri la kongreso, oni ne plu aŭdis stereotipajn laŭdojn; malsamaj kaj kontraŭaj opinioj aperis sur ĵurnaloj.

La plej okulfrapa dum la kongreso estis la elektado de la 7 specialaj komisionoj sub la Konstanta Komitato de la Popola Kongreso en la 28-a de marto. Neniam antaŭe oni vidis tian varman situacion. Pluraj reprezentantoj surloke elmetis siajn opiniojn kontraŭ kandidatoj. En la balotado pri la komisionoj estis neaj kaj sindetenaj voĉoj.

En la elektadoj la plej granda disputo estis pri historiisto sinjoro Ĝou Guĉeng, kandidato por la prezidanto de la Komisiono de Eduko, Scienco, Kulturo kaj Publika Sano. Hŭang Ŝunŝing, reprezentanto el Taj’ŭan-provinco, montris, ke la 89-jara Ĝou Guĉeng estas tro maljuna por tiu grava posteno. Kvankam sinjoro Ĝou estis elektita en la sekva balotado kun 8 kontraŭaj kaj 69 sindetenaj voĉoj, la



S-ro Hŭang Ŝunŝing donas opinion en la kunveno.

reprezentantoj tamen varme manklakis por la malkaŝema parolado de Hŭang, ĉar en la pasinteco neniu publike donis opinion kontraŭ kandidatoj en popola kongreso.

Poste la 65-jara Hŭang Ŝunŝing diris: “Niaj kadroj devas esti junaj. Ankaŭ en la popola kongreso oni esperas tion.” Li aldonis, ke en la Tutlanda Popola Kongreso reprezentantoj estas permesataj doni malsamajn opiniojn, kio markas rimarkindan progreson de nia politika vivo.

RAJTOJ DE LEĜDONO KAJ INSPEKTO

La ĉi-foja kongreso laŭ sia tagordo devis sankcii “Proponon por Amendo de la Konstitucio de la Ĉina Popola Respubliko” kaj proponitajn tekstojn de du leĝoj, la raporton pri la registara laboro kaj aliajn 5 rezoluciojn.

En kontrolo de ili la reprezentantoj formetis la malnovan metodon de voĉdonado per

manlevo. Anstataŭe ili serioze uzis siajn rajtojn donitajn de la leĝoj, proponis reviziojn pri ĉiuj proponitaj tekstoj. Rezulte, oni akceptis kelkajn aldonojn kaj reviziojn. Al la raporto pri la registara laboro oni faris pli ol 100 reviziojn, antaŭ ol ĝi estis aprobata.

Cetere, multaj kritikis la registaron koncerne ĝiajn laborojn en la lastaj 5 jaroj kaj la problemojn ekzistantajn en la socio, kiel tiuj de prezoj, eduko, salajro de mensaj laboruloj, publika sekureco, agrikultura produktado kaj aliaj.

Laŭ Gaŭ Ĵunhŭa, reprezentantino el Ŝanhajo, apenaŭ konvinka estas la aserto en la raporto pri la registara laboro, ke la prezoj altiĝis je 7.3 % en 1987. La cifero, ŝi diris, ne kongruas kun tio, kion oni sentas en la merkato. Ne estas science statistiki prezojn per adicio de ĉiutagaj necesajoj kaj ordinaraĵoj industriaj produktoj, ĉar tia statistiko ne povas objekte speguli la fluktuon de la elspezo por vivo. Ĝu Ĝjabi, reprezentanto



Diskuto

el Ĝjangsu-provinco, pluapase montris, ke rilate la prezleviĝon, la raporto tuŝis nur kelkajn varojn, sed fakte estas kelkcent, kaj ke la registaro devas respondi por la neregebla situacio tiuflanke.

Ji Tiĝen, reprezentantino el Hubej-provinco, plendis, ke la registaro ne sufiĉe atentis la edukon aferon. Ŝi diris, ke nun mankas favoraj kondiĉoj por establi lernejojn, instruistoj ne estas bone kulturitaj kaj la aranĝo de lernejoj kaj la ekzamena sistemo ne estas raciaj. La registaro devas atenti edukon, precipe la elementan edukon, kaj investi pli multe por eduko. U Jongŝi, reprezentanto el Tjanĝin, alvokis, ke oni pliigu salajron al mensaj laboruloj. Li diris, ke nun vicprofesoro kun multjara sperto de instruado enspezas proksimume tiom, kiom juna novico. Tia ekstreme malracia situacio devas esti ŝanĝita, alie la evoluo de eduko, scienco, tekniko kaj aliaj kulturaj aferoj estos malhelpata.

Multaj reprezentantoj krome kritikis koncernajn departementojn de la registaro pro la brulegoj de arbaroj, kolizioj de vagonaroj, dronoj de ŝipoj kaj aviadilaj akcidentoj sinsekve okazintaj en la lastaj jaroj kaj pro la koruptiĝo de

ŝtatoficistoj. Ĉen Dengke, reprezentanto el Anhuj-provinco, opiniis, ke grandaj sinsekvaj akcidentoj vidigis seriozajn problemojn en administrado, kaj por tio ankaŭ gvidantoj en la Ŝtata Konsilantaro devas porti respondecon. Reprezentanto el Ĝuangdong-provinco montris, ke koruptiĝo de ŝtatoficistoj influas la publikan moralon. Iu kadro, li diris, postulis aŭtomobilon "Benz" anstataŭ monsumon por kompenso pagendan de alilanda komercisto al Ĉinio. Alia kadro, li aldonis, vojaĝonte eksterlanden por enketi pri bredado de laktobovinoj, postulis, ke la gastiganta lando inkludu lian elspezon en la prezojn de la laktobovinoj vendotaj al Ĉinio. Li petis, ke la registaro alprenu efikajn rimedojn por forigi tian fenomenon.

REPREZANTANTOJ DE LA POPOLO

La reprezentantoj de la antaŭaj 6 kongresoj estis elektitaj tiamaniere, ke la kandidatoj kaj la elektotoj estis egalnombraj, sed ĉifoje la kandidatoj kaj la elektotoj ne estis egalnombraj. La meznombra aĝo de la nunaj reprezentantoj estas malpli alta ol tiu en la antaŭa kongreso. Plejparto de ili estas malpli-ol-60-jara. Sed ilia

plej granda aparteco estas, ke ili havas pli fortan konscion partopreni en politikaj aferoj kaj pli altan entuziasmon en politika diskuto.

Ljaŭ Jaŭĝu, reprezentantino el Hongkong, la unua sin detenis en la baloto pri la specialaj komisionoj. "Mi ne konas la kandidatojn, kiel mi povus aprobi ilin?" ŝi diris. "Mi estas reprezentanto elektita de Hongkong-anoj, tial mi havas devon por ili. Aprobi kandidatojn, kiujn mi tute ne konas, signifas mankon de devokonscio por miaj elektintoj."

En la baloto pri la Komisiono pri Aferoj de Elmigrantaj Ĉinoj, Gu Ŝjüanhuj, reprezentanto el Hejlongĝiang-provinco, montris en sia parolo, ke la membroj de la komisiono devas koni la staton de elmigrantaj ĉinoj aŭ posedi sperton en tiuflankaj laboroj. La proponitaj kandidatoj, laŭ li, ne estas kontentigaj. Li aldonis, ke en la regionoj de Hongkong kaj Aŭmen estas multaj ĉinoj, kaj ili havas intimajn rilatojn kun elmigrantaj ĉinoj, sed estas domaĝe, ke en la komisiono mankas reprezentantoj el tiuj regionoj.

La 57-jara Dŭan Cungang el Ŝanŝji-provinco estas labor-modelo. Ŝi estas malnova reprezentanto, kiu partoprenis en ĉiuj 7 kongresoj. Ŝi rememoris, ke ŝi venis al Pekino en 1954 kaj voĉdonis por ŝtata prezidanto en la 1-a Tutlanda Popola Kongreso. Tiam ŝi tamen ne bone komprenis la signifon de la elektado. En la ĉifoja kongreso ŝi vidis, ke la donantoj de neaj kaj sindetenaj voĉoj alte levas sian manon, tiam ŝi sentis, ke reprezentanto ne nur ĝuas honoron, sed ankaŭ havas sian devon.

Ĝeneral-dire, plejparto de la reprezentantoj estis kontenta pri la kongreso. Iuj tamen opiniis, ke restas longa vojo por iri, ĝis la tutlanda kongreso ne portos la moknomon "kaŭĉuka sigelilo", metaforo de senfika aŭtoritato.

Pli da produktaĵoj por la popola vivo

— Pri la reformo de la nacidefenda industrio de Ĉinio

La motorcikloj “Ĝjaling”, koloraj televidiloj “Ŝanhajo” kaj fridujoj “Bajjun” estas bonvenaj al multaj ĉinaj konsumantoj kaj trovas debiton en la merkato. Tamen la fabrikoj de tiuj produktaĵoj estas militindustriaj entreprenoj produktantaj aviadilojn kaj kanonojn.

Depost 1979, kun ŝanĝiĝo de la internacia situacio, Ĉinio komencis koncentri sian forton sur disvolvon de la nacia ekonomio, malgrandiĝis la produktado de ĉinaj militaj varoj, kaj multaj militindustriaj entreprenoj troviĝis en stagnado aŭ duon-stagna produktado. En tiu cirkonstanco, la ŝtato postulis, ke la militindustriaj entreprenoj multe produktu civilajn produktaĵojn, precipe longtempe uzeblajn konsumaĵojn por kontentigi la bezonon de la popolanoj, plenumante la taskon produkti militajn produktaĵojn. Dank’ al tiu reformo la nacidefenda industrio suriris la vojon de milita kaj civila produktado en kombino.

La Ĝjaling-a Maŝinfabriko de Ĉongĉing estis militindustria entrepreno produktanta armilojn. En 1980, plejparto de ĝia produkta forto estis ne utiligata kaj ĝi malprofitis serioze pro malmulta produkta tasko. Poste ĝi sukcese provfaris motorciklon kun marko “Ĝjaling”, tiam debitan varon sur merkato, kaj poste organizis transregionan ekonomian kombinaton kun granda produktopovo. En 1984 ĝi

produktis 200 000 motorciklojn kaj fariĝis la plej granda motorcikloprodukta centro. Ankaŭ aliaj militindustriaj entreprenoj komencis produkti varojn urĝe bezonatajn de la socio kaj liveris teknikojn kaj instalaĵojn al ekonomiaj branĉoj de energio, trafiko kaj konstruaj materialoj.


En la komenca periodo, iuj militindustriaj entreprenoj pro manko de sperto ne sciis kiel disvolvi sian superecon por produkti civilajn varojn. La Kemiindustria Maŝinfabriko de Ĉinghaj estas militindustria entrepreno kun historio de ĉ. 20 jaroj. Pro la reguligo de la nacia ekonomio, la produktovaloro de ĝiaj militaj produktaĵoj grand-skale reduktiĝis en la pasintaj

kelkaj jaroj. Kvankam ĝi produktis plurspecajn civilajn varojn, tamen ĝi malsukcesis pro neutiligo de sia teknika supereco. Spertinte la malsukceson la fabriko decidis produkti civilajn eksplodajn instrumentojn kaj materialojn, utiligante sian teknikan superecon. Tio ne nur ŝtopis la breĉon de civilaj eksplodaj produktaĵoj en la nordokcidenta regiono de Ĉinio, sed ankaŭ malfermis merkaton por ĝiaj produktaĵoj. Nun la fabriko jam fariĝis grava bazo por produkti civilajn eksplodajn produktaĵojn en la nordokcidenta Ĉinio.

Post kelkjara praktiko, plejmulto de la militindustriaj entreprenoj, kiel la Kemiindustria Maŝinfabriko de Ĉinghaj, produktas civilajn varojn, plene

Aŭtomuntejo de la Ĉang’an-a Maŝinfabriko





Motorcikla produktolinio de la Ĝjaling-a Maŝinfabrika

utiligante siajn avantaĝojn, por servi al la gravaj konstruoj de la ŝtato, al teknika reformo de la nacia ekonomio kaj al la popola vivo. Ili metas sian ĉefan forton sur ekspluatadon de novaj produktaĵoj kaj teknikkompaktaj produktaĵoj.

Dum la periodo de la Sesa Kvinjara Plano (1981-1985), laŭ la postulo de la ŝtato, la nacidefenda industrio reguligis la strukturon de produktaĵoj, energie ekspluatis civilajn nukleajn teknikojn, sin preparis al konstruado de nuklea elektrejo, prove produktis novtipajn civilajn aŭtojn, aviadilojn, satelitojn k.a. La civila produktado iom post iom disvolviĝis al tiu de altgradaj, precizaj kaj avangardaj teknikompaktaj produktaĵoj kaj tiu pogranda. En 1985 la civilaj produktaĵoj de pli ol 170 specoj de la ĉinaj nacidefendaj industriaj departementoj estis enlistigitaj en la ŝtatan planon, konstruiĝis pli ol 400 novaj produktolinioj por la ĉefaj civilaj produktaĵoj. La produktovaloro de la civilaj produktaĵoj de la aviada, astronautika, armila kaj nuklea ministerioj konsistigis 10% de la totala produktovaloro en 1979 kaj 40% de tiu en 1985. Proksimume 30 000 militaj teknikoj de elektroniko, lasero, ultraruĝo, telemetrio, telegvido,

telesenso k.a. estas vaste uzataj en la agrikultura, malpezindustria, tekstila, kemiindustria, konstrumateriala, petrola, medicina, karba, geologia kaj oceana fakoj. La Astronautik-industria Ministerio produktis varmotuban varmotransigilon, aplikante temperaturo-regan teknikon de satelito. Ĝi estas vaste uzata en metalurgia, tekstila kaj aliaj industrioj, tio ŝparis grandan kvanton da energio. Aplikante tiun instalaĵon, la Ferŝtala Fabrika de Anŝan levis utiligadon de la fornoj, kaj unu forno povas ĉiujare ŝpari brulaĵon de 700 000 jŭanoj (trioblo de la kosto por varmotuba instalaĵo). La Aviada Ministerio aplikas dilatmalvarmigan teknikon de gasturbino de aviadilo al olekampo por repreni naturan gason, tio kreas produktovaloron de 100 milionoj da jŭanoj ĉiujare por la ŝtato. La Nukle-industria Ministerio aplikas nukleomaterial-ekstraktan teknikon en produktado de eritromicino, rezulte de tio ĝia teknologio atingis internacie avangardan nivelon.

Por pli bone ludi sian rolon, la nacidefendaj industriaj entreprenoj iom post iom faris horizontalan ekonomian unuiĝon kaj komunan produktadon de civilaj varoj. Rompinte la limigojn inter

departementoj kaj posedsistemoj, ili organizis dekojn da ekonomiaj kombinaĵoj de motorciklo, fridujo, elektra ventumilo, ŝarg-aŭto, malpeza aŭto, mikroaŭto, fotilo k.a. Tio ne nur rapidigis produktadon, sed ankaŭ akcelis disvolviĝon de granda nombro da lokaj kaj urbataj industriaj entreprenoj. Nun, pli ol 4 000 specoj de civilaj produktaĵoj de militindustriaj entreprenoj eniris en merkaton, interalie 3 000 novaj specoj de civilaj produktaĵoj, kiaj aerflua ŝpinmaŝino, friduja kompresoro kaj mikroaŭta motoro, iom post iom anstataŭis la importitajn samspecajn produktaĵojn.

En la tempo, kiam la ĉina militindustrio servas al la enlanda ekonomia konstruado, ĝi senĉese disvolvas internacian kunlaboron en ekonomio kaj tekniko, iuj ĝiaj produktaĵoj iom post iom eniris la internacian merkaton. La transportaj raketoj "Ĉangĝeng" n-roj 2 kaj 3 produktitaj de Ĉinio jam akceptis taskon lanĉi sateliton por aliaj landoj. Ĉinaj aviadilaj fabrikoj jam produktis ĉ. cent specojn da aviadilaj maŝinpecoj por pli ol dek landoj kun avangarda aviada tekniko, kiaj Usono, Britio kaj Francio. Iuj monde famaj internaciaj aviadilaj kompanioj, kiaj Boeing kaj McDonnell-Douglas, havas kontrakton kun ĉinaj aviadaj entreprenoj pri laŭkontrakta produktado. La unua grandtipa pasaĝera aviadilo MD-82 produktita de Ĉinio kaj Usono jam komencis flugi en julio 1987. La pluruzaj malpezaj civilaj aviadiloj produktitaj de Ĉinio estis eksportitaj al la regionoj de Suda Azio kaj Sudorienta Azio. Stabile leviĝas la eksporta kvanto de precizaj instrumentoj, mezuriloj kaj aliaj 200 specoj de maŝinaj kaj elektraj produktaĵoj. Laŭ unuapaŝa statistiko, en 1987 la eksportitaj civilaj produktaĵoj de la nacidefendaj industriaj entreprenoj jam atingis pli ol 100 milionojn da usonaj dolaroj. ■

Kiel Ĉinio traktas la industrian polucion?

Printempe de 1974 kamparanoj en la ĉirkaŭurbo de Tjanĝin uzis poluciitan akvon de Ĝjijun-rivero por irigacii kampojn, kio damaĝis pli ol 3 000 hektarojn da tritikaj kampoj, el kiuj 2 000 hektaroj ne donis rikolton. La kamparanoj suferis seriozan perdon. La okazaĵo vekis grandan atenton ĉe la instanco. Post unu-jara traktado pliboniĝis la akvo de la rivero kaj revenis la fiŝoj, kiuj antaŭe malaperis pro la polucio.

Kun la disvolviĝo de ekonomio kaj kresko de la loĝantaro, Ĉinio kiel multaj landoj alfrontas seriozan problemon de media polucio kaj ekologia detruo. La industria polucio estas la ĉefa kaŭzo de media problemo.

De la komenca periodo de la 50-aj jaroj ĝis tiu de la 70-aj jaroj la ekonomia konstruado de Ĉinio bone disvolviĝis, malgraŭ ke ĝi suferis iujn malsukcesojn. En la 20 jaroj la totala industria produktovaloro de Ĉinio kreskis 5.9-oble. La industria disvolviĝo kaŭzis seriozan polucion. En la pasinteco, emfazante transformadon de konsumaj urboj en produktajn urbojn, oni plenenergie disvolvis industrion en multaj urboj, eĉ konstruis nombron da industriaj entreprenoj kaŭzantaj seriozan polucion en politikaj, kulturaj kaj turismaj urboj, kiaj Pekino, Hangĝou, Suĝou kaj Ŝĵian. Tio malordigis la urbo-

dispozicion kaj serioze poluciiis la medion.


En la komenca periodo de la 70-aj jaroj la malboniĝo de la media kvalito komencis veki la atenton de diversaj socitavoloj. Post kiam la Konferenco de UN pri Homa Medio okazis en Stokholmo en 1972, Ĉinio okazigis la Unuan Tutlandan Mediprotektan Konferencon en 1973 kaj prezentis fundamentajn principojn kaj ĉefajn politikojn pri media protekto.


Post la konferenco Ĉinio faris enketojn pri ĉefaj poluciitaj

regionoj kaj akiris certajn sukcesojn. La provincoj, aŭtonomaj regionoj, grandaj kaj mezgrandaj urboj, ĉefaj industriaj departementoj de Ĉinio fondis sian mediprotektan institucion, aplikis mediprotektajn rimedojn kaj certgrade preventis kaj forigis polucion. Sed la media polucio kaj ekologia detruo ne estis malhelpitaj ĉefe pro limigita investo.

En la 80-aj jaroj, fronte al la granda premforto kaŭzita de la ekonomia disvolviĝo kaj loĝantara kresko al la medio, Ĉinio ellaboris principon samtempe

La Tangŝan-a Cementa Fabriko bone traktas polucion kaj protektas la medion.





La Dua Traktejo de Malpura Akvo de la Nankina Ole-rafinejo

disvolvi la ekonomian konstruadon, urban kaj kamparan konstruadon kaj median konstruadon, kun media protekto kiel

En la Ĝenerala Petrol-kemia Fabriko de Jŭejang, Hunan-provinco



fundamenta nacia politiko.

En tiu periodo la mediprotekta afero de Ĉinio disvolviĝas plej rapide. Kvankam la totala industria produktovaloro de Ĉinio en 1985 pliiĝis je 65% kompare kun tiu en 1980, tamen la industriaj ellasitaĵoj, anstataŭ kreski, malpliiĝis ĉiujare je 10%, ke la media kvalito de Ĉinio restis kiel en 1980.

De la fino de la 70-aj jaroj Ĉinio aplikis serion da rimedoj por forigi la industriajn poluciojn. Ĝi postulis, ke oni traktu gravajn poluciajn fontojn en limigita tempo. En 1981 kaj 1982 oni translokis pli ol 10 000 entreprenojn serioze poluciajn en urboj aŭ turismaj lokoj, kombinante teknikan reformon kaj industriajn ordigon. Samtempe kun tio la ŝtato ĉesis produkti benzenan heksakloridon, dikloro-difeniltrikloroetanon kaj aliajn malutilajn insekticidojn.

La ŝtato postulis, ke la fabrikoj, kies tekniko kaj instalaĵoj estas malnovaj kaj kies produktado serioze polucias la medion, apliku avangardan teknikon, renovigu la postĝintajn teknologiojn kaj instalaĵojn kaj solvu la problemon

de polucio. La Anŝan-a Ferŝtala Kompanio en nordorienta Ĉinio estas la plej granda en Ĉinio. Ĝi fondiĝis en la 30-aj jaroj kaj ĝiaj tro malnovaj instalaĵoj kaŭzis tre seriozan median polucion. En la fino de la 70-aj jaroj, surbaze de siaj financo, materialoj kaj laborantoj, la kompanio prenis rimedojn por redukti la ellasan kvanton de skorio kaj eluzitaj gaso kaj akvo kiel gravan parton de la teknika reformo kaj komencis sintezan utiligon de energi-fonto kaj materialoj. Tio rikoltis bonan efikon. En nur kelkaj jaroj la medio de ĝiaj fabrikoj multe pliboniĝis kaj ankaŭ la produktado multe disvolviĝis. La produktovaloro de la sinteza utiligo surbaze de media protekto atingis pli ol 40 milionojn da jŭanoj ĉiujare kaj la profito 14 milionojn da jŭanoj.

Por ne kreskigi novajn poluciajn fontojn, la ŝtato plifortigis la median administradon de la nove konstruataj entreprenoj kaj difinis, ke la kontraŭpoluciaj instalaĵoj de ĉiuj entreprenoj nove aŭ denove konstruataj devas esti projektitaj, konstruataj kaj ekfunkciintaj samtempe kun iliaj ĉefkonstruoj. Laŭ difinoj la ŝtato ne agnoskos la kvalifikitecon de domoj de entreprenoj, kies mediprotektaj instalaĵoj ne kompletigis aŭ ne atingis la postulatajn normojn, kaj ne permesos al ili funkcii; la ŝtato punos tiujn entreprenojn kiuj mem ekfunkcias sen la ŝtata sankcio. En la lastaj jaroj la diversaj konstruoj bone observis la difinojn.

“Sinteze utiligi kaj ŝanĝi malutilon en utilon” estas alia grava principo de Ĉinio por preventi kaj forigi la industriajn poluciojn. La ŝtato kuraĝigas ĉiujn entreprenojn sinteze utiligi industriajn ellasitaĵojn kaj plene utiligi energi-fonton kaj materialojn por forigi polucion kaj protekti la medion. Dank’ al tio la entreprenoj ne nur altigis la ekonomian efikon, sed ankaŭ

multe reduktis la industriajn ellasitaĵojn. La Fabriko de Fosfora Sterko sub la Nankina Kemiindustria Kompanio reduktis la produktokoston ĉiujare je proksimume du milionoj da ĵuanoj, utiligante skorion, eluzitan gason kaj superfluan varmon, kaj plibonigis la medion. Antaŭe la fabriko ĉiujare plantis arbidojn, sed ili ĉiuj velkis. Nun ĉiujare grandiĝas ĝia verdigita areo. Antaŭe la ellasita gaso korodis la instalaĵojn kaj malbonigis la sanon de la oficistoj kaj laboristoj. Nun ne plu estas tiaj fenomenoj.

En la lastaj jaroj Ĉinio donis grandan atenton al la novaj teknikoj kaj teknologioj senpoluciaj kaj malmulte poluciaj kaj akiris grandajn sukcesojn. Ekz., Ĉinio eksperimentis pri akvo-karba miksaĵo kaj disvastigis ĝian brulan teknikon. La miksaĵo konsistas el karbo (70%), akvo (ĉ. 30%) kaj malmulte da aldonaĵoj. Post nebuligo ĝia brul-procento povas atingi 92-97%. Tiu tekniko povas ne nur altigi la valoron de utiligo de karbo kaj redukti transportajn procezon kaj koston, sed ankaŭ redukti la industriajn polucion. Nun Ĉinio esploras kaj disvastigas multajn novajn malmulte poluciajn teknikojn en kemia, malpeza, metalurgia kaj konstrua industrioj.

Por efike protekti la medion, la ŝtato difinis, ke la importataj tekniko kaj instalaĵoj devas esti senpoluciaj aŭ malmulte poluciaj, kaj konformaj mediprotektaj instalaĵoj devas esti samtempe importataj.

En la lastaj jaroj la disvolviĝo de ekonomio, kresko de la loĝantaro kaj altiĝo de la konsumo nivelo pliseriozigis la median polucion kaj ekologian detruon. Estas pli maltrankvilige, ke la disvolviĝo de urbataj entreprenoj etendas la median polucion al la kamparo. Ĉinio devas fari ankoraŭ longtempan klopodon en la mediprotekta laboro por akiri kontentigan rezulton. ■

ĈINAJ MOROJ

Matenaj manĝetoj en Kantono

La kantonaj loĝantoj havas matenajn manĝetojn kun loka koloro. Ĉu en hejmo kaj restoracio ĉu en te-trinkejo, oni kutimas havi kruĉon da infuzita teo kaj te-trinkante prenas speciale preparitajn matenajn manĝetojn.

En te-trinkejo, servisto puŝmovas inter la tabloj pluretaĝan ĉareton, en kiu metiĝas teleroj kun diversaj manĝetoj.

Bonaj restoracioj havas abundon da manĝetoj. La manĝetoj de multaj restoracioj superas 20 specojn. Kiam la ĉareto venos al vi kaj atendos vian laŭplaĉan elekton, vi elkore admiros la abundecon, delikatecon kaj bonguston de manĝetoj. Iuj ordinaraj manĝaĵoj tie fariĝas bongustaĵoj. Ekzemple, post fritado kolokasioj fariĝas orkoloraj, bonodoraj, fragilaj kaj apetitovekaj. Ĉar ili estas etkvantaj, kantonaj loĝantoj nomas ilin "malgrandaj manĝetoj". Alia manĝeto estas "kolbasa rizfarunaĵo": En oblonga telero metiĝas rektaj vaporantaj rizfarunaj strioj, inter kiuj estas vianda farĉo kiel ruĝa agato. Ili kvante estas pli multaj kaj la farado pli komplika ol tiu de la "malgrandaj manĝetoj", la lokanoj nomas ilin "mezaj manĝetoj". En Kantono kokaj flugiloj kaj piedoj estas plej ŝatataj, la lokanoj nomas ilin "feniksaj piedoj" kaj "feniksaj piedoj".

Post speciala preparado, la ordinaraj kokaj piedoj fariĝas grandaj kaj diafanaj, la haŭto fariĝas maldika, grasa kaj bongusta. Ĝentilaj klientoj gustumas ilin malrapide, kaj la frandemuloj manĝas per la du manoj. Ĉar la manĝaĵoj havas specialan guston, ili ĝuas altan prestiĝon de "specialaj manĝetoj". ■

Te-trinkejo en Kantono





Jang Ŝangkun, Ĝaŭ Zijang, Ulanhu, Li Ŝjannjan, Ŭan Li, Deng Ŝjaŭping, Peng Ĝen kaj Li Peng (de maldekstre) dum la Unua Sesio de la Sepa Tutlanda Popola Kongreso

LA SEPA TUTLANDA POPOLA KONGRESO KAJ LA SEPA ĈINA POPOLA POLITIKA INTERKONSILIĜA KONFERENCO OKAZIGITAJ

La unua kunveno de la Sepa Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio kaj la Sepa Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco estis okazigitaj respektive de la 25-a de marto ĝis la 13-a de aprilo kaj de la 24-a de marto ĝis la 10-a de aprilo en Pekino.

La unuan kunvenon de la kongreso ĉeestis 2 970 reprezentantoj, kiuj, post plena demokratia diskutado, aprobis 9 rezoluciojn kaj decidojn kaj 2 leĝojn, inkluzive de la "Raporto pri la Laboro de la Registaro" farita de la aganta ĉefministro Li Peng en la nomo de la Ŝtata Konsilantaro, kaj sankciis la naciekonomian planon kaj socidisvolvan planon de 1988.

La kongreso estis nova sesio, ĝi elektis novajn ŝtatajn gvidantojn: Jang Ŝangkun estas prezidanto de la ŝtato, Ŭan Li — prezidanto de la Konstanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso, Deng Ŝjaŭping — prezidanto de la Centra Milita Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko. Li Peng estas nomumita ĉefministro de la Ŝtata Konsilantaro.

La unua kunveno de la Sepa Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco sukcesis en demokratia kaj solidareca atmosfero. Ĝiaj 1915 membroj el diversaj naciecoj libere esprimis sian opinion pri gravaj problemoj de la nacia ekonomio kaj popolaj vivrimedoj. La kunveno principe aprobis la politikan rezolucion kaj la raporton pri la pli ol 1 700 proponoj rilataj al la ekonomia konstruado, edukado, scienco kaj tekniko, kulturo, higieno k.a. prezentitaj de la komitatanoj.

La konferenco elektis Li Ŝjannjan kiel prezidanton de la Sepa Ĉina Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.

DUOBLIĜIS LA ĈINA FINANCA ENSPEZO EN 5 JAROJ

La enlanda financa enspezo de Ĉinio estis 108.4 miliardoj da jŭanoj en 1982, kaj tiu en 1987 atingis pli ol 224 miliardojn. En la sama periodo la ŝtata eksterbudĝeta monsumo kreskis de 80.3 al 193 miliardoj da jŭanoj. En 1987 la eksterbudĝeta kaj budĝeta monsumoj de Ĉinio entute estis pli ol 417 miliardoj da jŭanoj.

PLI OL 10 000 URBETOJ DE ĈINIO

La ekonomia disvolviĝo antaŭen-

puŝis la disvolviĝon de la malgrandaj urbetoj kaj mezaj kaj malgrandaj urboj de Ĉinio. En la pasintaj 10 jaroj la ĉinaj urbetoj pliiĝis je 8 927 kaj la mezaj kaj malgrandaj urboj je 188. Ĝis nun, Ĉinio jam starigis registarojn de 11 103 urbetoj kaj 381 urboj.

ĈINIO SENĈESE EKSPORTAS SIAJN TEKNIKOJN

Ĉinaj teknikoj jam estas eksportitaj al pli ol 20 landoj kaj regionoj, kiaj Usono, Japanio, Francio kaj FR Germanio. La valoro de eksportitaj teknikoj en 1987 atingis 155 milionojn da usonaj dolaroj. Inter la eksportitaj teknikoj estas maturaj industriaj teknikoj, teknikaj servoj, ĉinaj tradiciaj teknikoj, kaj ankaŭ altgradaj teknikoj avangardaj en la mondo.

ĈINIO, LA SESA EN LA MONDA ŜIPEKSPORTADO

Dank' al la pordomalferra politiko, teknika enkonduko kaj ŝipeksporto, prosperas la ĉina ŝipkonstruado. De 1980 ĝis 1987 la Ĝenerala Ŝipkonstrua Kompanio de Ĉinio eksportis entute pli ol 170 ŝipojn kun totala kapacito de 1 900 000 toneloj, el ili la plej granda estis 118 000-tonela.

KRESKOS KOMERCO INTER ĈINIO KAJ SOVETUNIO KAJ ALIAJ LANDOJ

Ĉina ministro de ekstera ekonomio kaj komerco Ĝeng Tūobin diris antaŭ nelonge, ke ni rapide disvolvos komercon inter Ĉinio kaj Sovetunio kaj orienteŭropaj landoj. Antaŭ ĉio, ni pligrandigos la proporcion de loka komerco en la totala komerco de tiuj landoj. Li deklaris, ke ĉiuj provincoj, aŭtonomaj regionoj, municipoj kaj la eksterkomerce privilegiaj urboj povas fari ekonomiajn kaj komercajn aktivadojn kun la Korea Demokratia Popola Respubliko, Mongolio, Sovetunio kaj orienteŭropaj landoj en diversaj formoj, kiaj varointerŝanĝa negoco, kunlabora entreprenado, kunlabora produktado kaj labor-eksperto, aŭ en aliaj novaj formoj.

URBA SUBTERA FERVOJ-KONSTRUADO EN ĈINIO

Nun en Pekino estas subtera fervojo 39.7 km. longa kaj tiu en Tjanĝin longas je 7.4 kilometroj. Por mildigi la urban trafikon de tage 14-milionaj pasaĝer-fojoj, Ŝanhajo komencis konstrui sud-nordan, orient-okcidentan kaj rondiran subterajn fervojojn. La totala longeco de la konstruotaj subteraj fervojoj de Kantono estos 43.15 km. En la venontaj jaroj Pekino konstruos unu rondiran kaj 7 unuopajn subterajn fervojojn, post plenumiĝo de tiuj fervojoj Pekino havos interkruciĝan kaj radiantan subteran trafikatan reton.

1 265 PERSONOJ DOKTORIĜIS EN ĈINIO

Su Ĉun (la tria de maldekstre), unu el la doktoroj elkulturitaj de Ĉinio mem, direktas esplor-studentojn.



Dum la kvin jaroj de 1983 ĝis la fino de 1987 Ĉinio mem kulturis 1 265 doktorojn, 88 el ili estas doktorinoj. La nombro jam superis tiun de la personoj revenintaj de eksterlande, finintaj sian doktoran lernadon en la sama periodo. Tio montris, ke Ĉinio kulturigas altrangajn fakulojn ĉefe enlande.

JANG ŬENJI ROMPIIS LA MONDAN REKORDON DE LA VIRINA 50-METRA LIBERA NAĜO.

En la 3-a Azia Ĉampionea Naĝkonkurso okazinta aprile, en la finalo de la virina 50-metra libera naĝo 16-jara ĉina sportistino Jang Ŭenji rompita per 24''98 la mondan rekordon de 25''28 kreitan de rumana sportistino.

99 MALGRANDAJ PLANEDOJ TROVITAJ DE ĈINIO RICEVIS INTERNACIAN AGNOSKON

La 99 malgrandaj planedoj ĝis nun trovitaj de Ziĝinŝan-observatorio de Nankino jam ricevis internaciajn eternajn numerojn kaj nomrajton.

La nomita observatorio komencis observi kaj esplori malgrandajn planedojn kaj kometojn en 1949. La nombro de la malgrandaj planedoj trovitaj de Ziĝinŝan-observatorio kaj enlistigitaj en eternajn numerojn okupas la kvinan lokon inter la 62 observatorioj samperiole en la mondo. Krome, ankaŭ la tri novaj kometoj trovitaj de tiu observatorio ricevis internacie oficialan nomon de la mondo.


LA FILMO "LA LASTA IMPERIESTRO" GAJNIS 9 ORAJN MEDALOJN

La filmo "La Lasta Imperiestro" kune farita de Ĉinio, Italio kaj Britio gajnis 9 Oskarojn de la plej bonaj filmo, reĝisoro, akustiko, fotado, muntado, muziko, vestado, scenara adaptado kaj arta projektado en la 60-a Oskaro-disdona Soleno antaŭ nelonge okazinta. La ĉina juna muzikisto Su Cong estas la unua ĉino, kiu gajnis Oskaron.

GENERO-ADORA SURROKA BILDO TROVITA EN ŜINGĜJANG

Antaŭ nelonge arkeologoj trovis grandan surrokgravuritan bildon, kiu prezentas generoadoron de la posta periodo de primitiva socio en la profunda Tjanŝan-montaro de Ŝingĝjang. La gravuraĵo entenas centojn da homfiguroj starantaj aŭ kuŝantaj, vestitaj aŭ nudaj, en malsamaj grandecoj kaj malsamaj pozoj. La plej grandaj figuroj estas pli grandaj ol veraj homoj kaj la malgrandaj nur pli ol dek cm. altaj. Ĉe nemalmultaj viraj figuroj klare montriĝas la genera organo. La virinaj figuroj kun larĝa brusto, gracia talio, grasa postaĵo, preskaŭ ĉiuj estas nudaj. Sube de la bildo staras vico da malgrandaj homfiguroj, kio montras la deziron kaj postulon de tiamaj homoj pri generado.

Primitiva surroka bildo pri generoadoro trovita en Ŝingĝjang



Teraj kasteloj en Fuĝjan

Inter la apikaj montoj en la gubernioj Jongding kaj Nanĝing en la suda parto de Fuĝjan-provinco, Ĉinio sin kaŝas antikvaj konstruaĵoj kvadrataj, rondaj, ovalaj kaj brakseĝo-formaj. Dikaj estas iliaj muroj el tero, kalko kaj sablo kaj armitaj per bambuo kaj ligno. Tian konstruaĵon oni nomas tera kastelo.

Tiuj kasteloj plejparte estis konstruitaj antaŭ pli ol 200 jaroj. Laŭ esploro de fakuloj, oni konstruis tian kastelon pro malfacila trafiko, kiu malhelpis al ili akiri necesajn konstruajn materialojn. Tiaj kasteloj estis kune starigitaj de dekoj da familioj. Ili konstruis meze de baseno el adhera argilo apud vojo. Tiaj kasteloj estis facile defendeblaj kontraŭ rabo, la materialoj malkaraj, la muroj humidimunaj kaj varmotenaj. Malgraŭ multfojaj tertremoj, la kasteloj restas sendifektaj.

La plej impona el la teraj kasteloj estas alta ronda kastelo. Rigardante de supre, oni povas vidi kastelojn el pluraj cirkloj inter verdaj montoj kaj riveroj. Ĝenerale, tia kastelo konsistas el du aŭ tri cirkloj pli kaj pli altaj de interne eksteren. La plej ekstera cirklo altas pli ol 10 metrojn. Centre de la kastelo estas kultejo por prapatroj, kio montras la loĝmanieron de tiaj popolaj loĝejoj.

La plej granda ronda kastelo en la gubernio Jongding estas la kastelo Ĉengĉji. Ĝia konstruado daŭris tri jarojn en la regperiodo de imperiestro Kangŝji (1662-1722 sur trono) de Ĉing-dinastio. La kultejon por prapatroj ĉirkaŭas tri cirkloj da loĝdomoj. La plej ekstera cirklo havas 73 metrojn en la diametro kaj konsistas el kvar etaĝoj kun totala alto de 11.4 metroj, ĉiu kun 72 ĉambroj. La dua cirklo havas du etaĝojn, ĉiu kun 40 ĉambroj. La tria cirklo unuetaĝa havas 32 ĉambrojn. La 400 ĉambroj de la kastelo kovras plankareon de 5 000 kvadrataj metroj. En la kastelo estas du profundaj putoj por la bezono de la tuta kastelo. Tie iam vivis 80 familioj kun pli ol 600 homoj. La tera kastelo estas enlistigita de la Ŝtata Administracio de Historiaj Restaĵoj de Ĉinio en la "Vortaron de Ĉinaj Vidindaĵoj".

La kultejo por prapatroj estis destinita por kultado kaj amuzado de la loĝantoj de la kastelo. La granda kaj formo de la kultejo por prapatroj estas tre diversaj. La kultejo en Ĉengĉji-kastelo estas ronda ekstere kaj okangula interne. Fronte de la kultejo estas placeto kaj ambaŭflanke de ĝi staras portikoj. La plej delikata estas Ĝenĉeng-kastelo. En la kastelo estas ĝardeno, lernejo kaj legejo. La kultejo por prapatroj

prenas formon de scenejo. Antaŭ la scenejo staras kvar kolonoj kaj ambaŭflanke 30 ĉambroj en du etaĝoj ligitaj kun la scenejo formis cirklon. La portikoj havas gisitajn balustradojn. La loĝantoj povis rigardi teatraĵon en la portikoj kaj sur la placeto antaŭ la scenejo.


La plej granda kvadrata tera kastelo estas Jiĝing-kastelo, kiu okupas pli ol 10 000 kvadratajn metrojn. La lokanoj nomas tian kastelon kvarangula kastelo. La kvin etaĝoj kun alto de ĉ. 16 metroj entenas 100 ĉambrojn. La kastelo havas ŝtuparojn en siaj kvar flankoj interligitaj per koridoroj. La ĉirkaŭmuroj estas dikaj baze kaj pli kaj pli maldikiĝas supre. La vasteco ĉe la supro de muro estas sufiĉe granda por festeno.

Brakseĝa Kastelo nomiĝas pro sia formo simila al antikva brakseĝo. La suda domaro estas unu- aŭ du-etaĝa, la orienta kaj okcidenta domaroj du- aŭ tri-etaĝaj, simile al la brakoj de la seĝo, kaj la norda domaro estas tri- aŭ kvar-etaĝa, simile al la apogilo de la seĝo. Pro niveldiferencoj, la pli ol 50 ĉambroj en tia kastelo estas sufiĉe sunumataj kaj aerumataj.

Arkitektoj opinias, ke la tera

(Daŭrigo sur p.66)

Ĝenĉeng-kastelo







Interne de Ĉengĉji-kastelo

Loĝantoj de kastelo






Teraj kasteloj en Jongding-gubernio



La fronta pordo de Ĉengĉji-kastelo



Dua etaĝo de kastelo uzata kiel gren-tenejo



Familio en kastelo

Kastelaj loĝantoj en festado



Sincera espero de ĉinaj famuloj

“Propagandu Esperanton, alte taksu ĝian aplikon en diversaj kampoj kaj uzu ĝin en la reala vivo.” Jen sincera espero de ĉinaj famuloj en la kunveno de la societo “Amikoj de Esperanto”.

La kunveno okazis la 3-an de aprilo en Pekino. Ĝin partoprenis pli ol 70 personoj inkl. de iuj

membroj de la Unua Sesio de la 7-a Tutlanda Popola Kongreso de la Ĉina Popola Respubliko (ĈPR) kaj de la 7-a Ĉina Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco, membroj de la societo “Amikoj de Esperanto” en Pekino kaj aliaj samideanoj. Nun la societo havas 137 membrojn, el

kiuj 41 estas membroj de la Tutlanda Popola Kongreso de ĈPR kaj de la Ĉina Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco.

Chun-Chan Yeh, fama ĉina verkisto prezidis la kunvenon. Vicprezidanto de la Sesa Kon-

Ĉu Tunan (la tria de dekstre) parolas en la kunveno.





Kunvenejo

stanta Komitato de la Tutlanda Popola Kongreso de ĈPR kaj la prezidanto de la societo "Amikoj de Esperanto" Ĉu Tunan parolis en la kunveno. Li diris: "En la ses jaroj de post sia fondiĝo, la societo "Amikoj de Esperanto", kiel organizaĵo por aŭspicio de Esperanto, ludis pozitivan rolon en la disvastigo de Esperanto en Ĉinio kaj konigo de ĝi al diversaj socitavoloj. Nia societo estis atentata kaj admirata de internaciaj samideanoj." Li emfazis: "100 jaroj jam pasis kaj Esperanto eniris sian 2-an jarcenton. La 100-jara praktiko montris, ke Esperanto povos, se ĝi estos akceptita de la homaro, esti uzata por komuniki ideon, akceli la reciprokan komprenon kaj homan amikecon kaj ludi sian rolon por defendi la mondpacon kaj homan progreson. Tial lerni, propagandi kaj disvastigi Esperanton estas aprobenda kaj subtenenda en Ĉinio."

Estro de la Laborkomisiono pri Ĉinaj Lingvo kaj Ideografiaĵoj kaj vicprezidanto de ĈEL Ĉen Ĵuan konigis al la ĉeestantoj gravajn eventojn de E-movado en kaj eksterlanda en la lastaj jaroj. Fine li diris: "En la 100 jaroj, Esperanto montris sian potencon vivipovon. En sia 2-a jarcento, ĝi povos havi

pli grandan progreson, se oni aplikos Esperanton en la reala vivo."

Hu Ŝeng, prezidanto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj lernis Esperanton en la 30-aj jaroj. Li diris en la kunveno: "Esperanto devas esti komunikilo en larĝa skalo. Nun, kiam Ĉinio praktikas reformadon kaj pordmalferman politikon, ni povas uzi Esperanton en kontaktiĝo kaj interŝanĝo, kaj fari ĉion eblan por ke Esperanto ludu sian rolon en diversaj okazoj."

Disvastigi Esperanton al la juna generacio estas alia problemo priatentata de "Amikoj de Esperanto". Ĉaj Zemin, la antaŭa ĉina ambasadoro en Hungario, Gvineo kaj Egiptio, memoris, kiel li lernis Esperanton en sia juneco kaj pruvis la necesecon de la internacia lingvo per siaj spertoj de diplomato. Li diris: "Sen internacia lingvo, estas malfacile okupiĝi pri la internacia kontaktiĝo kaj pli malfacile labori kiel diplomato. Tial oni bezonas Esperanton. Esperanto kreskos pli rapide, se ni ĉiuj aktive disvastigos ĝin. Ni devas pli aktive konigi Esperanton al la juna generacio, multaj junaj homoj ankoraŭ ne konas ĝin. Ni devas plifortigi per Esperanto la pacan movadon, kiu

nun kreskas rapide en la mondo. Esperanto havas belan perspektivon."

Vicprofesoro Li Janĝe, membro de la Ĉina Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco opiniis, ke oni devas meti esperon sur la juna generacio, al kiu apartenos nia patrujo kaj Esperanto. Por venki la malfacilojn sur la vojo, li volonte faras reciprokan kuraĝigon kun la gejunuloj. Li diris: "Se nur brilas la steloj en la ĉielo, ni ne timas malebenaĵojn sur la vivovojo. Lasu aliajn fieri! Nia misio estas kreado por la tuta vivo!"

En la kunveno oni projekciis fragmenton de "Espero", la unua ĉina televida filmo por Espinstruado, farita de la urbo Ĉingdaŭ. La ĉeestantoj unuanime gratulis ĝian naskiĝon kaj laŭdis la urbon Ĉingdaŭ, kiu faris kontribuon al E-movado.

En la kunveno Hŭang Hŭa, vicprezidanto de la Konstanta Komitato de la Sesa Tutlanda Popola Kongreso de ĈPR, Hu Ŝeng, vicprezidanto de la Ĉina Tutlanda Popola Politika Interkonsiliĝa Konferenco kaj prezidanto de la Ĉina Akademio de Sociaj Sciencoj, Lŭo Ĝjun, vicedestro de la Komisiono de Kultura Interŝanĝo kun Aliaj Landoj sub la Kultura Ministerio de Ĉinio, kaj Ĉen Haŭsu, vicministro de la Ĉina Ministerio de Radio, Kino kaj Televido estis elektitaj kiel vicprezidantoj de "Amikoj de Esperanto".

Raportistoj de Pekino raportis la kunvenon. ■



Roterdamo bonvenigas vin!

La 73-a Universala Kongreso de Esperanto okazos de la 23-a ĝis la 30-a de julio en Roterdamo, Nederlando. Ĝi estas la kvina universala kongreso en Nederlando post tiuj en 1920, 1954, 1964 kaj 1967.

Ĉi-jare la kongreso okazos en Roterdamo grave pro tio, ke 1988 estas la 80-a datreveno de la fondiĝo de la Universala Esperanto-Asocio, kaj ke la sidejo de UEA estas ĝuste en Roterdamo.

Nederlando estas mondfama "Malalta Lando". Parto de ĝi situas eĉ 6 metrojn sub la marnivelo. Nederlando troviĝas en la Okcidenta Eŭropo, frontas nordokcidente al la Norda Maro kaj havas limon sude kun Belgio kaj oriente kun FR Germanio. La areo ampleksas 40 884 kvadratajn kilometrojn. La ĉefurbo estas Amsterdamo, kaj la sidejo de la registaro en Hago. La loĝantaro nombras 13.94 milionojn. Plejparto de Nederlando kuŝas sur ebenaĵo, kaj la klimato estas oceana, sen granda temperatura diferenco. Nederlando abundas je tergaso, karbo kaj ŝtonoleo. Prosperas ĝiaj industrioj ŝipkonstrua, ŝtala, karba, elektromaŝina, tekstila, kemia kaj nutraĵa. Progresas ankaŭ ĝiaj navigado kaj flŝkaptado. En la kamparo ĉefe estas brutobredado kaj florkulturado.

Roterdamo estas grava komerca kaj ekonomia centro kaj granda havenurbo. Pro sia favora situo Roterdamo nomiĝas "pordo

de Eŭropo". Ĝi estas ankaŭ strategie grava urbo. La Dua Mondmilito preskaŭ ĝin forbombis. Do la bezono postmilitre rekonstrui tuj uzeblan havenurbon devigis haste kunfliki la urbon. Tial hodiaŭ ankoraŭ restas tie iom strasa nunajo. La nuntempa Roterdamo donas al ni impreson pri urbo inter du mondoj: samtempe modernega metropolo kaj trankvila urbeto. Tie kunvivas biciklo, loĝboato, futurismaj arkitekturoj kaj ĵus elpensitaj teknologioj. Roterdamo allogas multajn turistojn ĉiujare. Ĝi estas multe pli kvieta kaj pura, multe pli interesa ol aliaj urboj en Eŭropo. La urbanoj estas afablaj, gastamaj kaj helpemaj, la trafiko ne tro densa, la hoteloj komfortaj, varoj abundaj, kaj la vizitado al la urbo, haveno kaj ĉirkaŭaĵo estas tre oportuna!

Dum la kongreso, LKK planas duontagajn ekskursojn tra Roterdamo mem kaj al la haveno, kaj vizitojn por fakuloj al universitatoj, komercaj entreprenoj, sem-kultiva entrepreno, trinkakvaj instalaĵoj ktp. Krome, ĝi preparas ankaŭ tutan dekon da tuttagaj ekskursoj al Amsterdamo, Hago, la fama strando Schevenigen, Delft, Den Bosch ktp.

Kompreneble, esperantistoj deziras tien iri ne nur pro la supraj kaŭzoj, sed ankaŭ pro tio, ke tie estas la Centra Oficejo de UEA. Roterdamo signifas la centron de la internacia Esperanto-movado. Esperantistoj multe esperas al UEA!

Venu al Roterdamo! Roterdamo bonvenigas vin! ■

Delfshaveno





Gesinjoroj Bormann

WERNER BORMANN (FR Germanio):

Kontrolo de lingva unueco

Esperanto estas en konstanta uzo tra la tuta mondo kaj tamen unueca lingvo. Tiu fakto evidente mirigas la eksteran publikon, ĉar ĝuste la demando pri konservado de lingva unueco venas ofte en diskutoj pri la ŝancoj de la Internacia Lingvo.

Esperantistoj scias inter si ke ili kun sia Esperanto komprenas ĉiun ĉie: Universalaj kongresoj pruvas tion elstare. “El Popola Ĉinio” havas legantojn en ĉiuj kontinentoj, same Revuo “Esperanto” el Nederlando, kaj ne ekzistas lingvaj komplikaĵoj pro la devenlandoj de tiuj periodaĵoj.

La pruvo en la praktiko silentigas la dubantojn kontraŭ Esperanto. Faktoj konvinkas. Sed necesas scii, kial Esperanto tenas sian lingvan unuecon, kaj geografie kaj en la tempofluro. La fenomeno tiel pozitiva por

Esperanto havas sian bazon en psikologiaj kaj organizaj elementoj.

Kiu verkas en Esperanto, volas atingi sian publikon. Tio validas por letero, por prelego, por literaturaĵoj kaj simile. Do uzonte vorton aŭ formulon ĉiu celkonscia esperantisto demandas sin — se necese kontrolas en vortaro aŭ gramatiko — ĉu li aŭ ŝi kiel aŭtoro restos komprenebla en la ĝusta senco ĉe sia publiko. Ĉiu alia sinteno detruus la intencon de la entreprenota laboro mem. Tio unuecigas.

La ĝusta lingvo de la mond vasta Esperanto-organizaĵo estas fiksita en la statuto de Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj validas por ĝi same kiel por ĉiuj asociiĝintaj asocioj, do ankaŭ la landaj Esperanto-movadoj kun ĉiuj lokaj kluboj kaj unuopaj membroj. “La oficiala lingvo de UEA estas la Internacia Lingvo Esperanto tia, kia ĝi estas difinita per sia Fundamento, per la verkaro de ĝia iniciatinto Zamenhof kaj per la ĝenerala lingvouzo kontrolita de la Akademio de Esperanto” (artiolo 6).

Ĉiu esperantisto troviĝas en sia epoko de la lingvouzo kaj nature emas apliki la lingvaĵon tiel, kiel ĝi aŭdiĝas ĝenerale. Dum la Zamenhofaĵoj donas la bazon de tiu Esperanto kaj ja ankaŭ estas neniel kontestataj, la ĝenerala lingvouzo estas la normale aplikata mezurilo de la ĝusteco.

Nun ĝin kontrolas la Akademio de Esperanto. Tiu konstelacio donas apartan gravecon al tiu instanco. Eĉ se tiuj juraj rilatoj ne ĉiam estas konsciaj al la vasta esperantistaro, ĉiu samideano informanta pri Esperanto nepre citos sian “Akademion” por kredigi sian aserton pri la sekura evoluo de monda lingvo tra ĉiuj ŝanceliĝoj de la sorto.

La ekzisto de pri-Esperanta Akademio estas jam forta argumento kaj por Esperanto mem kiel lingvo kaj por la konfido je bona estonteco de ĝia aspiro. Konsekvence do atentigos pri ĝi neniam mankas en la konversacioj varbcelaj por Esperanto.

En sia Akademio Esperanto havas sian unuan kaj ĉefan kontrolorganon kun la tasko zorgi

pri la lingva unueco. Sed tiu ĉi Akademio estas unu grupo de proksimume 40 spertuloj, kiuj kune laboras koresponde, do malrapide kaj kun neeviteble malgranda kvanta rezulto. Kontraŭe al tiu eta pinto centmiloj da homoj en centoj da landoj uzas Esperanton. La distanco inter ambaŭ—la kontrolanta organo kaj la kontrolataj uzantoj—estas grandega. Tia sistemo nur unuavide respondas konvinke la demandon pri la konservado de lingva unueco. Kaj vere: ĝi estas nekompleta bildo de la realo en la internacia Esperanto-movado.

Multaj landaj asocioj de Esperanto disponas pri Ekzamenaj Fakoj, aŭ lingve interesataj enlandaj esperantistoj organiziĝas en landa Esperanto-Instituto, kies unu el pluraj servoj estas lingvoekzamenoj. Tiuj Institutoj ĝenerale havas kelkdekojn da regionaj aŭ lokaj ekzamenaj komisionoj, sub gvido kaj kontrolo de la tutlanda Instituto.

Tie en la ekzamenaj komisionoj troviĝas la severuloj, kiuj trarigardas la eseojn de siaj kandidatoj kaj decidas, ĉu io estas korekta aŭ erara. Dum la akademianoj rekomendas aŭ verdiktas en sia supro, la ekzamenantoj prenas siajn ruĝajn globskribilojn, forstrekas erarojn kaj fine prijuĝas la lingvon kun la rekta konsekvenco: tiu Esperanto estas la ĝusta, tiu

alia kandidato malsukcesis en sia ekzameno, ĉar lia aŭ ŝia lingvaĵo ne estas la Esperanto.

En siaj landaj Esperanto-institutoj Esperanto havas sian duan kaj vastan kontrolmekanisman. En la unua nivelo la Akademio, en la dua la Institutoj prizorgas la kontrolon de la lingva unueco. Logike tiuj du kontroltavoloj bezonas iun kunlaboron. Por tio ekzistas konvena bazo en la statuto de la Akademio de Esperanto: ĝi rekte antaŭvidas ĝin.

Aldone, en siaj strukturoj la Akademio havas du speciojn de laborunuoj. Ĝiaj "sekcioj" estas grupiĝoj de akademianoj kunlaborantaj pri unu specifa tasko, ekzemple gramatiko, ĝenerala vortaro kaj aliaj. En la "komisionoj" membras akademianoj kaj specialistoj el ekster la Akademio, tiukaze respondeculoj de Esperanto-Institutoj. Pri la kontrolo de lingva unueco laboras en la Akademio ĝia komisiono "akademio kaj landaj Esperanto-Institutoj" (kio inkludas la ekzamenajn fakojn.)

Akademianoj estas esperantistoj kun profunda engaĝiĝo pri la lingvo Esperanto. Iuj trovis sian ĉefintereson en lingvistikaj aspektoj de Esperanto, aliaj sin dediĉis al Esperanto kiel socia fenomeno, do alpaŝis la lingvon kaj ĝian parolantaron kiel orga-

nizantoj kaj ordigantoj.

Ĉiuj jam multe laboris en la esperantistaro, pri la lingvo kaj en la movado, loke, lande kaj internacie. Tial ne estas mirige, ke kelkaj akademianoj aktivas en landaj Esperanto-Institutoj. Jam pro tio la kunlaborado funkcias. Cetere ankaŭ universitataj profesoroj pri Esperanto membras en la Akademio, do ankaŭ tiuj instruantoj/ekzamenantoj de la Internacia Lingvo estas ligitaj al la Akademio.

Prave la Akademio troviĝas en centra funkcio, kiam temas pri la kontrolo de lingva unueco, kaj la statuto de UEA en tiu punkto—kie ĝi ĉeflokigas la Akademion—ne estas iu preskribo en nelegata dokumento, sed priskribo de la reala situacio.

Esperanto estas mondvaste uzata lingvo, kiu estas ĉie fremdlingvo kaj kiu ne havas bazon en kune loĝanta homgrupo kun ŝtato kaj ĉiuj organizaĵoj tie kutime troviĝantaj. Tio estas ĝia karakterizo. Kiel la Internacia lingvo ĝi devas rezigni je tiu natura elemento de lingva stabileco. Sed Esperanto estas kohera en sia evoluo pro la disciplino de la esperantistoj, kiuj akceptas la lingvan gvidon fare de la Akademio kaj de la Esperanto-Institutoj. Pro ilia kontrolo de lingva unueco Esperanto havas sian sekuran bazon. ■

SUR NIA LIBROBRETO

Laŭtema vortaro kompletigita

SISTEME ORDIGITA VORTARO de d-ro Michele Mariano, eldonita de Plejado, Scienca Eldon-Serio n-ro 3, 1986. Formato: 33 × 21 cm. 536 p.

Prezo: 113.7 gld.

Se dum verkado aŭ tradukado vi bezonas vorton por ion diri, kaj tamen vi ne disponas en via memoro tiun

vorton, tiam vi povas vin helpi per laŭtema vortaro. Sed ĝenerale, en tiaj vortaroj oni donas nur listojn de vortoj klasifikitaj laŭ iliaj sencoj kaj

oni ne montras iliajn signifojn per difinoj kaj klarigoj. Por elekti el la vortogrupoj vortojn ĝuste bezonatajn, oni devus konsulti PIV aŭ similan vortaron. Kiel bone, se laŭtema vortaro entenas ankaŭ la difinojn de la enlistigitaj vortoj! La "Sisteme Ordigita Vortaro" ĝuste estas tia vortaro por kontentigi nian bezonon!

La titolo de la vortaro, verdire, ne estas tute klara, ĉar ja ĉiu vortaro devas esti "sisteme" aranĝita. Sed la vortoj en tiu ĉi vortaro, kiu estas kompletigita eldono de la "Esperanto-Vortaro per Temotabeloj", estas ordigitaj en tabeloj lerte aranĝitaj laŭ la parenceco de la vortoj. La vortoj kaj iliaj difinoj estas ordigitaj laŭ geometria sistemo en du direktoj: horizontale staras unu apud alia la interrilataj kategorioj (grupoj); vertikale staras gradacie la subordigeblaj vortoj al ĉiu grupo, inkluzive antonimojn. Ĉar la amplekso de la ideofamilioj estas ne egalaj, sekve ankaŭ la tabeloj en la vortaro diferencas unu de alia en vasteco: iuj okupas nur mallarĝan kolonon, dum aliaj tutan paĝon. Por faciligi serĉadon de vortoj dezirataj, alfabeto indokso en pli ol 100 paĝoj estas aldonita je la fino de la libro.

Tre diversaj povas esti la opinioj por klasifiki la vortojn kun abstraktaj kaj konkretaj nocioj, do estas tute nature, ke la legantoj malkonsentos kun la aŭtoro en aranĝo de tiu aŭ alia kategorio de vortoj. Ekzemple, li ne metis la vorton "ofseto" en la vortogrupon pri presado, sed en tiun pri ksilografado. En la libro troviĝas certa nombro da preseraroj (ekz. p. 23: Perdi la originaj trajtoj, kvalitoj de raso...), kaj oni ne utiligis sufiĉe da grafikaj rimedoj por pliklarigi la tekstojn. Kaj krome, la formato de la libro estas tro granda por esti oportune uzebla. Tamen tiu ĉi "prototipo" de laŭtema vortaro, kiel la aŭtoro modeste ĝin nomis, ja signifas sufiĉe gravan kontribuon al nia lingvo, havigante al ĝi dankindan bazon por disvolvi necesajn laŭtemajn vortarojn en la estonto. Laŭdindaj estas ne nur la iniciatemo kaj firmvola sindediĉo de d-ro Michele Mariano, sed ankaŭ la entreprenemo de la eldonejo Plejado, kiu kuraĝe sin ŝarĝis per tiu laboro impona, sed finance ne profitodona.

RECENZIS LAŬLUM

NOVE RICEVITAJ LIBROJ

GIMNASTIKO POR CERBO de Tacumi Hiroshi, eldonita de la Japana Esperanta Librokooperativo (Sonehigasi 1-11-46-204, Toyonaka, 561 Japanio). Formato: 10.5 × 17.5 cm. 126 p. Amuzo per matematiko. Prezo: 9 gld.

TABELO POR IDENTIGO DE LINGVOJ de N. C. Ingle, eldonita de la aŭtoro kaj mendebla ĉe li (adreso: 87, Victoria Rd., Shoreham-by-sea, West Sussex, BN4 5WR, Anglio). Praktike utila tabelo por identigi 59 lingvojn. Formato: 9 × 21 cm. 26 p. Prezo: 4 funtoj.

LA FERVOJMUZEO EN HAMAR kvarlingva gvidlibro verkita de P. J. Krogstie, mendebla ĉe li (adreso: Jernbanemuseets Venner, Postboks 248, N-2301 Hamar, Norvegio). Formato: 15 × 23 cm. 64 p. Prezo: 10 Norvegaj kronoj.

KOLEKTITAJ POEMOJ de L. N. M. Newell, eldonis Esperantaj Kajeroj. Formato: 14.5 × 21 cm. 80 p. Prezo: 3.6 funtoj.

ETERNA METAMORFOZO de Amerigo Janakono, eldonita de Gabrielli. Poemaro. 11.5 × 16 cm. 102 p. Prezo ne montrita.

ESPERANTO SURVOJE kolekto de artikoloj en Esperanto kaj la germana lingvo, eldonita de la Aŭstria Esperanto-Instituto. Formato: 14 × 21.5 cm. 164 p. Prezo ne montrita.

ESPERANTO EN NOVA FRAMO eseo de A. Goodheir premiita per premio Minnaja, eldonita de Kardo, Skotlando. Formato: 15 × 21 cm. 13 p. Prezo: 0.60 funto.

GROTESKAJ DIALOGOJ de Zora Heide, ilustrita de Dubravko Toplak, eldonita de la aŭtorino mem. Formato: 13 × 21 cm. 72 p. Prezo ne montrita.

ESPANJA ESPANJA poemo de Vladimir Ĉerkez, esperantigita de Vesna Skaljer-Race. Formato: 11.5 × 21 cm. 40 p. Prezo: 8 gld.

SOCIALISMA MEMMASTRADO de Edvard Kardelj, trad. Lucija Borčić, eldonita de la Jugoslavia Esperanto-Ligo. Formato: 13 × 20

cm. 259 p. Prezo ne montrita.

LA ĈEVALSALTO historia verko de Petar Mišković pri aer-invado al la jugoslavia urbo Drvar en 1944, esperantigita de Senad Ĉolić. Formato: 14 × 20 cm. 90 p. Prezo: 10 gld.

RANDE DE L' PRUDENTO Romano de Miroslav Krleža, esperantigita de Zlatko Tišljarić, eldonita de la Internacia Kultura Servo. Formato: 22 × 15 cm. 240 p. Prezo ne montrita.

MAĜANGO gvidlibro pri tiu ludo, verkita de Laurent Septier, eldonita de la Kancerkliniko. Formato: 15 × 21 cm. 32 p. Prezo ne montrita.

AMUZA LEGADO PRI TIL' STRIGOSPEGUL' de Hermann Bote, elgermanigita de Rikardo Ŝulco, eldonita de la Esperanto-Centro Paderborn. Formato: 14 × 21 cm. 376 p. Ilustrita. Prezo: 36 markoj.

VENTOLUME poemaro de estona poetino Debora Vaarandi, esperantigita de Hilda Dresen, Salme Karner, Jaan Ojalo, eldonita de "Eesti Raamat". Formato: 13 × 16 cm. 142 p. Prezo: 50 kopekoj.

KVIN NOVELOJ de F. Tuglas, tradukita de Henrik Seppik R. J. Palu. Eldonita de "Eesti Raamat". Formato: 13 × 16 cm. 128 p. Prezo: 60 kopekoj.

ESTONA PANORAMO eldonita de "Perioodika", Tallinn. Ilustrita per koloraj kaj nigra-blankaj fotoj. Formato: 13.5 × 21 cm. 144 p. Prezo: 70 kopekoj.

ESPERANTO KEELE OPIK lernolibro en Esperanto por estonoj, verkita de J. Ojalo, eldonita de "Valgus", Tallinn. Formato: 14 × 21.5 cm. 182 p. Prezo: 55 kopekoj.

LA LASTAJ INFANOJ DE ORDROVALO fikcio de Gudrun Pausewang, esperantigita de Joachim Giessner, eldonita de la Esperanto-Centro Paderborn. Formato: 15 × 21 cm. 77 p. Prezo: 13.9 markoj.

KRIKAIJ STUDOJ DEFENDE DE ESPERANTO de d-ro Ivo Lapenna, eldonita de la Neŭtrala Esperanto-Movado. Formato: 20.5 × 29.5 cm. 60 p. Prezo: 69 danaj kronoj plus 15% por sendkostoj.

Ombro kaj homo

Ombro diris al homo: "Mi estas via plej fidela amiko."

La homo respondis: "Ne. Vi akompanas min nur tiam, kiam mi estas sub la suno, tamen vi forlasas min en nuba tago kaj nokto." ■

Aglo

"Mia kara, vi devas mem serĉi manĝaĵon," diris maljuna aglo al sia ido.

"Ne, panjo, miaj flugiloj ankoraŭ ne estas plene elkreskintaj."

"Eĉ nun vi devas lerni la kapablon."

"Ne, panjo. Mi estos pli kapabla ol vi, post kiam miaj flugiloj fariĝos fortaj!"

"Sed, kara infano, vi devas lerni vivi memstare."

"Jes. Kiam miaj flugiloj fortiĝos..."

En la sekvanta vintro la maljuna aglo mortis. La juna

plenkreskis kun fortaj flugiloj kaj komencis vivi memstare. Tamen al ĝi mankis sperto de vivo. Ĝi ne sciis, kie serĉi manĝaĵon kaj kiel uzi siajn akrajn ungojn. Ĝi klopodis la tutan tagon, sed akiris nenion.

Nokte la malsata aglo dormis sur arbobranĉo. Malfeliĉe, ĝi falis de sur la branĉo kaj fariĝis frandaĵo de vulpo. ■

Fosaĵo

Pluvo plenigis fosaĵon, en kiu speguliĝis diversaj vidaĵoj.

"Nur hodiaŭ mi trovis, ke mi estas tre profunda!" la fosaĵo diris al najbara herbeto. "Vidu, mi povas enteni la bluan ĉielon, grandajn arbojn, montpintojn kaj krome la sunon kaj la lunon!"


Tiam bovido iris al ĝi por trinki akvon. Rigardante ĝin ŝajne profunda, la bovido ne kuraĝis proksimiĝi al ĝi.

Maljuna bovo alpaŝis al la fosaĵo kaj ridis post rigardo: "Infano mia, ne timu, trinku iom da akvo, tiam vi scios, kiom profunda ĝi estas."

La bovido mallevis la kapon kaj trinkis nur du plenbuŝojn da akvo. Ho, la fundo de la fosaĵo tuj montriĝis kaj malaperis en ĝi la blua ĉielo, la grandaj arboj, la suno kaj la luno. ■

Tarifo: unu internacia respondkupono por kvin vortoj aŭ mallongigoj. Por fotoj: unu intern. resp. kup. por spaco de unu linio. Niaj perantoj kaj kunlaborantoj ĝuas 30% da rabato. Esp-organizoj povas senpage aperigi anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

- * 23-j. studentino dez. kor. tm., interesiĝas pri muziko kaj fremdaj lingvoj, krom Esperanto okupiĝas ankaŭ pri angla, sveda kaj rusa lingvoj. Adr.: Kerstin Hiemann, Grunhaler Str. 32, Olbernhau, 9330, DDR.
- * 11-j. lernantino dez. kor. tm. interesiĝas pri muziko, sporto kaj kolektas bk. Adr.: Dorota Kopernik, ul. Jednosci Narodohej 2 e/2, 44-224 Knurów, Pollando.
- * Deziras kor. tm. la jenaj f-inoj: Kordula Hassel, Mullerweg 35, Zarrentin 2824. Wenke Aldorp, Hugo-Wenzel-Str. 13, Schwerin 2760. Cornelia Deubler, Gellendiner Weg 23 C, Anklam 2140. Franka Seer, Robert-Koch-Str. 13, Schwerin 2756. Antije Schwarz, Diesterwegstr. 5, Wolgast 2220. Jana Panwitz, Alter Landweg 18, Feldberg 2082. Diana Tschuschewa, Gleimstr. 11, Berlin 1058. Liane Kermbach, Eichenweg 5, Kleinmachnow 1532. Nora Gorke, Woldhof, Blumenthal 1921 kaj s-ro Emil Timm, Otto-Grothwohl-Str. 3 a, Kyritz 1910 kaj s-ino Rotraut Asmus, Ernst-Thalmann-Str. 19, Wusterhausen 1903
- * Dez. kor. pri naturo, komputilo kaj aliaj temoj. Adr.: Bolgar Laslo, Polgar, Bem j. 10, H-4090, Hungario.



MEMBROJ DE "AMIKOJ DE ESPERANTO" ELEKTITAJ KIEL GVIDANTOJ DE TPKĈ KAJ ĈPPIK

En la unuaj sesioj de la 7-a Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio (TPKĈ) kaj la 7-a Ĉina Popola Politika Interkonsiliga Konferenco (ĈPPIK) okazintaj en la unua duonjaro, membroj de la societo "Amikoj de Esperanto" Ĝou Guĉeng kaj Lej Ĝjeĉjong estis elektitaj kiel vicprezidantoj de la Konstanta Komitato de TPKĈ kaj Hu Ŝeng, Bakin, Ĝou Pejĵuan kaj Ĝau Puĉu kiel vicprezidantoj de ĈPPIK. Aliaj 8 membroj de la societo estis elektitaj kiel anoj de la Konstantaj Komitatoj de TPKĈ kaj ĈPPIK. Tio pligrandigis la influon de la societo en diversaj rondoj de la socio.

Krome, ankaŭ Lu Ĝjaŝji, honora prezidanto de la Sciencista-Teknikista Esperanto-Asocio sub la Ĉina Akademio de Sciencoj, estis elektita kiel vicprezidanto de ĈPPIK, kaj Jan Dongŝeng, prezidanto de la asocio, kaj aliaj kvar konsilantoj kiel membroj de la Konstantaj Komitatoj de TPKĈ kaj ĈPPIK.

E-KURSOJ FUNKCIIGATAJ EN TRI ALTLERNEJOJ

De la lasta septembro en la Ĉingdaŭ-a Oceanografia Universitato de Ŝandong-provinco Esperanto estas instruata kiel nedeviga kurso kaj funkcias la duastaĝa E-kurso, en kiu lernas 63 homoj el la fakultatoj fizika, biologia, geologia, akvoproduktaja, inĝenierada k.a. Inter ili 58 lernantoj trapasis la ekzamenon.

En la 16-a de marto ekfunkciis tri duastaĝaj fakultativaj E-kursoj en la Nordokcidenta Normala Instituto, en kiuj lernas 160 studentoj. La lernotempo daŭros unu kaj duonan jarojn. La 100 lernantoj de la unuastaĝa E-kurso

de la instituto jam finis lernadon post unu kaj duona jaroj.

Ankaŭ la postlabora E-kurso fondita de la Student-Asocio de la Nacidefenda Scienc-Teknika Universitato ekfunkciis antaŭ ne-longe, kun 60 partoprenantoj.

FONDIĜO DE LA ANHUJ-A ESPERANTA KOLEGIO SANKCIITA

En la 17-a de marto la Eduka Komisiono de Anhuĵ-provinco donis oficialan sankcion de la fondo de la Anhuĵ-a Esperanta Kolegio. La sankcia dokumento klare difinis, ke la kolegio apartenas al la altlernejoj. Por garanti la edukan kvaliton la kolegio devas organizi instruadon laŭ la postulo. Lu Ŝengiĵuan estas ĝia direktoro kaj Ju Ĝuogĵan kaj Ĉjan Daĉjan ĝiaj vicdirektoroj.

ESPERANTA POŝTSTAMPILO POR LA 7-A TPKĈ

La memoriga poŝtmarko n-ro J.147 por la 7-a Tutlanda Popola Kongreso de Ĉinio estis emisiita de la Ministerio de Poŝto kaj

Finiĝis la duastaĝa E-kurso de la Ĉingdaŭ-a Oceanografia Universitato.




Memoriga poŝtstampo kun ĉinaj kaj Esperantaj vortoj farita de la poŝtofiĉejo de Ĉangŝu

Telekomuniko de Ĉinio en la 25-a de marto. La poŝtofiĉejo de Ĉangŝu, Ĝjangsu-provinco, faris memorigan poŝtstampilon kun hanlingvaj kaj Esperantaj vortoj. Ĝi estas la dua Esperanta poŝtstampilo ĉi-jare memore al neesperanta grava evento. Ĝia projektinto estas esperantisto, kiu projektis por sia uzo ankaŭ memorigan koverton okaze de la malfermo de la kongreso.

APERIS PASPORTA SERVO 1988/89

Aperis la 14-a eldono de listo de gastigantoj. Ĝi denove enhavas kelkajn centojn da adresoj el pli ol



50 landoj. La enskribitaj gastigantoj pretas gastigi esperantistojn senpage aŭ kontraŭ eta elspezkontribuo. Per la Pasporta Servo bonege eblas konatiĝi kun fremdaj landoj, kulturoj kaj esperantistoj.

La listo haveblas ĉe la landaj organizantoj de la Pasporta Servo kaj kelkaj libroservoj, aŭ ĉe la centra distribuanto: Christian Nitsche, Wehrstrasse 69-C3, D-4200 Oberhausen 1, F.R.G.

11-A INTERNACIA KORESPONDA GO-TURNIRO

LA Esperanto-Sekcio de la GDR-Go-Asocio en kunlaboro kun la EGLI (Esperantista Go-Ligo Internacia) alvokas ĉiujn Go/Vejĉi-ludantojn esperantistajn partopreni en la mondvasta 11-a Internacia Koresponda Go-Turniro.

Ĝi komenciĝos en somero 1988.

Interesuloj bonvolu enskribiĝi ĉe la turnirgvidanto: S-ro Matthias Reimann, Platz der Freiheit 20, ELLRICH, DDR-5503, Germana Demokratia Respubliko.

YOSIMI UMEDA EN PEKINO

Invitite de la Ĉina Esperanto-Ligo, s-ro Yosimi Umeda, vicprezidanto de la Universala Esperanto-Asocio, vizitis Pekinon inter la 8-a kaj 11-a de aprilo. S-ro Ĉen Jūan, vicprezidanto de ĈEL, intervidiĝis kun s-ro Yosimi Umeda kaj interŝanĝis kun li opiniojn pri plua disvolvo de la amikaj kunlaboraj rilatoj inter ĈEL kaj UEA, pri akcelo de la Esperanto-movado en Azio kaj pri kulturaj interfluo inter ĉinaj kaj japanaj esperantistoj pere de Esperanto. La intervidiĝon ĉeestis ankaŭ s-roj Chun-Chan Yeh, Ĝu Mingji kaj Daj Song'en.


Dum sia restado en Pekino, vicprezidanto Yosimi Umeda vizitis kun granda intereso ankaŭ la pordegon Tjan-anmen. Li diris, ke tio estas lia 11a-foja vizito al Ĉinio, kaj ke dum ĉiu vizito li rimarkis novan ĝojigan ŝanĝon.

ALIAJ INFORMOJ

1) Sub la aŭspicioj de la Sudorienta Esperantista Federacio okazos la Esperanto Internacia Amikeca Kuniĝo la 23-an — 25-an sept. 1988, en Aylesbury. Plua informo estas havebla ĉe Bertram Russell, 103 South Coast Road, Peacehaven, Newhaven, East Sussex, Anglujo, BN9 8QU.

2) Dum la 61-a SAT-Kongreso okazonta en Campos do Jordao, São Paulo, Brazilo, de la 6-a ĝis la 13-a /8/1988, okazos A-seminario por Cseh-instruantoj, gvidota de Mila van der Horst-Koli.

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. Sunde-gubernio 2. Ĝjiŝan-gubernio 3. Jongding-gubernio 4. Nanĝing-gubernio 5. Tjanĝin

Superkonduktivo feliĉigos la homaron

Esplorado de superkonduktivo estas varma esplortemo en la sciencistaj rondoj. Sciencistoj de diversaj landoj faras intensan konkurson en la esplorado kaj akiris novajn sukcesojn unu post alia.

Superkonduktivo estas fenomeno de nula rezistanco de iuj materialoj en medio de malalta temperaturo. Dank' al la nula rezistanco de superkonduktivaĵoj apenaŭ konsumiĝas elektra energio, kio havos grandan perspektivon en la estonteco.

LA HISTORIO DE SUPERKONDUKTIVA ESPLORADO


Kamerlingh Onnes, fizikisto de Nederlando, estis specialisto en esplorado de malalttemperatura fiziko. Li nomis la temperaturon de nuliĝo de rezistanco kriztemperaturo superkonduktiva kaj la staton de nula rezistanco "stato de superkonduktivo". Li atingis malaltan temperaturon 1 K per likva helio. K estas marko de la absoluta temperaturo. La nulo de la absoluta temperaturo egalas -273°C . La sukceso donis al li eblecon fari profundan

eksperimentadon malgrandigi rezistancon kun malleviĝo de la temperaturo. La plej pura metalo tiam akirebla estis hidrargo. En la eksperimentado li trovis neatendite, ke la rezistanco de hidrargo rapide malleviĝis kiam la temperaturo malleviĝis al 4 K. Lia plia eksperimento montris, ke la rezistanco de hidrargo tute malaperis, kiam la temperaturo estas 4.173 K.

Li trovis, ke ankaŭ nepuraj hidrargo, plumbo, stano k.a. havas analogan karakteron. Li trovis tian superkonduktivan fenomenon en 1911 kaj pro tio li ricevis la Nobelan Premion de Fiziko en 1913.

Post pliprofundaj eksperimentado kaj esplorado oni trovis en 1933 alian gravan karakteron de superkonduktivaĵo — kompletan antimagnetismon. Tio signifas, ke la superkonduktivaĵoj en la stato superkonduktiva havas nulan magnetan indukton. Nederlandaj kaj germanaj fizikistoj elmetis teoriojn por klarigi superkonduktivan fenomenon kaj akiris certajn sukcesojn. En 1957 usonaj fizikistoj J. Bardeen, L.N. Cooper kaj I.R. Schrieffer kune elmetis faman mikroskopan superkonduktivan teorion kaj pro tio akiris la Nobelan Premion de Fiziko en 1972. La teorio estas sukcesa, sed ankaŭ ĝi ne povas ekzakte eldiri, kiuj materialoj en kia temperaturo

Ĝang Ĉijijuj, profesoro de la Ĉina Scienc-teknika Universitato, gvidas esploristojn por fari teston pri superkonduktiveco.



povas fariĝi superkonduktivaĵo.

En 1962 juna brita fizikisto Josephson profetis mirindan efekton ekzistantan en tunela junto de superkonduktivaĵo — Josephson-efekton. La teorio tuj estis pruvita per eksperimentado kaj multflanke aplikata en praktiko. Pro la atingo Josephson akiris la Nobelan Premion de Fiziko en 1973. Pro sia sukcesa esplorado pri elektrona tunela efekto de superkonduktivaĵo ankaŭ la usona fizikisto I. Giaever akiris la Nobelan Premion de Fiziko en la sama jaro.


Depost 1911, multaj sciencistoj entrudiĝis en la pordon de superkonduktivito malfermitan de K. Onnes, faris esploron pri la aplikado de superkonduktivito, kreis superkonduktivajn teoriojn kaj serĉas superkonduktivajn kun alta kriztemperaturo. Kvankam oni jam elfaris mil specojn de superkonduktivito, tamen la plej alta kriztemperaturo estis nur 23.2 K en 1985. Tio signifas, ke preparado kaj aplikado de superkonduktivito devas esti farataj en la medio de likva heliumo kaj pro tio estas bezonataj multaj altkostaj malalttemperaturaj ekipaĵoj.

OKULFRAPA MONDA KONKURSO

Estas gratulinde, ke aprile de 1986 svisaj fizikistoj trovis iun oksidon, kies kriza temperaturo superas 30 K, kaj pro tio ili akiris la Nobelan Premion de Fiziko en 1987. De tiam la stato draste ŝanĝiĝis. Inter sciencistoj ĉinaj, usonaj kaj japanaj okazis konkurso por trovi superkonduktivajn kun alta kriztemperaturo. Kaj la konkurso envolvis la tutan mondon. Jen la atingoj akiritaj en tiu ĉi konkurso:

Post la svisaj sciencistoj esplora grupo de la politekniko sub la Tokia Universitato de Japanio trovis materialon kun kriztemperaturo de 37 K;

La 30-an de decembro, 1968, la



La magneta kubo flosas super superkonduktivaĵo.

Houston-a Universitato anoncis, ke la ĉindevena usonano Gu Ĝing'u altigis la krizan temperaturon ĝis 40.2 K;

En 1987 aperis rekordoj unu post alia tiuflanke: en la unuaj tagoj de januaro iu japana esplora instituto akiris superkonduktivajn kun kriza temperaturo de 43 K. Post nelonge alia esplora instituto de la sama lando trovis materialojn kun krizaj temperaturoj respektive de 46 K kaj de 53 K;

Antaŭ tiuj trovoj de japanoj la Fizika Esplor-instituto sub la Ĉina Akademio de Sciencoj jam atingis superkonduktivajn temperaturojn 48.6 K kaj 70 K;

La 15-an de februaro usonaj sciencistoj faris novan breĉon, Ĝu Ĝing'u kaj Su Kun sukcesis altigi la rekordon al 98 K;

Tamen, nur post kelke da tagoj, en la 24-a de februaro, Pekino informis, ke la Fizika Esplor-instituto unuafoje trovis super-

konduktivajn kun kriza temperaturo de pli ol 100 K;

La 3-an de marto, la Scienc-teknika Buroo de Japanio anoncis, ke japanaj sciencistoj jam starigis la rekordon de 123 K;

En la sekvanta tago ankaŭ la Fizika Fakultato de la Pekina Universitato atingis la saman nivelon kaj refaris la eksperimenton en la 7-a de marto;

Ankaŭ usonaj sciencistoj sukcese nuligis rezistancon en 123 K;

La 12-an de marto oni informis, ke la Pekina Universitato sukcesis fari eksperimentadon en medio de likva nitroĝeno;

La 19-an de marto, la Ĉina Scienc-teknika Universitato trovis superkonduktivajn kun kriza temperaturo de 215 K;

Post nelonge japanaj sciencistoj trovis superkonduktivajn fenomenon en medio de 14°C.

En malpli ol duonjaro sciencistoj faris breĉon en tiu ĉi longe nesolvita problemo, uzante metal-



Profesoro Ĝaŭ Ĝongŝjan (dekstre) analizas donitaĵojn pri testita superkonduktivaĵo.

ajn oksidojn kiel superkonduktivaĵojn. Por pli ĝuste difini krizan temperaturon de superkonduktivaĵo, iu japana profesoro elmetis kvar determinajn normojn, nome: 1. nula rezistanco; 2. antimagnetismo, kiel eble pli forta; 3. ripetebleco de eksperimentoj de la materialo en la samaj teknologiaj kondiĉoj; 4. stabileco de superkonduktivito en plurfoja varma cirkulado. La kvar determinaj normoj jam estis akceptitaj de la internaciaj fizikistaj rondoj. Ekzamenate laŭ tiuj ĉi kvar determinaj normoj jam troviĝis superkonduktivaĵoj kun krizaj temperaturoj de 90-100 K.

En 1988, la grupo de superkonduktiva esploro de la Pekina Ŝtala Instituto, sur bazo de la eltrovo de superkonduktiva fenomeno en la medio de ĉambra temperaturo (nestabila), faris superkonduktivaĵon kun kriztemperaturo de 85.3 K el novtipa oksido Bi-Ca-Sr-Cu-O, kiu entenas nenian raran teron. Ĝia kriztemperaturo superas la plej altan kriztemperaturon de uzitaj materialoj raportitan eksterlande je 1.2 K. Ekzamenado montris, ke ĝi havas evidentan antimagnetisman efekton je 84 K.

Nun la trovita superkonduktivito estas ankoraŭ en kadro de malalta temperaturo. La sciencistoj batalas por trovi superkonduktivaĵojn en ĉambra kriztemperaturo.

PRAKTIKA PERSPEKTIVO DE SUPERKONDUKTIVA TEKNIKO

Superkonduktivaĵo havas du ĉefajn trajtojn: ĝia nula rezistanco ebligas maksimume redukti konsumon de elektra energio kaj la bobeno el ĝi povas produkti potencon magnetan kampon. Sciencistoj antaŭdiris, ke la praktika aplikado de superkonduktivaĵoj kaŭzos novan revolucion de industriaj teknikoj kaj ĝia perspektivo estos netaksebla.

Oni jam elfaris superkonduktivajn komputilojn, elektronikajn pecojn kaj altprecizajn mezurilojn. La superkonduktiva komputilo superas ĉian nunan elektronikan komputilon en operacia rapideco. Superkonduktiva kvantuma interferometro kun superkonduktivaj pecoj kiel la kerno estas altpreciza mezurilo, kies aplikado en teromagnetisma kaj biomagnetisma mezurado, metrologia tekniko, sismoprognozo, prospektorado, medicino, militaj aferoj kaj aliaj akiris mirindan sukceson. Ĝi en sentiveco, mezur-amplekso kaj

reakcia rapideco multe superis diversspecajn interferometrojn.

El superkonduktivaĵo oni povos produkti senkonsumajn elektrono-transportajn fadenojn por anstataŭi la tradician metodon de alttensia elektrotransportado. Se oni faros grandan magneton el superkonduktivaĵo, ĝi povos rezervi elektroenergion. Oni povos fabriki ŝveban trajnon per superkonduktivaj magnetoj kaj submaran ŝipon movatan per elektromagneta energio. Tia trajno povos sin movi super relojn pro la forta magneta kampo produktata de superkonduktivaj magnetoj. Ĝia rapideco povos atingi 500 km/h.

Estas plej menciinde, ke en la scienca esplorado oni povos fari tute novan partiklan akcelilon kaj instalaĵon de nuklea fuzio per superkonduktivaĵoj. La forta magneta kampo produktita de superkonduktivaĵo en regata nuklea fuzio estos plej promesplena. Ĝi povos regi deŭteriajn kaj triciajn jonojn, por ke ili eligu gigantan energion en nuklea fuzio. Ĉiu litro da marakvo entenas 0.03 gramon da tricio, kiu povas eligi en fuzio tiom da energio kiom 300 litroj da benzino donas. Tiam oni povos ekspluati marakvon, por ke ĝi produktu elektron por la homaro. La tricio en la oceanoj sufiĉas por la homa konsumado je miliardoj da jaroj.

Por apliki superkonduktivajn en praktiko, oni devas altiĝi ĝian krizan temperaturon. Kiam oni uzas likvan nitrogenon anstataŭ heliumo kiel fridigilon, la efiko altiĝas dudekoble kaj la kosto-prezo estas nur dekono de tiu de likva heliumo, kio multe progresigis la aplikadon de superkonduktivaĵoj. Efektivigi praktikan uzon de superkonduktivaĵoj en ĉambra kriztemperaturo estos la fina celo de sciencistoj. Kiam venos tiu tago, superkonduktivaĵoj ricevos vastan aplikadon kaj feliĉigos la homaron. ■

Doktorino Ni Jiŝin

Doktorino Ni Jiŝin, alta kaj maldika, ofte portas ordinarajn ĉin-stilajn vestojn. Je la unua vido ŝi impresas tiel ordinare. Tamen per siaj strebemo kaj sukceso ŝi, kiel vicdekano de la generatora kaj elektromotora fakultato de Ĉinghŭa-universitato, akiris respekton kaj konfidon de siaj kolegoj.

En 1968 Ni Jiŝin diplomitiĝis el la generatora kaj elektromotora fakultato de Ĉinghŭa-universitato kaj eklaboris en la Unua Konstrua Kompanio de la Nordorienta Elektra Buroo de Ĉinio. En 1978 pro sia bona noto ŝi estis akceptita de Ĉinghŭa-universitato kiel esplora studento kaj eklernis ĉe Gaŭ Ĝingde, fama ĉina fakulo pri generatora kaj elektromotora konstruo kaj nun direktoro de Ĉinghŭa-universitato. Post 5 jaroj ŝi sukcese faris defendon pri sia

disertacio kaj fariĝis la unua inĝeniera doktorino kulturita de Ĉinio. En 1985 ŝi kiel vizitanto-fakulo ekstudis en la Universitato de Iovao de Usono. Post duonmonato ŝia gvidanto prof. A. A. Fouad antaŭ ĉio aranĝis, ke ŝi prelegu unufoje en ĉiu semajno pri sia doktoriĝa disertacio plenumita enlande, por ekzameni ŝian kapablon. Ĝuste tiam la temo estis malfacila por multaj fakuloj. Tial, kiam ŝi faris prelegon, ĉiuj ŝin aŭskultis kun streĉita atento. Post la prelego ŝi respondis diversajn demandojn starigitajn de aŭskultantoj.

Ni Jiŝin bone impresis sian gvidanton per diligenteco, tamen la gvidanto volis koni ankaŭ ŝian iniciatemon. Foje en la klasĉambro fakuloj el diversaj landoj konkure prezentis sian opinion, tiam Ni Jiŝin ne volis interrompi

aliajn, tial ŝi nur silente sidis, kvazaŭ pensante pri io. Post la leciono ŝi donis al prof. A. A. Fouad pecon da papero, sur kiu ŝi skribis multajn komplikajn derivaĵojn de matematikaj formuloj. El tio oni vidis, ke ŝi posedas solidajn matematikajn kaj fizikajn sciojn, kun alta analiza kapablo kaj vigla penso. Leginte la paperon, prof. A. A. Fouad emocie diris al ŝi: "Nun mi disponigos al vi esploran studenton. Daŭrigu vian temon."

Post unu-jara studado, per siaj 7 altnivelaj disertaĵoj kaj la laŭdoj de aliaj pri ŝia instruado, Ni Jiŝin estis engaĝita de la universitato kiel gasto-profesoro kaj restis en la universitato por fari esploradon por unu jaro. Ĉi-foje ŝia esplora temo havas gravan praktikan valoron. Se la esplorado sukcesos, oni povos en mallonga tempo koni perturbon de ajna parto de la elektra sistemo en elektrejo kaj koni, en kia stato la elektra sistemo povas resti stabila aŭ ruiniĝi. Sur tiu bazo oni povas elfari aparaton de aŭtomata regado, plene efikigi la elektran sistemon kaj preventi gravan akcidenton. La esplorado de antaŭuloj pri tiu grava temo jam liveris valorajn donitaĵojn.

Por Ni Jiŝin la tasko estis peza. De la fizika nocio, matematika modelo kaj komputila programo ĝis praktika kontrolo de la elektra reto, ĉion ĉi tion ŝi devis plenumi sola. Kaj tiam restis al ŝi nur 9 monatoj. Ne havante tempon por konsideri ion alian, ŝi tuj sin ĵetis en la esploradon. Ŝi legis kaj

Doktorino Ni Jiŝin





Ni Jiŝin (dekstre) kaj ŝia gvidanto prof. A. A. Fouad (meze)

analizis multajn dokumentojn, referaĵojn kaj originajn donitaĵojn, precipe esplorajn atingojn de antaŭuloj. Post foj-refoja komparado kaj pripensado ŝi fariĝis klara pri la fizika nocio kaj ŝlosila punkto de la rilata demando. Ŝi kuraĝe prezentis freŝan opinion kaj unuapaŝajn projektojn de solvado. Prof. A. A. Fouad aprobis ŝian vojon kaj kuraĝigis ŝin iri plu.

Tuj poste ŝi provis 5-6 projektojn, el kiuj neniu estis kontentiga. Ŝi maltrankviliĝis. Por kapti ĉiun minuton, ŝi laboris pli ol 10 horojn ĉiutage. Ŝi cerbumadis eĉ dum manĝado kaj irado kaj en lito. Post foj-refoja analizado kaj komparado ŝi trovis bonan projekton. Ŝi provis grupon da novaj donitaĵoj kaj la rezulto estis kontentiga. Prof. A. A. Fouad laŭdis: "Mi havas du 'stelojn' kaj Ni Jiŝin estas unu el ili. Ŝi estas la plej diligenta el miaj studentoj."

Maje de 1987 Ni Jiŝin transdonis al koncerna departemento de Kanado la softvaron, per kiu ŝi eksperimentis por la temo. Ĝuste tiam en Kanado okazis fakkunveno pri la temo, sekve samtempe okazis kunveno

por interŝanĝi esplorajn atingojn de Ni Jiŝin. En la kunveno ŝi parolis unu horon. La rapidecon kaj kvaliton de ŝia laboro laŭdis ĉiuj fakuloj en la kunveno. Kanado jam kontrolis sian elektran reton per la kompleta softvaro, ricevis kontentigan

efikon kaj komencis disvolvi la softvaron por scienca esplorado en tiun por produktado.

Antaŭ ŝia reveno al la patrolando usonaj kaj kanadaj kolegoj petis ŝin resti por daŭre labori kaj promesis doni al ŝi bonan salajron. Tamen ŝi opiniis, ke Ĉinio pli bezonas sciencistojn kaj teknikistojn, kaj insistis pri la reveno.

Iun vesperon en la adiaŭa bankedo okazigita en la Universitato de Iovao vicdirektoro de la universitato en ĝia nomo donis al Ni Jiŝin laŭdateston kaj serioze deklaris: Pro la bona instruado de Ni Jiŝin kaj ŝiaj sukcesaj scienca esplorado kaj gvido de esplora studento la universitato decidis titoli ŝin "honora sciencisto kaj konsilisto". Tio estas senprecedenta dum la pasintaj pli ol 100 jaroj post la fondiĝo de la universitato. Prof. A. A. Fouad diris al ŝi: "En vi ni vidis la nivelon de ĉinaj doktoroj kaj la spiriton kaj persistemon de ĉinoj." ■

tutmonde esperantista junulara organizo



tejo-

TUTMONDE

oficiala gazeto de tejo dumonate

ABONU "TEJO-TUTMONDE"


Oficiala gazeto de TEJO
Informas - anoncas
Raportas - rakontas
Opinias - kritikis
Kuraĝas - kuraĝigas
Instigas - edukas

TT evoluis al unu el
la plej bonaj gazetoj
en esperantujo. Tial
TT abonindas por 15 NLG
al la CO de UEA.

Brokatoj de Ĉinio

de ĜJANG ĜENMING

Desegnoj de brokatoj
de taj-nacieco



Brokato estas kolora silka teksaĵo kun floroj kaj aliaj desegnoj. Ĝi estas tradicia meti-artaĵo de Ĉinio. Ĝi estas ĵakarde teksita silkaĵo el fadenoj de pli ol du koloroj. Tia silkaĵo estas belkolora, riĉa je delikataj floroj kaj elegantaj desegnoj. Brokato estas uzata ĉefe en dekoro kaj vestofarado.

En la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770—476 a. K.) jam aperis brokataj teksejoj. En la Periodo de Militantaj Regnoj (475—221 a. K.), uzado de feraj objektoj kaj senĉesa pliboniĝo de instrumentoj vaste popularigis brokaton.

En la dinastioj Ĉin (221 a.K. — 206 a.K.) kaj Han (206 a.K. — 220 p. K.) la tekniko de silka brokato karakteriziĝis per eksterordinara delikateco. Tiam oni jam produktis altvalorajn lanan kaj orfadenan brokatojn.

Krom geometriaj figuroj, oni brokis ankaŭ per diversaj figuroj de drako, birdo kaj aliaj bestoj. En la arta plastiko, oni alprenis la metodon de strukturo de pentraĵoj, sekve brokato ekhavis desegnojn kun klara temo kaj densa atmosfero de reala vivo.

En Tang-dinastio (618—907 p. K.) prosperis la ekonomio kaj kulturo de la ĉina feŭda socio. En tiu periodo la brokatoj evoluis en du specojn: veftajn kaj varpajn. Vefta brokato estis kreita en Tang-dinastio. Tia brokato estis teksita el pluraj multkoloraj veftoj. La teksiloj estis plibonigitaj kaj la brokatoj ekhavis pli grandan larĝon kaj pli ĉarman aspekton. Desegno en kvarpeca kvadrato estis multe enbrokita. Cetere, dank' al la kultura interŝanĝo de la Oriento kaj Okcidento, brokato portis ekzotikan stilon, ekzemple oni kreis multajn novajn figurojn de ĉiela

ĉevalo, ĉjilin (mita besto de Ĉinio), cervoparo ĉe floroj kaj sub arboj, batalantaj kaproj, fazana paro k.a. Dank' al la kreaĵoj la brokatoj estis pli viglaj kaj enhavoriĉaj en la arta stilo. La brokata arto de Tang-dinastio grave influis sur la kulturon de la landoj de la Sudorienta Azio kaj eĉ tiun de aliaj mondpartoj. Okcidentanoj kutime nomis tian teksaĵon "brokato de Tang".

En Song-dinastio (960—1279) aperis brokatoj kun desegnoj "pleniganta la tutan fonon", "plenplenaj floroj" "flor-petaloj sur fluo" k. a. La brokatoj de Song-dinastio karakteriziĝis kaj per la pompa lukseco de la brokatoj de Tang-dinastio kaj per subtila, kvieta etoso.

En Ĵuan-dinastio (1206—1368) furoris orfadena damasko luksa, brila, glata kaj fortika.


En Ming-dinastio (1368-

1644) brokado venis al sia kulmino de disvolviĝo. La brokatoj de tiu periodo portis ĉefe figurojn bonaŭgurajn, ekz. "Riĉa Rikolto de Grenoj", "Pinoj kaj Gruoj (simbolo de longeviveco)", "Granatoj (simbolo de multaj gefiloj)", "Peonioj", "Papilioj kaj Vespertoj", "Pigoj sur Branĉo (simbolo de bonaŭguro)". La bildoj spegulis la dezirojn de la popolo pri paca feliĉa vivo. En tiu tempo la brokatoj ŝanĝiĝis je sia funkcio, krom en vesto-farado kaj dekoracio, brokatoj estis uzataj ankaŭ en bindado de libroj kaj

penrajotapetado. Sekve aperis en tiu periodo maldika brokato nomata Ming-brokato.

En Ĉing-dinastio (1644 — 1911) oni brokis ĉefe per antikvecaj desegnoj. La plej famaj estis brokatoj produktitaj en Nankino kaj Siĉŭan. La brokatoj de Nankino estis dikaj, pezaj, kaj la floroj portis solenecon. Unu koloro entenis multajn nuancojn, kiuj impresis per arta efekto de tuĉado. Brokatoj de Suĝoŭ estis maldikaj kaj molaj, la elegantaj floroj karakteriziĝis per la stilo de Song-dinastio.

Brokanta virino de jaŭ-nacieco




En la regionoj de nacimalplimultoj de Ĉinio, krom kotono, oni uzis ankaŭ silkon, lanon kaj kanabon kiel akcesorajn materialojn por brokato. Pro la malsameco de la vivkutimo kaj estetiko, brokatoj de malsamaj naciecoj portis unikajn gustojn specifajn por la nacieco kaj loko. Famon ĝuas la brokatoj de la naciecoj ĝuang, taj, mjaŭ kaj dung.

Brokato de ĝuang-nacieco estas populara en Gŭangŝji kaj Gujĝoŭ. Tia brokato estas dika, peza, sur ili la floroj elegantaj kaj ilia koloro hela. La desegnoj prenis la formon de geometriaj figuroj, ondaj linioj kaj romboj. En brokatojn estis enteksitaj bildoj de papilioj, floroj, drakoj, feniksoj, pavo kaj leonoj.

Brokato de taj-nacieco estas populara en la regiono loĝata de taj-oj en Junnan-provinco. Ĝia ĉefa materialo estas kotono. Ĝia koloro estas monotona, sed hela. Koloroj ruĝa, nigra, blanka, flava, oranĝa, verda kaj purpura estas preferataj. Oni ŝatas broki per la figuroj de elefanto, leono, pavo, ĉevalo, floro, arbo, konstruaĵo kaj homo.


Brokato de mjaŭ-nacieco estas teksita el kotono, silko kaj lano. La bildoj temas ofte pri floro, herbo, fiŝo, insekto, besto k.a. Brokatoj de mjaŭ-nacieco dividiĝas en du specojn, la unua portas geometriajn figurojn, kaj la dua geometriajn kaj naturajn figurojn. La koloroj estas pimpaj. Koloroj punca, persika, berila, oranĝa kaj purpura estas ofte uzataj.

Brokato de dung-nacieco estas teksita el fadenoj nigraj, blankaj, brunaj kaj flavaj. Brokato de dung-nacieco karakteriziĝas per antikveco kaj eleganteco. La ĉefaj ornamoj estas geometriaj figuroj. La floroj kaj papilioj estas apartigitaj per ondlinioj. Kiel roĝo kaj fonto, la brokato de dung-nacieco prezentas profundan etoson. ■



Brokato kun nuboforma desegno de Han-dinastio (206 a.K. — 220 p.K.)

Brokato kun desegno de arboj, birdoparo kaj ŝafparo de Suj-dinastio (581-618)







Robo el brokato kun globforma desegno de aglo de Song-dinastio (960-1279)



Brokato kun desegno de floroj kaj feniksoj de Ming-dinastio (1368-1644)

Ŝuoj el brokato de Tang-dinastio (618-907)






Brokato farita el oraj fadenoj, kun desegno de fenikso kaj peonioj de Ĉing-dinastio (1644-1911)



Brokato de ĝuang-nacieco (Nuntempo)



Brokato de taj-nacieco
(Nuntempo)



Brokita tapiŝo de mjaŭ-nacieco
(Nuntempo)

Jang Ŭenŝuj kaj lia ostomedolita hospitalo



Jang Ŭenŝuj

Song Ŝiŭljang estas 36-jara. Kiam li estis 12-jara, lin trafis ostomedolito de la maldekstra femuralo kaŭzita de septicemio. La tuta femuro ulceriĝis, pusi kaj doloris lin neelteneble. Li vizitis plurajn famajn hospitalojn kaj estis operaciita 5-foje, pro kio li elspezis pli ol dek mil jŭanojn. Malgraŭ tio li kuŝis sur malsanulito 24 jarojn. Oni diris al li, ke en Ŝanŝji-provinco estas doktoro Jang Ŭenŝuj, fakulo pri ostomedolito. Tial kun malgranda


espero li venis de Ĝjilin-provinco, la Nordoriento de Ĉinio, al la ostomedolita hospitalo en Ĝjiŝan-gubernio, Ŝanŝji-provinco, januare de 1988. Post du monatoj mi renkontis Song dum mia vizito al la hospitalo. Tiam li jam povis mem iri. Li kun ĝojo diris al mi, ke post nelonge li elhospitaliĝos.

La hospitalo estas ĉin-medicina faka hospitalo funkciigata de kamparanoj sur la Leŭsa Altebe-


najo en suda Ŝanŝji-provinco. La hospitalo konsistas el unu sinteza ambulatorio kaj 5 malsanulaj domoj. En la vasta korto prosperas ombroriĉaj arboj, koketas kioskoj kaj refreŝigas baseno. La medio estas eleganta kaj kvieta. Antaŭe ĝi estis vilaĝa kuracejo triĉambra.

En la korto ĉie renkonteblas pacientoj promenantaj aŭ sin ekzercantaj. Mi babilis kun iu juna kamparano kun sia infaneto en la sino. Lia infano malsaniĝis je ostomedolito ĉe la maldekstra parto de la mentono. Antaŭ lia enhospitaliĝo lia mentono truiĝis pro grava ulcero. Tra la truo falis eĉ manĝaĵoj. En la hospitalo oni ŝmiris al li unĝventon kaj li resaniĝis de la ulcero post pli ol duonmonato. Iu maljunulino sciigis al mi, ke ŝia 28-jara filo suferis de ostomedolito jam plurajn jarojn kaj ne resaniĝis malgraŭ longa kuracado, sed nelonge post sia kuraciĝo en la hospitalo li povas fari fizikan ekzercadon. Dum nia interparolado kolektiĝis ĉirkaŭ ni pluraj pacientoj, kiuj unuvoĉe laŭdis la hospitalon kaj ĝian estron Jang Ŭenŝuj. Ilia parolo montris evidentan kontenton pri la bona kuracefiko.

En iu malsanula ĉambro mi renkontis 4 pacientojn, kiuj venis el 4 provincoj. Ĉi tie la enhospitaliĝintoj preskaŭ senes-



Jang Ŭenŝuj (maldekstre) faras operacion.



Jang Ŭenŝuj (meze) ekzamenas pacienton.

cepte estas senefike kuracitaj en grandaj urbaj hospitaloj. Sed kial tiu ĉi kampara malgranda hospitalo estas tiel eminenta en kuracarto? Mia intervjuo al Jang Ŭenŝuj, fondinto kaj estro de la hospitalo, solvis mian demandon.

Jang estas pli-ol-40-jara, altstatura kaj graseta. Li estas simpla, honesta kaj neparolema. Li perdis 4 el siaj fingroj en akcidento, kiam li estis knabo. Li devenas ne de medicinista, sed de kamparana familio. 18-jara, li per eminentaj

poentoj trapasis la eniran ekzamenon al higiena lernejo, kiu tamen ne akceptis lin pro lia kriplesco. Kun forta aspiro al kuracistiĝo kaj firma volo multajn ĉin-medicinajn verkojn li studis entuziasme dum terkulturado. Kaj iom post iom li posedis la sciojn por kuraci en la vilaĝa kuracejo kaj bone sciis fari 150 specojn de piloloj, unĝentoj, granoloj kaj medicinaĵa pulvoro.

Iu hazarda kazo puŝis Jang sur la vojon al kuraco de ostomedolito. Tio okazis en la aŭtuno de 1967. Iu 12-jara knabino de najbara vilaĝo suferis de abscesa ostomedolito ĉe la dekstra dikfingro kaj pro tio ŝi estis amputita je falango. Post nelonge la malsano reatakis ŝin kaj kuracisto rekomendis al ŝi ricevi plian amputon. Jang ŝmiris ŝin per medikamento preparita de li mem kaj preskribis al ŝi tizanon senfebrigan kaj sentoksigan. Pasis 8 monatoj, tute resaniĝis la knabino. Tamen post nelonge per la sama metodo li kuracis du malsanulojn de ostomedolito, sed akiris nenian efikon. De tiam li dediĉis sian tutan energion al studo kaj kuraco de ostomedolito.

Pasis pli ol 20 jaroj, Jang Ŭenŝuj legis multajn klasikajn verkojn pri la ĉina medicino, kolektis popularajn preskribojn kaj mem preparis medikamentojn. Li faris provon sur malsanaj azeno, hundo kaj leporo kaj operacion sur siaj vizaĝo kaj kruro. Por levi kuracefikon kaj disvolvi la vilaĝan kuracejon iom post iom en fakan hospitalon pri ostomedolito, kiu povos akcepti kaj kuraci pli da pacientoj, li spertis penigan esploradon. Nun lia hospitalo kun pli ol 700 malsanulaj litoj famiĝis tra la tuta lando.

Jang kaj la de li fondita hospitalo akceptis kaj kuracis 11 500 malsanulojn el multaj lokoj de la lando kaj la simptomo de 97% de la malsanuloj malgraviĝis, 88.5% resaniĝis kaj nur 6.8% havis recidivon. El ili rezervis siajn

membrojn pli ol 3 000 malsanuloj, al kiuj aliaj hospitaloj rekomendis amputiĝi je la membroj. Iu ujugura knabino, kiu suferis de ostomedolito, estas fama amatora dancistino. Ŝi estis plurfoje operaciita eksterlande, sed la operacio ĉiufoje malsukcesis. Kuracistoj rekomendis, ke ŝia malsana gambo estu amputita. Sed kiel povus lasi amputi ĝin la knabino, kiu rigardas dancon kiel sian duan vivon. En malespero ŝi venis al doktoro Jang kaj, post 2-monata kuracado ĉe li, ŝia gambo estis savita. Por esprimi sian dankon al doktoro Jang kaj la hospitalo, ŝi kun ĝojo prezentis al ili dancon unufoje post la resaniĝo. La hospitalo de Jang Ŭenŝuj donis la kuraĝon daŭre vivi al tiuj, kiuj eĉ volis sin mortigi informiĝinte, ke oni amputos al ili membrojn.

En multjara klinika praktikado Jang senĉese resumis siajn spertojn, publikigis pli ol 20 disertaciojn kaj verkis "Terapeŭtiko de Ostomedolito" kaj aliajn du specialajn librojn. Li estis engaĝita kiel membro de la Medicina Akademio sub la Higiena Ministerio de Ĉinio kaj estis rigardata kiel unuaklasa fakulo pri ostomedolito en nia lando.

"Kio estas ostomedolito?" mi demandis doktoron Jang. Laŭ la medicina teorio li pacience klarigis al mi, ke ostomedolito ordinare estas nomata ostoputriĝo. Ĝi estas osta infekto kaŭzita de pusigaj bakterioj. Ĝi estas ekstreme malutila al la homa sano. Pro ĝia komplikajo malsanuloj iafoje kripliĝas por la tuta vivo. Ĝi estas malpli danĝera nur ol ostomo en la sfero de ostologio, tre malfacile kuracebla kaj facile recidiva. Ostomedolito povas kaŭziĝi pro neĝustatempa kuracado de vundo, neefika kuracado de ostorompiĝo, osta tuberkulozo aŭ hematogenea ŝanĝiĝo. 75% de la malsanuloj de ostomedolito estas gejunuloj kaj geknaboj. Ĝia morbokvanto en la kamparo estas pli granda ol tiu en la urboj.

La malsanuloj de ostomedolito suferas de vunda putriĝo, senĉesa pusado kaj neeltenebla doloro. Ĝenerale, la okcident-stilaj kuracistoj amputas al ili la malsanajn membrojn, kio kompreneble kaŭzas dumvivan suferon al la malsanuloj. Doktoro Jang diris al mi, ke ili kuracas per kombinado de la ĉina medicino kun la okcidenta. Kvankam la patologia ŝanĝiĝo vidiĝas nur en parto, tamen oni devas fari dialektikan kuracadon konsiderante la tuton. Laŭ konkretaj statoj kaj malsamaj periodoj de la malsano, oni konsideras kaj parton kaj la tuton de la korpo, kombinante kuracadon de fenomenaj malsano kun tiu de esenca, kaj kuracadon de la ekstero kun tiu de la interno. En kuraco ili aplikas samtempe ĉinajn medikamentojn kaj operacion. Ĉe la malsanuloj de kronika pusa ostomedolito ilia tutkorpa malsan-rezista povo malleviĝas, la absceso longatempe pusa kaj ne malgraviĝas, do kuracante tiujn malsanulojn oni ne devas turni sian atenton nur al la malsanaj lokoj, sed pliigi la organisman funkcion en la tuto kaj toniki kaj la vitalan energion kaj la sangon por levi la malsan-rezistan povon de la malsanuloj. Koncerne la malsanulojn, kies organa funkcio ege malfortiĝas, oni devas ĉefe kuraci la internon kaj poste la eksteron. Se estas grava la loka patologia ŝanĝiĝo, oni do devas turni sian ĉefan atenton al kuraco de la ekstero.

Rilate multajn malsanulojn de pusa ostomedolito, oni povas apliki neoperacian terapion, t.e. preniĝi al ili medikamentojn ĉinajn kaj okcidentajn, ŝmiri unĝventon kaj medicinaĵan pulvoron. Se grandarea nekrozo aperas, medolkanalo estas barita kaj absceso pusa longatempe, oni do devas fari operacion al ili por komplete neniigi la fokuson de afekcio. Estas mirige, ke post la operacio ili ne suturas la tranĉvundon, sed ŝmiras ĉinan medikamenton por kreskigi la

karnon kaj por eviti formiĝon de la morta spaco de la osta kaj mola histo kaj eviti recidivan ulceron.

Toniki la renoj estas unu el la gravaj principoj por kuraci ostomedoliton. Laŭ la teorio de la ĉina medicino oni opinias, ke la renoj regas ostojn, en la renoj estas esenca kerno, kiu naskas medolon kaj la medolo nutras ostojn. La longa daŭrado de ostomedolito povas kaŭzi eksudon de la vitala energio de la renoj kaj perdiĝon de vitala suko de la renoj, tial toniki vitalan sukon de la renoj estas baza principo por kuracado.

En la lastaj jaroj doktoro Jang inventis ankoraŭ dekelkajn specojn de novaj medikamentoj, kiaj ulcer-foriga kaj muskolkreskiga pulvoro, muskol-kreskiga kaj vundoresaniga pulvoro, ostofortiga unĝvento. Ili ĉiuj estas efikaj por kuraci ostomedoliton.

La hospitalo fondita de Jang Ŭenŝuj iom post iom disvolviĝis dank' al liaj originalaj kuracmetodoj kaj serioza scienca sinteno en la kuracado. Malgraŭ ke ili kiel eble plej multe pliigas malsanulajn litojn, plibonigas kaj akcelas la kuracan procedon, troviĝas grandnombraj malsanuloj, kiuj atendas la kuracon. Ĝis nun ili ricevis sume 150 000 leterojn de ĉiuj anguloj de la lando por peti kuracon kaj medikamenton. Doktoro Jang diris: "Nia vilaĝo, kie situas la hospitalo, havas apartan simpation al la malsanuloj de ostomedolito. En 1976, kiam en nia hospitalo ankoraŭ ne estis malsanulaj litoj, la malsanuloj povis loĝi nur en hejmoj de kamparanoj. Tiam en nia vilaĝo estis pli ol 180 familioj, preskaŭ en ĉiu hejmo loĝis paciento. Nun dank' al la fervora subteno de la registaro kaj niaj samvilaĝanoj, la hospitalo atingis la nunan skalon. Ni planas konstrui alian farmacian fabrikon, por ke ankaŭ alilokaj malsanuloj povu preni tiajn medikamentojn." ■

Pri ĉinaj medicinaĵoj (I)

de ĜANG ĜAŬJUN

Origine ĉinaj medicinaĵoj nomiĝis *bencaŭ* ĉin-lingve. La plej frua farmakopeo "Ŝennong Bencaŭ Ĝing" de Ĉinio estis verkita en 200 a.K. Ankaŭ aliaj ĉinaj farmaciaj verkoj, kiaj "Bencaŭ Gangmu" kaj "Bencaŭ Bejjaŭ" de diversaj dinastioj, uzis la nomon *bencaŭ*.

Nur lastatempe aperis la termino ĉina medicinaĵo por distingi ĝin de la okcidentaj medicinaĵoj. La ĉinaj medicinaĵoj estas naturaj aŭ simple prilaboritaj, kiujn diversaj ĉinaj naciecoj trovis, aplikis kaj foj-foje kompletigis en la praktiko por preventi kaj kuraci malsanojn gvidate de la fundamenta teorio de la ĉina

farmakologio.

Ankaŭ la ĉina medicinaĵo ekhavis sian farmakologian sistemon, dank' al la disvolviĝo de la fundamenta teorio de ĉina medicino kaj ĝia klinika praktiko. Nur koninte la fundamentan teorion, oni povas scii kiel efike apliki la ĉinajn medicinaĵojn en la praktiko, alie oni malsukcesos.


Legendo diras, ke Ŝennong gustumis sennombrajn herbojn por koni drogherbojn. La farmakopeo "Ŝennong Bencaŭ Ĝing" registris 365 drogherbojn kaj nun estas pli ol 5 000 specoj de ĉinaj medicinaĵoj. Iliaj nomoj estas diversaj kaj plejparte havas sian

apartan originon kaj signifon.


Laŭ la fundamenta teorio de la ĉina medicino ĉinmedicinaj kuracistoj diagnozas pacieron per observo, flaro, demando kaj pulsopalpo (Bonvolu legi la artikolon en n-ro 1,1988, sub la sama rubriko), elektas konvenajn herbdrogojn surbaze de la ĉina farmacia teorio kaj faras preskribon, por ke la paciento estu efike kuracata.

La ĉinmedicinaj kuracistoj preskribas medikamentojn surbaze de la ĉina farmacia teorio, kiu inkluzivas la doktrinojn pri kvar ecoj, pri kvin gustoj, pri leviĝo kaj malleviĝo, pri floro kaj sinko de


Gliciriza radiko



Fritilario



Koptido




droga efiko, pri *gujĝing-o* (*gujĝing* signifas specifan ekikon de medicinaĵo sur *ginglŭo* aŭ viscera organo), kunaranĝo kaj malpermesoj de medicinaĵoj.

La kvar ecoj estas la malvarma, varma, varmeta kaj malvarmeta trajtoj de ĉinaj medicinaĵoj. Varmo kaj varmeto estas malsamaj kategorie kiel malvarmo kaj malvarmeto kaj diferencaj en la grado inter si. Juĝate laŭ la doktrino pri *jin* kaj *jang*, malvarmo kaj malvarmeto apartenas al *jin* kaj varmo al *jang*.

La kvar ecoj de medicinaĵoj estas relativaj al malvarmo kaj varmo de la malsano. Laŭ la ĉinmedicino oni dividas la malsanojn en varman kaj malvarman kazojn. Ĝenerale dirite, la medicinaĵoj por kuraci varmajn malsanojn plejparte estas trajte malvarmaj aŭ malvarmetaj, ekz., koptido, skutelanio, felodendro (*Phellodendri*), lonicero k.a. povas forigi internan fajron kaj febron kaj sentoksigi; la medicinaĵoj por kuraci malvarmajn malsanojn plejparte estas varmetaj aŭ varmaj trajte, ekz., efedro, cinamo, akonita radiko, seka zingibro k.a. povas varmigi *jang*-energion kaj forigi internan malvarmon kaj malsekecon.

Krome, iuj medicinaĵoj estas mildaj nature, ili estas aŭ varmetaj kaj nesekigaj, kia *dangŝen-o* (*Codonopsis pilosulae*), aŭ malvarmetaj kaj nemalvarmaj, kia bupleŭro. Sed fakte, ili estas aŭ iom pli ol varmetaj aŭ iom pli ol malvarmetaj, sed ne liberigis sin de la kvar ecoj. Tial la farmakopeoj de ĉinaj medicinaĵoj indikas la naturon de ĉiu medicinaĵo.

Kvin gustoj signifas gustojn pikan, salan, acidan, amaran kaj dolĉan de ĉinaj medicinaĵoj. Krome, ankaŭ iuj medicinaĵoj sen klara gusto estas rigardataj kiel dolĉaj. Laŭ la doktrino pri *jin* kaj *jang*, pika kaj dolĉa gustoj apartenas al *jang*, dum acida,



Ginsengo



Saŭsureo

amara kaj sala gustoj al *jin*, ĉiu kun sia aparta efiko.

La medicinaĵoj kun pika gusto efikas por forigi eksterpatogenajn faktorojn atakantajn la homan eksterajon, reŭmatismen, vigligi vitalan energion kaj sangocirkuladon, solvi cervikan tuberkulozan limfan nodon kaj stagnaĵon formitan de patogenaj faktoroj. Mento kaj efedro estas ofte uzataj en kuracado de malvarmumo, ligustiko (*Ligusticum wallishii*) kaj lapa saŭsureo estas uzataj por kuraci sangokoagulon kaj stagnadon de vitala energio. La medicinaĵoj kun dolĉa gusto estas tonikaj kaj mildigaj de malsanoj. Ili estas ofte uzataj por kuraci astenian malsanon. Ekz., astragalo estas tonika al vitala energio kaj preparita *rehmannio* (*Rehmannia glutinosa*) estas tonika al sango. La medicinaĵoj kun malforta gusto, kiel koiksa semo kaj porofungo (*Poris cocos*), estas ofte uzataj por forigi malsekecon en la korpo kaj urinigi. La acidaj medicinaĵoj estas adstringaj kaj retenemaj je sango kaj vitala energio. La amaraj medicinaĵoj povas forigi febron, patogenan manifestiĝon de interna varmo kaj humidecon en la korpo kaj tiuj salaj povas

solvi stagnaĵon kaj laksetigi.

La ĉinmedicinaj registroj pri gusto de ĉiu medicinaĵo venis de gustumado kaj analizado pri ĝia klinika efiko. Iuj medicinaĵoj havas pli ol unu guston, ekz., cinamo estas pika kaj dolĉa, skrofulario amara kaj sala kaj efedro pika kaj amara. Ankaŭ iliaj efikoj estas komplikaj.

Ĉiu ĉina medicinaĵo havas sian econ kaj guston, tial la ĉinmedicinaj kuracistoj devas fari sintezan konsideron pri preskribo. Zingibro estas pika, astragalo dolĉa, ŝelo de oficiala magnolio amara, skizandro acida kaj juna cervokorno sala. Ili ĉiuj estas varmetaj kaj havas malsamajn gustojn, tial ankaŭ iliaj funkcioj estas diferencaj.

Malsamaj malsanoj ofte havas malsamajn simptomojn: supren (vomo, tuso, astmo), malsupren (lakso, viscera ptozo), eksteren (ŝvitado kaj febro) kaj internen (ekzantemoveneno aŭ ekstera malsano evoluas internen). Kontraŭ la supre diritaj simptomoj, la efiko de ĉinaj medicinaĵoj en la korpo estas diferenca. Pri tio traktis la teorio de leviĝo kaj malleviĝo, flaso kaj sinko de ĉinmedicinaĵa efiko. Sekve de tio,

en klinika praktiko la ĉin-medicinaj kuracistoj devas elekti medicinaĵojn, kiuj kontraŭas al la malsana tendenco kaj havas efikon de leviĝo kaj malleviĝo, flosa kaj sinko.

“Leviĝo” havas la sencon de supreniĝo. La ĉinaj medicinaĵoj efikaj por kuraci malsanon malsupren aŭ tiun ĉe supra aŭ malprofunda parto, plejparte havas la funkcion de leviĝo. Kaj la leviĝo kaj flosa estigitaj de la medicinaĵoj havas similan efikon.

“Malleviĝo” ĉi tie havas la sencon de malsupreniĝo. La ĉinaj medicinaĵoj efikaj por kuraci malsanon supren kaj tiun ĉe malsupra aŭ interna parto, plejparte havas efikon de malleviĝo. Malleviĝo kaj sinko estigitaj de la medicinaĵoj havas similan efikon.

La leviĝo, malleviĝo, flosa kaj sinko de la ĉinaj medicinaĵoj havas certan rilaton kun iliaj gusto kaj pezo. Ĝenerale, la ĉinaj medicinaĵoj fortodoraj, malfortgustaj kaj malpezaj, kiaj floroj aŭ folioj de planto, kaj la medicinaĵoj kun varma aŭ varmeta eco, pika aŭ dolĉa gusto, plejparte havas efikon de leviĝo kaj flosa; kaj la ĉinaj medicinaĵoj malfortodoraj, fortogustaj kaj pezaj, kiaj semo, frukto de planto, ercoj kaj konko, ostoj kaj korno de besto, kaj tiuj malvarmaj aŭ malvarmetaj, acidaj, amaraj aŭ salaj plejparte havas efikon de malleviĝo kaj sinko.

Gujĝing parolas pri elekta efiko de ĉinaj medicinaĵoj al malsanoj de iuj *ĝinglŭo*-oj kaj visceraj organoj de homa korpo. Iuj ĉinaj medicinaĵoj senfebrigaj kun malvarma eco havas efikon aŭ sur la pulmoj aŭ sur la hepato. La doktrino pri *gujĝing*-o formiĝis surbaze de sistema resumado de la efikoj de diversaj ĉinaj medicinaĵoj sur malsamaj korpopartoj. La doktrino plenigis la mankon de la kvar ecoj, kvin gustoj, leviĝo, malleviĝo, flosa kaj sinko de la

ĉina medicinaĵo. Ĉar ĉina medicinaĵo varmiga al la lieno eble ne povas varmigi la renojn, ĉina medicinaĵo senfebriga al la hepato eble ne povas forigi la febron de la koro, kaj ĉina medicinaĵo foriganta la malordigon de la gastrofunkcio eble ne povas irigi la pulman funkcion malsupren.

La doktrino pri *gujĝing*-o de la ĉina medicinaĵo bazas sin sur la doktrinoj pri *ĝinglŭo*-oj kaj visceroj. Laŭ la efika kuraco de iu ĉina medicinaĵo sur iu *ĝinglŭo*-o kaj koncerna viscera malsano, ĝi faras klasifikon de la ĉinaj medicinaĵoj. Multaj ĉinaj medicinaĵoj havas multspecan efikon.

La ĉina farmakologio atentigas ankaŭ pri kunaranĝo kaj malpermeso de ĉinaj medicinaĵoj. Ĝi postulas, ke la ĉin-medicinaj kuracistoj bone kunaranĝu drogherbojn de pli ol du specoj por akordigi iliajn ecojn kaj plifortigi la efikon. Samtempe, oni devas distingi la ĉinajn medicinaĵojn netaŭgajn en kuna uzo de unu preskribo.

Estas kvin kunaranĝaj manieroj de ĉinaj medicinaĵoj: Unuopa efiko (dozo el unu drogherbo), reciproka intensigo (dozo el duspecaj drogherboj efike interligitaj por pliigi la efikon), reciproka akordigo (dozo el duspecaj drogherboj efike interligitaj por akordigi la efikon), reciproka regado (dozo el plurspecaj drogherboj, inter kiuj unu limigas venenon aŭ fortecon de alia) kaj reciproka eliminado (unu medicinaĵo de la dozo eliminigas la venenan reakcion de la alia). Estas du malpermesoj en la kunaranĝo de ĉinaj medicinaĵoj: reciproka malpliigo (unu medicinaĵo malfortigas aŭ retenas la efikon de la alia) kaj reciproka pliigo de veneno (duspecaj drogherboj en kuna uzo naskas fortan venenon aŭ malbonan reakcion). La ĉin-medicinaj kuracistoj de diversaj dinastioj resumis multe da drogherbo-paroj en sia praktiko de kunaranĝo. ■

KORESPONDI DEZIRAS

- * Xu Runjiu, 26-j., dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj kaj interŝanĝi pm, bk kaj E-gazetojn. Certe respondos. Adr.: Hong Qun (Xu Runjiu), Hefei Ranzhichang Zhixian Chejian, Hefei, Anhui, Ĉinio.
- * 25-j. poŝt oficisto dez. kor. tm. pri diversaj temoj, interesiĝas pri kolombo, mobilo kaj muziko, interŝanĝas librojn, gazetojn ktp. Adr.: Zhou Qiang, Taizhou Youdianju, Zhejiang, Ĉinio.
- * Feng Weidong, 20-j., dez. kor. tm. Esperante, angle kaj ĉine pri ĉiuj temoj, kaj interŝanĝi pm, pk, bk, kalendarbildojn ktp. Adr.: Huangshan Linye Xue-xiao, Tunxi, Anhui, Ĉinio.
- * 25-j. impostisto dez. kor. kun filatelistoj por kolekti neuzitajn pm kaj aliajn filatelaĵojn pri Esperanto, internaciaj jaroj kaj festoj, hundoj ktp. Ankaŭ pm-blokojn pri birdoj kaj mondfamaj pentraĵoj. Adr.: Shan Xianhuai, 130300 Dehui Xianwei Dangxiao, Jilin, Ĉinio.
- * Liu Jianxin jam translokiĝis al Huaxue Yaojichang, Huabei Youtian, Renqiu, Hebei, Ĉinio, kaj volas kor. kun ĉiuj gesamideanoj de ĉiuj landoj.
- * Helmut Eschen, Helsinkier Str. 83/703, DDR-Rostock-22, 2520, dez. kor. pri amo kaj amikeco kun fraŭlinoj 20-30j.
- * Knabino dez. kor. kun ĉiuj E-istoj, kolektas pm kaj bk. Adr.: Majlath Orsolya, Levelek, Mikszath u 34, 4555 Hungario.
- * 20-j. knabo dez. kor. kun ĉinaj esperantistoj, kolektas pm kaj bk. Adr.: Turzo Antal, Zsombo, Telszaladulas 70, H-6792, Hungario.
- * Dez. kor. kun ĉinaj lernantoj. Adr.: Paleso Annamaria, Jaszbereny 5100, Eke utca 1, Hungario.

Sportoj populariĝas en Ŝunde-gubernio

Dum la Kvina kaj la Sesa Tutlandaj Sportaj Kunvenoj okazintaj respektive en 1983 kaj 1987, la sporta delegacio de Gŭangdong-provinco okupis la unuan lokon laŭ la gajnitaj totala poentaro kaj la oraj medaloj. Multaj personoj estas en pripenso: Kial aperis tiel multe da elstaraj sportistoj en Gŭangdong-provinco?

En Ĉinio estas fama diro: Profundaj radikoj prosperigas la foliaron. Eminentaj sportistoj venis de sennombraj ordinaraĵaj sportistoj. La diversaj eminentaj sportaj trupoj de Gŭangdong-provinco disvolviĝis surbaze de la popularaj sportaj aktivadoj de la provinco. La popularaj sportoj de Ŝunde-gubernio estas miniaturo de tiuj de la provinco.

En la gubernio popularaj sportaj aktivadoj disvolviĝas en urbetoj, vilaĝoj, lernejoj, fabrikoj, institucioj k.a. kaj sinsekve fondiĝis sportaj asocioj de atletiko, tabloteniso, naĝo, akvopilko, korbopilko, luktarto, ŝakoj, drakboato, longdistanca kuro kaj maljunuloj. Ili vaste mobilizas kaj organizas la loĝantojn partopreni en diversaj sportaj aktivadoj. Nun, ĉ. 300 000 loĝantoj partoprenas en korpoekzercado 84.6% de la elementaj lernejoj kaj 86.8% de la mezlernejoj atingis la sportajn normojn difinitajn de la ŝtato.

Laŭ statistiko, en la lastaj jaroj la sportistoj de Ŝunde-gubernio gajnis 35 unuajn lokojn kaj 39 duajn lokojn en sportaj konkursoj super la gubernia. En la Sesa Tutlanda Sporta Kunveno 20

sportistoj de la gubernio partoprenis en la konkursoj de tabloteniso, kanuo, pirogo, konkurboato, korbopilko kaj akvoskiado, kaj gajnis 6 orajn kaj 5 arĝentajn medalojn, kio okupis la unuan lokon inter la gubernioj de la tuta lando.

Oni diras, ke Ŝunde-gubernio havas "drakon" kaj "fenikson" en sportaj konkursoj. "Drako" estas la vira teamo de drakboato formita el kamparanoj, kiu unuafoje reprezentante Ĉinion partoprenis en la internacia sporta konkurso kaj multfoje gajnis la ĉampionecon en internaciaj drakboataj konkursoj. "Fenikso" estas la virina korbopilka teamo de Ĝjun'an-distrikto en la gubernio. De 1983, ĝi sinsekve en kvar jaroj


partoprenis en la provinca kamparana korbopilka konkurso kaj 4-foje gajnis la ĉampionecon. Ĝi partoprenis ankaŭ en la kamparaina korbopilka unuiĝa konkurso de la aŭtonoma regiono Gŭangŝji, provincoj Hunan kaj Gŭangdong kaj gajnis 9 venkojn en la 9 matĉoj.

En septembro 1984, ĝi gajnis la ĉampionecon en la Unua Provinca Kamparana Korbopilka Konkurso "Riĉrikolta Pokalo". Krome, en julio 1984 kaj marto 1985 ĝi estis invitita al Aŭmen kaj Hongkong, tie konkursis dufoje kaj gajnis venkon.

Ŝunde-gubernio sendis 91 sportistojn al la sportaj lernejoj en Gŭangdong-provinco kaj la urbo Foŝan kaj liveris sume 116 sportistojn al la ŝtato. 13 el ili

La Virina Korbopilka Teamo de Ĝjun'an en Ŝunde





Drakboata konkurso en Ŝunde

fariĝis ŝtataj elstaraj sportistoj kaj pli ol dek sportistoj reprezentante Ĉinion partoprenis en internaciaj konkursoj.

Por garantii glatan disvolviĝon de la sportaj aktivecoj de popolamasoj, la gubernio donis grandan atenton al la konstruado de sportejoj kaj koncernaj instalaĵoj. En la lastaj jaroj, la gubernia registaro jam asignis ĉ. milionon da jüanoj por konstrui sportejojn. En la gubernio troviĝas 8 normaj naĝbasenoj, 3 stadionoj ĉiu kun kurejo de 400 metroj, 27 stadionoj ĉiu kun kurejo de 200 metroj, 645 korbopilka luddejoj (interalie 34 luddejoj lumigitaj), pli ol 700 grandaj kaj malgrandaj drakboatoj. Ili pretiĝis bonajn kondiĉojn por disvolvi sportajn aktivecojn

de popolamasoj.

Sistemo de postlabora sporta trejnado nun formiĝis fundamente en Ŝunde-gubernio. La gubernio kaj ĝiaj 12 distriktoj fondis postlaboran sportan lernejon. La gubernia postlabora sporta lernejo havas kvar trejnajn teamojn de tablotenis, naĝo, akvopilko kaj korbopilko kun 200 lernantoj. La postlabora sporta lernejo de Daljang-distrikto fondis kvin trejnajn kursojn kaj la distrikta registaro ĉiujare asignis al ili portrejnajn sumojn de 9 000 jüanoj. Tiu ĉi lernejo jam liveris 14 elstarajn sportistojn al provincaj sportaj teamoj

La sporta movado en Ŝunde-gubernio ne plu estas nur afero de

malmultaj homoj, sed disvolviĝas al plua sociigo kaj sistemigo. Ĉiam pli multaj homoj partoprenas en la sportaj aktivecoj. Ekzemple, en la Sunde-a Sukera Fabriko estas tre viglaj la popularaj naĝo kaj longdistanca kuro, scipovas naĝi 75% de la malpli-ol-35-jaraj oficistoj kaj laboristoj. Sole en 1987, la fabriko okazigis sportan kunvenon 7-foje. Ĝiaj produktado kaj sportado estas bone kondukataj. La volana teamo de la fabriko gajnis la viran kaj la virinan teamajn ĉampionecojn en la tuta gubernio kaj la piedpilka teamo la subĉampionecon. Ĝia laboristo Gan Ljan'en gajnis la ĉampionecon de 1 500-metra vira longdistanca kuro de membro-amputa A-6-a klaso, en la Handikapula Sporta Kunveno de la Sud-Pacifika Regiono okazinta en Pekino, rompiinte la landan rekordon. Li gajnis 3 orajn medalojn respektive de 800-metra kaj 1 500-metra kuroj kaj tablotenis en la Unua Provinca Handikapula Sporta Kunveno. En la fabriko estas 131 tiaj elstaraj sportistoj. La sportaj aktivecoj altigis la korpan kvaliton de laboristoj, grandskale malpliigis la ripoz-petantojn pro malsaniĝo, dum labortagoj de la oficistoj kaj laboristoj de la fabriko atingis 96% en 1987.

La vilaĝo Ĉenĉong de la gubernio estas rimarkinda ekzemplo. Ekde 1981 tiu vilaĝo ĉiujare okazigis sportan kunvenon kaj tradicion montgrimpon en la 30-a de junio. La vilaĝo konstruis novan sintezan stadionon kun instalaĵoj de korbopilko, flugpilko, volano kaj tablotenis.

Estas honore al la sportaj amatoroj de Ŝunde-gubernio, ke ilia komuna klopodo faris la gubernion tutlande avangarda en sportado. Nun ili entuziasme faras sportan trejnadon por gajni pli grandan sukceson en la Unua Ĉina Kamparana Sporta Kunveno okazanta en Pekino en la kuranta jaro. ■

Antikva ĉina Rubik-kubo — Liŭtong


En 1974 hungara arkitekto inventis intelektan ludilon, kiun oni nomas Rubik-kubo poste. Ĝi estas kubo el 27 interligitaj kubetoj. Ĉiu el ĝiaj ses edroj havas sian apartan koloron. Post kiam ĝiaj koloroj estas ŝanĝitaj, oni malfacile denove akiras la originalan formon. Post sia naskiĝo Rubik-kubo tuj ekfuroris tra la tuta mondo. Oni konkuras en la intelekta amuzo.

Jam antaŭ pli ol 2 000 jaroj en Ĉinio aperis intelekta ludilo simila al la nuna Rubik-kubo, t.e. Liŭtong. Legendo diras, ke en la Periodo de Printempo kaj Aŭtuno (770-476 a.K.) arkitekto-majstro Lu Ban faris ĝin por ekzameni sian filon pri lia saĝo. Liŭtong estas delikata kaj firma ligna ludilo konsistanta el 6 prismoformaj samgrandaj lignaj kuboj aĵuritaj en la mezo interne (Bildo 1).

Lu Ban malmuntis la ludilon antaŭ la okuloj de sia filo kaj postulis, ke tiu denove muntu ĝin antaŭ la sekvanta tagiĝo laŭ la originala formo. Liŭtong kvankam konsistas nur el 6 lignaj pecoj, tamen oni povas per diversaj manieroj kombini la aĵuritajn partojn. Laŭ takso oni povas munti ĝin per 3 milionoj da manieroj, tamen sukcesiga estas nur unu maniero. Se oni provas unu manieron post alia, tio bezonas monaton. La filo de Lu Ban estis saĝa, li sukcese muntis la ludilon antaŭ la tagiĝo kaj estis laŭdita de sia patro.

Liŭtong estas scienca kaj strikta en la strukturo. La bildo 2 montras ĝian mirindan strukturon. Se tio plaĉas al vi, do preparu 6 lignajn pecojn laŭ la bildo kaj muntu ĝin. Vi povas provigi ankaŭ viajn familianojn kaj


Bildo 1




amikojn en tio. Se vi sukcesos en tri horoj, vi do estas laŭdinda. Se vi tion sukcese faros en 2 horoj, vi do rajtas fieri pro via riĉa imagopovo kaj alta inteligenteca kvociento. Se vi ne sukcesos en pluraj horoj, vi ne deprimitiĝu, eble viaj manieroj estas neĝustaj. Portempe forlasu ĝin kaj vin okupu pri io alia kaj poste faru refojan provon, kio eble sukcesigos vin.

Se vi neniel sukcesos, ne koleru. Rigardu la bildon 3. Muntu ĝin unue laŭ la bildo kaj poste malmuntu ĝin. Post kelkaj tagoj denove muntu ĝin sen rigardi la bildon. Karaj gesamideanoj, testu vian inteligentecan kaj talenton. Sukceson al vi! ■

Bildo 2



Bildo 3



Esotera disĉiplo

(Novelo)



Ĉiuj vizitantoj al la urbeto venis al la sama konkludo, ke la urbanoj estas frandemaj.

Tio ja estas vera. La urbanoj estas ne nur frandemaj, sed ankaŭ havas bonan apetiton. En ĉiuj stratoj estis malfacile nombreblaj manĝejoj kaj restoracioj de ĉasaĵoj. De mateno ĝis vespero la restoracioj estis plenaj de klientoj. Forlasante manĝejon, ili frotis la brilajn grasajn lipojn, ruktis en plezuro, paŝadis sur la brileta strato ŝtonpavimita, kaj la mieno montris ilian sperton en frandado.

Frandemo kondukis al kulinara rafiniteco. Tie servas unikaj restoracioj speciale de rizaj vermiĉeloj, baŭzi-oj¹ aŭ brezitaj viandoj. Kaj la plej alloga estis anasaĵo de la restoracio Juci.

Procedo de preparado de la anasaĵo estas tre komplika. La plado plaĉas per riĉa nutro, bela koloro, agrabla odoro kaj gustoj dolĉa, acida kaj pika.

Kaj la plej kompetenta kuiristo por la anasaĵo kun sangosaŭco estis Okbrakulo. Tion bone sciis la tuta urbanaro.

Kiu estis Okbrakulo? Kian magian lertecon li posedis?

Fakte li estis ordinara homo, Malalta kaj marasma, sed liaj

brakoj estis iom pli longaj ol tiuj de aliuloj, malsimetriaĵoj al la korpo. Li, rapidmova, povis en mallonga tempo pleni la tablon per multaj bongustaj pladoj. Ĉiuj vizitantoj al la urbeto deziris ĝui lian pladon el anasaĵo, dum la urbanoj fieris pro la plado.

Okbrakulo heredis la profesion. Laŭdire la restoracio estis fondita de prapatro de lia familio. Kaj Okbrakulo heredis ĝin de sia patro jam antaŭ 45 jaroj.

Bedaŭrinde nun li estis katenita de malsano en la lito kaj oni kredis, ke li vivos nelonge.

Li estis subite trafita de malsano. Tiun tagmezon li demonstradis tranĉmanieron en la kuirejo al sia 18-a disĉiplo Ĝjaŭ Njangĵun. Subite li sentis senfortiĝon de la piedoj kaj falis. Ĝjaŭ, konsternite, forjetis la tranĉilon kaj tuj portis lin al hospitalo. Li kuŝis en la hospitalo unu monaton. Kuracisto konsilis al liaj parencoj porti lin hejmen kaj laŭeble kontentigi lin je manĝado por ŝpari la pagon por la senefika kuraco. Okbrakulo ne havis infanon kaj lin flegis la disĉiploj.

Multaj el liaj 18 disĉiploj estis laborantaj en la urbeto, kaj ili laŭvice flegis la majstron senplende. Ĝjaŭ Njangĵun ofte venis

por flegi la majstron, se nur li havis liberan tempon. Post longa klopodo li venigis vilaĝan kuraciston.

La kuracisto sidis kun fermitaj okuloj, palpis al li pulson kaj donis recepton. Li diris: "Se li apenaŭ havas apetiton, vi donu al li dekoktaĵon laŭ la recepto." Antaŭ sia foriro li venigis Ĝjaŭ antaŭ la lito kaj demonstris al li masaĝon sur Okbrakulo kaj petis Ĝjaŭ imiti lian faron. Fine li atentigis: "Masaĝu por li ĉiutage matene, tagmeze kaj vespere seninterrompe. Post du monatoj eble li fartos iom pli bone. Kaj tiam vi ne bezonos min."

Laŭ la konsilo de la herbodrogisto Ĝjaŭ ĉiutage flegis ĉe la majstro, preparante dekoktaĵon kaj akurate masaĝis por li. Liaj kunlernantoj laŭvice flegis la majstron kaj masaĝis por li same kiel Ĝjaŭ.

Pasis du-tri monatoj, sed la malsano de Okbrakulo pli kaj pli serioziĝis. Iun tagon li subite eksentis tristecon, ke la tekniko heredita de prapatro estos entombigita kune kun li, ke la restoracio Juci malaperos. Li timis, ke li ne povos trankvile iri en la transan mondon.

Li provis levi sin el la lito kaj

miriĝis de tio, ke liaj piedoj iom fortiĝis. Li movis la piedojn ekster la liton kaj atente metis ilin sur la teron, poste li apogis sin sur la litorando kaj provis stariĝi.

Ho ĉielo! Li povis fari paŝojn.

Li ekkriis de ekscitiĝo. Li kore dankis sian disĉiplon kiu senplende deoktis drogherbojn kaj masaĝis por li. "Ĝjaŭ Njanĝjun, mi ŝuldas dankon al vi!" Komplete forvaporigis lia tristo. Li sentis, ke Ĝjaŭ estas por li propra filo. Li treme movis sin antaŭen al malnova kofro, atente prenis el ĝi paketon, ŝovis ĝin en la sinon kaj kuŝiĝis en la lito por atendi Ĝjaŭ.

Ĝjaŭ venis en noktomezo.

Post reciproka saluto ili ambaŭ tenis silenton por kelka tempo, kaj ili eĉ povis aŭdi korbatojn unu de la alia.

La majstro demandis: "Njanĝjun, ĉu mi bone rilatis al vi?"

"Vi estas mia instruisto, kaj ankaŭ estos por mi patro dum mia tuta vivo."

"Mi maljuniĝis kaj volas komisi ion al vi."

"Mi dankas pro via konfido."

Okbrakulo malvolvis la paketon.

"Ha," Ĝjaŭ subite vigliĝis.

En la paketo estis flava nankeno kun grandaj ideogramoj "Anasaĝo kun sango-saŭco", kaj sube estis sigelo en antikva skribmaniero. Laŭ diro la skribaĝo estis donaco de iu reĝo migrinta ĉi tien post la disfalo de Ming-dinastio. La tuko herediĝis de generacio al generacio jam pli ol 300 jarojn kaj neniam estis montrita ekster la familio. Ĝjaŭ multe emociiĝis de dankemo.

Okbrakulo kun larmoj en la okuloj diris al Ĝjaŭ: "Njanĝjun, venu pli proksimen. Tio estas donaco de la reĝo. Foje li venis al la restoracio, kaj mia prapatro preparis por li pladon de anasaĝo

kun sango-saŭco. Tiu estis ĝia recepto notita de la prapatro. Ĝi herediĝis dum multaj generacioj kaj poste la heredigo dependos de vi."

Okbrakulo revolvis la du trezorojn kaj metis la paketon en manon de Ĝjaŭ. Ĝjaŭ genuiĝis, firme premante la paketon al la brusto.

La maljunulo faris longan elspiron kvazaŭ li demetus pezan ŝarĝon.

Ĉu pro la efiko de la recepto de la herbodrogisto aŭ pro la bona humoro ke li trovis indan heredanton, la sanstato de Okbrakulo boniĝis tago post tago. Post pliaj dudek tagoj li jam povis promeni sur strato. Tio faris sensacion en la urbeto. Liaj konatoj salutis lin kaj la aliaj konatoj, kiuj ne vidis lin, ĝojiĝis, ke ili baldaŭ povos denove ĝui la

pladon de anasaĝo kun sango-saŭco.

Ĉe tio Okbrakulo, reciprokante saluton kun la renkontitaj, afable petis ilian honoran venon al la restoracio. Fine li ĉiam aldonis per la informo, ke li jam trovis heredanton de sia tekniko.

"Ĉu vere? Kiu tiu estas?"

"Ĝjaŭ Njanĝjun."

"Ha, vi trafe elektis heredanton. Njanĝjun estas sprita kaj certe mastros la teknikon."

"Bonvenon al via honora veno."

...

Resaniĝo de Okbrakulo faris sensacion en la urbeto, kaj malkovriĝo de la skribaĝo de la reĝo antaŭ pli ol 300 jaroj boligis la urbeton. Senĉese frekventis klientoj la restoracion. Por ĝui anasaĝon kun sango-saŭco, oni



devis mendi lokon antaŭ du tagoj. Ĉiuj laŭdis la kuirarton kun admiro: “La plado meritas la laŭdon de la reĝo.”

Ĉe tio Ĝjaŭ famiĝis tra la tuta urbeto, kaj la restoracio enviinde prosperiĝis en la negoco.

De tiam la sanstato de Okbrakulo pli kaj pli boniĝis. Li promenis tien kaj ĉi tien, iris en ĉiujn butikojn kaj donis tian kaj alian instruon al siaj disĉiploj sen konsideri pri ilia sinteno, ĉar ili ĉiuj estis liaj disĉiploj, kvankam li herediĝis la recepton nur al Ĝjaŭ sola.

Foje li venis al iu restoracio kaj ĉikane kritikis la kuiradon de sia disĉiplo. Tiu senĉese jesis al lia kritiko kaj flateme diris: “Majstro, via recepto de anasaĵo kun sango-saŭco estis publikigita sur ĵurnalo.”

“Kio?”

“Ĝjaŭ Njanĝjun publikigis artikolon konigante vian recepton por preparado de anasaĵo kun sango-saŭco,” li havigis al si la ĵurnalon kaj montris al Okbrakulo, “Jen ĉi tie—‘Preparado de Anasaĵo kun Sango-saŭco’, Ĝjaŭ Njanĝjun... Bonvolu legi!”

“Ĉu vi ne scias mian aĝon? Njanĝjun... Bonvolu legi!”

“Jes,” la disĉiplo serioze legis la artikolon por li.

“Kio? Kiom da graso?”

“200 gramoj.”

“Ĉu vi ne eraris? Devas esti 250 gramoj.”

“Sed ĉi tie estas 200 gramoj. Vi mem volu rigardi.”

“Hm,” Okbrakulo koleriĝis kaj longe silentis.

Konsterniĝis la disĉiplo. Kio okazis al la oldulo?

“Kial vi ĉesis legi? Daŭrigu.”

“Jes, mi aŭdas. 400 gramoj da zingibro, 250 gramoj da freŝa ruĝa papriko, 50 gramoj da dolĉa

ĝjang-o², pinĉaĵo da mononatria glutamato...”

“Ej, ĉi tie mononatria glutamato estas ne bezonata.”

“Sed ĉi tie estas.”

“Fi!” Okbrakulo sakris sentante ofendiĝon. Li koleriĝis de la perfideco kaj tremis per la tuta korpo, kvazaŭ li estus priverŝita per frida akvo. Dum la pli ol 300 jaroj neniu el la heredintoj kuraĝis fari ian modifon al la recepto. Li neniel povis kredi, ke Ĝjaŭ, kiu heredis la recepton nur antaŭ kelkaj monatoj, kuraĝis facilanime ŝanĝi la ingrediencojn, kaj eĉ publikigis sur ĵurnalo.

“Mi ne devis heredigi al li la recepton.”

Li fermis la okulojn, krampis la kapon per la manoj kaj deprimate falis sur ferdekseĝon.

Post tri tagoj la urbeto estis refoje skuita de novaĵo: Okbrakulo fondos alian “ortodoksan” restoracion kun la sama nomo Juci. Li jam luis la lokon kaj pretigis la elpendaĵon. Krome li afiŝis, ke li fondas novan restoracion por protekti la renomon de Juci kaj la honoron de la prapatroj. La pendigo de la elpendaĵo kaj afiŝo estis plenumita de la disĉiplo kiu legis por li ĵurnalon. Oni aŭdis, ke li forlasis la antaŭan oficon kaj venis por esti helpanto de Okbrakulo.

Ĝjaŭ Njanĝjun konsciis, kiel serioza estas la afero nur post kiam li propraokule vidis la elpendaĵon kaj afiŝon. Li tuj transdonis la poton al sia disĉiplo kaj rapidis al sia majstro. Li alparolis la majstron en plora tono:

“Majstro, mi nur celas plifamigi la pladon...”

Okbrakulo silentis kun la okuloj fermitaj. La kunlernantoj grimacis, kaj la kunlernanto, kiu pendigis la elpendaĵon kaj afiŝon, diris acide:

“Ho, ĉu vi kontentigas vin per

ŝokado al la majstro!”

“Tion mi ne intencas. Majstro, se vi nepre volas fondi manĝejon, mi volonte cedos al vi la lokon kaj iros aliloken.”

“Mi ja fondas restoracion kontraŭe al la via por konkurenco,” Okbrakulo finfine ekparolis.

“Majstro, ĉu vi ne pardonos vian disĉiplon?”

“Vi jam ne estas mia disĉiplo.”

“Se tiel,” ekploris Ĝjaŭ, “mi petas vin repreni la du trezorojn...”

“Ĉesu! Mi jam decidis konkurenci kun vi. Vi redonu ilin al mi kiam mi gajnos la konkurencon.”

“Majstro!”

“Vi foriru.”

“Majstro!”

Okbrakulo eksvingis manon kaj denove fermis la okulojn. Ĝjaŭ Njanĝjun volis ankoraŭ ion diri, sed liaj kunlernantoj tion malhelpis: “Iru pretigi vin por konkurenco kun la majstro! Ne estu hipokrita por peti pardonon!”

“Iru tuj, ne ŝoku plu la majstron.”

...

Ĝjaŭ Njanĝjun ĵaluze fortrenis sin kun larmoj.

En la sekvanta tago inaŭguriĝis la “Ortodoksa Restoracio Juci”. Refoje bolis la urbeto. Homoj senĉese venis al la restoracioj por ĝui la pladon aŭ informiĝi pli detale pri la afero.

Ĉu Okbrakulo seniliĝis kaj malmiopiĝis aŭ li ne povis precizigi la tempon por kuirado, aŭ la recepto de Ĝjaŭ pli plaĉis al la klientoj, post unu semajno pli kaj pli malmultiĝis klientoj de la “Ortodoksa Restoracio Juci”. Ĝjaŭ estis terure okupita, dum Okbrakulo devis atendi klientojn. Konsterniĝis lia helpanto, kaj de

tempo al tempo rigardis en la restoracion de Ĝjaŭ. Tio kolerigis Okbrakulon, kaj li skoldis la helpanton: “Kion vi rigardaĉas?”

La helpanto tuj retiriĝis kaj ekskuzis: “Ĉu tiuj klientoj perdis la gustosenton?”

Okbrakulo diris kun malestimo:

“Ĉu vi planas funkciigi vian restoracion nur unu aŭ du tagojn?”

Lia vorto signifis, ke li atendas la rezulton de la konkurenco.

La afero iris pli kaj pli malbone. Post pliaj dek tagoj, ĉiutage nur 3-5 homoj venis al la “Ortodoksa Restoracio Juci”. Pli ĉagrene estis, ke ili venis al la restoracio nur pro amikeco al Okbrakulo. Ili estis klientoj de Okbrakulo dum dekoj da jaroj.

Bedaŭrinde, tiuj malnovaj klientoj ne povis mildigi la ĉagrenon de Okbrakulo. Ankaŭ li estis konsternita de la situacio. Homoj senĉese iris al Ĝjaŭ, kio pikis lin. Ankaŭ lia helpanto malgajiĝis pro la depresio de la negoco. Post longa pensado li decidis venigi klientojn ekster la restoracio.

“Bonvenon al vi.”

“Dankon. Ni volas restoracion Juci.”

“Nia restoracio estas ortodoksa.”

“La nomo ne gravas. Laŭ la gusto ni decidias.”

Ili forlasis lin solan en la strato kaj gaje paŝis en la restoracion de Ĝjaŭ.

“Pum!” Subite aŭdiĝis de la strato obtuza sono. La helpanto salutanta preterirantojn turnis la rigardon kaj estis terurita: ĵus aŭdinte la diron de la preterpasantoj, Okbrakulo antaŭvidis sian fiaskon. Li iris depreni la elpendaĵon, sed pro neatento li falis svene. Falis ankaŭ la elpendaĵo teren kaj rompiĝis.



Okbrakulo grave vundiĝis. Malpli ol unu horon post sia enhospitaliĝo Okbrakulo forlasis la mondon. En agonio li volis ion diri, sed ne sukcesis.

La disĉiploj malĝojiĝis pro la forpaso de la majstro. La plej malĝoja estis Ĝjaŭ Njanĝjun. Li ploris tiel malĝoje, kvazaŭ li perdis la gepatrojn. Multaj larmis pro lia sincereco. Sed iuj el liaj kunlernantoj ĵaluzis, ke li sola heredis la trezorojn de la majstro, kaj klaĉis postdorse:

“Se li vere malĝojas, kial li ŝokis la majstron?”

Tion aŭdinte, Ĝjaŭ nenion diris. En la funebra kunveno li transdonacis la du trezorojn al la muzeo de la urbeto.

En la sekvanta tago, la funebra procesio al la tombejo estis farata. Ĝjaŭ Njanĝjun, apogate de amikoj ambaŭflanke, portis la portreton de la majstro antaŭ la brusto kaj iris kun la dorso antaŭen.

La urbanoj sciis, ke Ĝjaŭ agis en la maniero alprenenda de la filo de la mortinto. Tio estis tradicia moro de la urbeto heredata de multaj generacioj. ■

Esperantigis ŬANG CAJ

1. *Baŭzi-o — tre bongusta vaporumita ĉina manĝaĵo kun farĉo de spicitaj viando, legomoj aŭ sukero en maldika faruna tegajo.

2. *Ĝjang-o — populara ĉina spico, farita el fermentinta sojfabo kaj tritikfaruna pastaĵo kun salo.

Vojaĝo al la regionoj ĉe Hanŝuj-rivero

de CAŬ BAJLONG

Adiaŭinte la subprovincon Ĝingĝoŭ, mi venis al Ŝijan, fama aŭta urbo ĉe Hanŝuj-rivero.

Hanŝuj-rivero, la plej granda branĉo de Jangzi-rivero, pli ol 1 500 km. longa, fontas el la suda montpiedo de Ĉinling. Ĝi trafluas la Ĉinling-Daba-an montregionon, sur la Ĝjanghan-ebenaĵo. Ĝi estas ĉefa rivertrafika linio kunliganta Ŝenŝji kaj Hubej-provincojn.

“AŬTA URBO”

La urbo Ŝijan, sude de Hanŝuj-rivero, antaŭe estis izolita loko kun dekoj da familioj. Dank’ al fondiĝo de la Dua Aŭtofabriko de Ĉinio, Ŝijan jam fariĝis prospera “aŭta urbo” kun pli ol 300 000 loĝantoj kaj 200 fabrikoj.

Kiam mi eniris la “aŭtan urbon”, mi vidis, ke ĝi ne aspektas kiel granda industria urbo, ĉar la pli ol 30 fakaj fabrikoj kaj iliaj loĝkvartaloj sub la Dua Aŭto-

fabriko estas dise konstruitaj en la montvalo 30 km. longa de oriento al okcidento kaj 8 km. larĝa de sudo al nordo. La montodeklivo abundas je arboj, kiel du verdaj ŝirmiloj gardantaj ambaŭflanke de la fabrikoj kaj loĝkvartaloj.


Ĉefinĝeniero Song Jan’gŭang, kiun mi intervjuis, konigis al mi, ke la Dua Aŭtofabriko kun pli ol 60 000 oficistoj kaj laboristoj, el kiuj 5 900 estas inĝenieroj kaj teknikistoj, havas konstruan areon por fabrikoj kaj loĝkvartaloj de 3 110 000 kvadrataj metroj. Ĝi komencis sian grandskalan konstruadon en la fino de la 60-aj jaroj, nun ĝi jam havas 600 produktoliniojn, kies 98% estas projektitaj kaj faritaj de Ĉinio mem. La fabriko kun specialaj fervojaj linioj de diversaj fakaj fabrikoj, distriktaj ŝoseoj, elektraĵ kaj akvoprovizaj linioj kiel la arterio formis kompletan aŭto-produktan ĉenlaborsistemon el ĉasioj, motoroj, muntado kaj provianta servo. Nun ĝi jam

fariĝis granda fabriko kun jara produktokvanto de 100 000 kamionoj. Ĝis julio de 1987 la fabriko produktis sume 520 000 aŭtojn de 40 specoj kun la marko “Dongfeng”, kiuj konsistigis 1/6 de la nombro de aŭtoj de la lando. Ĝiaj produktaĵoj vendiĝas al pli ol dek landoj de la Sudorienta Azio kaj Afriko.

Ĉefinĝeniero Song diris al mi: “La kondiĉoj por produkti personaŭtojn en nia lando jam maturiĝis. La Dua Aŭtofabriko posedas sufiĉe fortajn teknikojn kaj ekipaĵojn por produkti personaŭtojn. Poste mi informiĝis, ke la fabriko jam estas enlistigita de la ŝtato en la ĉefajn fabrikojn de personaŭtoj.

La deketaĝa teknika centro estas la plej alta konstruaĵo en la aŭtourbo. En la moderna laboratorio de la centro mi vidis mezurinstrumentojn kaj teknikajn instalaĵojn kun nivelo de la 80-aj jaroj. Sciencistoj kaj teknikistoj de la fabriko faras sciencajn esplorojn pri novaj produktaĵoj, teknologiaj projektoj, eksperimentoj pri materialoj, teknika ekspluatado, komputilo-aplikado k.a. En la centro funkcias pli ol 900 inĝenieroj kaj altklasaj inĝenieroj. La Dua Aŭtofabriko donas grandan atenton al tekniko-ekspluatado. Ĝi ĉiujare elspezas 2-2.5% de totala enspezo por tiu laboro.

En la muntejo mi vidis pli ol 10 mil maŝinpecojn el 30 fakaj kaj pli ol 100 kompletigaj fabrikoj de la lando “moviĝantaj” laŭ surstanga trako densa kiel araneaĵo centojn da metroj longa. En du minutoj kaj duono muntiĝas unu kamiono



kun la marko "Dong-feng". Tie oni povas vidi miniaturon de Ĉinio marŝanta al moderniĝo.

UDANG-MONTO, TAOISMA SANKTEJO

Udang-monto, distanca je pli ol 30 km. de la urbo Ŝijan, estas taoisma sanktejo de Ĉinio. Ĝi ne nur estas loko pitoreska, sed ankaŭ origino de Udang-skolo, unu el la ĉinaj tradiciaj luktartaj specoj de uŝu-o.

Mi grimpis laŭ pado sur la ĉefan montpinton Ĉielsubtena Kolono, 1 612 metrojn altan super la marnivelo. Starante sur ĝia kulmino, mi vidis, ke ĉirkaŭe ondas altaj pintoj, jen klaraj jen nebulaj, Hanĝjang-rivero aspektas kiel rubando en nordo. Sur la kulmino estas konstruaĵo el orumita bronzo farita en 1416 kun alto de pli ol 5 metroj kaj larĝo de ĉ. 6 metroj. Ĝiaj orumitaj firsto, tegolaj eĝoj, kornicoj, traboj kaj kolonoj, septoj, fenestroj kaj pordoj estas ĉiuj mulditaj el bronzo imite al la civila strukturo. Tabletoj por diaj statuoj kaj ritiloj en la domo ĉiuj estas bronzaĵ. Rigardate de malproksime, ili ore brilas, kaj pro tio oni nomas ĝin "Ora Halo".

Malsuprenirinte laŭ la pado, mi atingis la templon Ziŝjaŭ, la plej grandan antikvan konstruaĵon sur Udang-monto konstruitan en 1413. Ĝi kun 860 haloj kaj pavilonoj estas grandioza.

Tiutage multaj turistoj spektis turniron pri la ĉina luktarto uŝu-o okazigitan ĉe la montpiedo, 23 teamoj kun 159 sportistoj kaj famaj luktartistoj partoprenis la konkurson aŭ faris prezentadon. Kiam mi venis la lokon, la konkurso jam atingis sian kulminon. La 22-jara knabino Ĝang Ŭejŝja, distingiga en luktarto, venkis ĉiujn rivalojn kaj gajnis oran medalon. Ŝi diris al mi, ke ŝi ŝatas ne nur la ĉinan luktarton, sed ankaŭ atletikon. Dank' al la peniga ekzercado ĉiutaga, ŝi fine atingis la nunan nivelon.



Fiŝkaptado sur Hanŝuj-rivero



Statuo de Ĝuge Ljang en lia templo

LEGENDAJ HISTORIAJ LOKOJ

Ŝjangjang, la plej granda kaj fama historia urbo ĉe la baseno de Hanŝuj-rivero, estas riĉa je

historiaj restaĵoj. La fama antikva Longĝong situas en la antaŭurbo je 10 km. de la urbo. Tie estis la loĝejo de Ĝuge Ljang (181-234), kiu poste fariĝis ĉefministro de Ŝu-regno en la periodo de Tri regnoj.

Liŭ Bej, la unua imperiestro de Ŝu-regno trifoje vojaĝis al Longĝong por viziti Ĝuge Ljang kaj peti lian helpon. En la antaŭaj du fojoj Ĝuge Ljang ne akceptis lin ion pretekstante, kaj en la tria fojo ili renkontiĝis. Ĝuge Ljang emociiĝis pro lia soifo al talenta helpanto kaj konsentis helpi lin en milita afero. Poste Ĝuge Ljang fariĝis fama ŝtatesto kaj milita strategiisto en la ĉina historio, ĝis nun bone konata de ĉiuj ĉinoj.

Longĝong situas sur iu monteto, abunda je pinoj kaj cipresoj. Tie okulfrapas ŝtona arkajo kun surskribo "Antikva Longĝong" en la supro, kaj ĉizitaj versoj ambaŭflanke pri meritoj de Ĝuge Ljang. Preterlasinte la arkajon, mi daŭrigis mian grimpadon kaj atingis Templon de Markizo Guge Ljang, konstruitan en la 17-a jarcento. (Ĝuge Ljang poste rangis kiel markizo.) En ĝi vidiĝas statuo de Ĝuge Ljang. Elirinte el la templo, mi iris laŭ pado al Sesangula Puto, kaj Trivizita Halo. El la puto Ĝuge Ljang iam ĉerpis akvon. Oni diras, ke la halo estis antaŭa loĝejo de Ĝuge Ljang, kun salono, dormoĉambro kaj legoĉambro.

La Sinjorina Urbomuro



"Sinjorina Urbomuro" estas legenda historia restaĵo en Ŝjangjang. En 378 Ŝjangjang, norde najbara al Hanŝuj, estis sieĝata de 170 000 malamikaj soldatoj. Garnizona generalo Ĝu Ŝju opiniis, ke la malamikoj ne atakos la urbon, kun dorso al la rivero, sed certe de ĝia oriento aŭ sudo, tial li dispoziciis la elitajn fortojn en oriento kaj sudo. Iutage s-ino Han, patrino de Ĝu Ŝju, suriris la urboturon por inspekti. Ŝi opiniis, ke la malamikoj jam plurfoje malsukcesis en la sturmo de oriento kaj sudo, ili certe atakos de nordokcidente. Sekve, ŝi gvidis pli ol cent virinojn kaj konstruis novan urbomuron 70 m. longan ĉe la nordokcidenta angulo de la malnova urbomuro. Poste la malamikoj vere atakis de nordokcidente kaj rompis la malnovan urbomuron. Dank' al la nova muro la malamikoj estis repuŝitaj. Poste oni nomas la novan urbomuron "Sinjorina Urbomuro" memore al s-ino Han. Sur la "urbomuro" konstruiĝis kiosko, kun statuo de s-ino Han ene. Sur la urbomuro oni povas apreci la murmure fluantan Hanŝuj-riveron.

Kontraŭ la "Sinjorina Urbomuro" trans Hanĝiang-rivero estas Mi-templo, konstruita en 1683 memore al fama kaligrafo kaj pentristo Mi Fu (1051-1107) de Song-dinastio. Meze de la templa halo pendas portreto de Mi Fu, frote kopiita de ŝtona steleo kiun li mem faris. Ambaŭflanke de la korto estas stelea galerio, kie eksponiĝas surŝtonaj kaligrafajoj de Mi Fu kaj liaj filoj kaj iuj famaj kaligrafoj. Norde de la galerio troviĝas ĉambro nomata Baŭĝin, en kiu montriĝas valoraj faksimiloj kaj famaj pentraĵoj de Mi Fu.

VILAĜO DE ANTIKVAJ MUZIKINSTRUMENTOJ

En la gubernio Sujŝjan, ne malproksima de Ŝjangjang, oni elterigis en 1978 grandan nombron da delikataj muzikinstrumentoj el tombo de la markizo Zeng Ji en la frua periodo de Militantaj Regnoj (475-221). Inter ili troviĝas tamburoj, se (korda instrumento), frapinstrumentoj, blovinstrumentoj, flaĝoletoj, bambuaj flutoj kaj bronzaĵ gamosonoriloj, kiuj similis al muzikilaro de antikva orkestro. Precipe menciinde estas ke la gamosonorilaro el 64 pecoj estas delikate projektita kaj belege muldita. Ĉe elteriĝo ili ankoraŭ bone pendis sur framo. La plej granda el ili estas pli ol unu metron alta kaj 203 kg. peza. La gamosonorilaro kaj framo el ligno kaj bronzo entute pezas pli ol 5 000 kg. La 2 800-ideograma epigrafo sur ili detale registris la tiaman muzikan teorion. Laŭ ekzameno la gamosonorilaro estis farita en 433 a.K. Per la gamosonorilaro oni povas prezenti antikvan kaj modernan muzikon eĉ hodiaŭ.


Nun sur la ruino estas konstruita ekspona halo, en kiu konserviĝas tomboj kaj ĉerkoj de parto de kunentombigitoj. La gamosonorilaro jam eksponiĝas en la Hubej-a Muzeo, en la urbo Uhan. ■



Šjangjang parko ĉe Hanŝuj-rivero

La templo Migong







La motor-farejo de la Dua Aŭtofabriko



La ĝenerala linio de aŭtomuntado

La urbo Ŝjangjang





Ziŝjaŭ-palaco en Udang-monto

Poetoj en la meza periodo de Tang-dinastio

de MEJ ĜI

En 771-835, la meza periodo de Tang-dinastio, aperis la dua kulmino de la ĉina poezio. En tiu periodo, krom la poetoj antaŭe menciitaj de la nova *jüefu*-movado, naskiĝis ankaŭ Han Ju, Liŭ Zongjüan, Meng Ĝjaŭ, Liŭ Juŝji kaj Li He. Ili havis ĉiu sian kreadon en poezio kaj originalan stilon. Tio portis novan prosperon al la poezia verkado de Tang-dinastio.

Han Ju kaj Liŭ Zongjüan estis iniciatintoj de la kampanjo de klasika prozo, famaj prozistoj kaj eminentaj poetoj.

Han Ju ne nur iniciatis la kampanjon de klasika prozo, sed ankaŭ okupiĝis pri poezia renovigo. En la poezia verkado li heredis ĉefe la liberan kaj senĝenan stilon de la granda poeto Li Baj en la prospera periodo de Tang-dinastio kaj verkis nemalmultajn originalajn eminentajn poemojn. Ekz., la poemo "Vortoj al Nepo Ŝjang ĉe Langüan Okaze de Mia Malpromociiĝo" verkita de li en indigno pro maljusta ekzilo prezentis lian kuraĝon de malkaŝa admono kaj lian melankolion en maljuneco. En la flua lingvo vidiĝis ritma harmonio. La poemo estas eminenta verko kun profunda penso. En lia alia poemo dediĉita al la samtempe malpromociita amiko Ĝang Ŝu legiĝas jenaj versoj:

*Sen repag' al la kortego kaj sen sci' kie morti,
Mi ne volas vivi ja en varma loko de sufoko.*



Li He

Tio montris, ke Han Ju ne volontis silente pasigi sian maljunecon. En sia poemo "Fruprintempe al Ĝang Ĝji" li priskribis la fruprintempan pejzaĝon en pluveto. La poemo odoris aromon de printempaj herboj:

*Pluveto lakte malsekigas stratojn de l' ĉefurbo,
En proksimeco ne videblas la herbverd' en foro.
Pli ĉarmas ja ĉi tiuj tagoj de la primavero
Ol tiuj de l' ĉefurbo plena je salikkoloro.*

En sia posta poezia verkado Han Ju strebis al ekstravaganco. Iuj liaj poemoj havas multajn strangajn vortojn. Tio perdigis al ili pozitivan signifon kaj ĉarmon kaj donis malbonan influon al la tiamaj kaj postaj poetoj.

La poemoj de Liŭ Zongjŭan, same kiel liaj prozaĵoj, estis verkitaj ĝenerale en la tempo, kiam li vivis malpromociita en la urboj Jongĝoŭ kaj Liŭĝoŭ. Ili prezentis ĉefe liajn indignon, triston kaj nostalgion. Lia fama "Poemo en la Urboturo de Liŭĝoŭ por Amikoj en Ĝangĝoŭ, Tingĝoŭ, Fengĝoŭ kaj Ljangĝoŭ" tekstas jene:

*Sur l' alta urboturo rigardante vastan la dezerton,
Ĉagrenon sentas mi senliman kiel la ĉielo.
Subita vento lotusflorojn skuas sur la akvo,
Oblikve pluvogutoj frapas muron kun hedero.
Pejzaĝojn malproksimajn baras l' arboj
sur la monto,*

*Simile al intesto kurba fluas la rivero.
Ja kune venis ni al lokoj de l' tatuaj homoj,
Sed malfacilas interŝanĝo de salutleteroj.*

La poemo estis dediĉita al liaj kvar amikoj, malpromociitaj kiel li. Ĝi ne nur montris lian nostalgian triston, sed ankaŭ prezentis lian malĝojon pri la aktualaĵoj kaj la danĝeran situacion per priskribo de pejzaĝo. Ankaŭ "Al Parencoj kaj Konatoj en la Ĉefurbo" estas poemo priskribanta lian nostalgion. Per novaj komparoj kaj imagoj la poeto montris sian fortan sopiron al la hejmloko.

Liaj pejzaĝaj poemoj montris lian senton kaj vidigis lian noblan karakteron. Lia poemo "Rivera Neĝado" havas nur kvar versojn, tamen estas fame konata kaj multe ŝatata de la popolo:

*Nenia bird' en la montar-aero,
Neniu vojiranto sur la tero.
En junkmantelo avo sur boato
Fiŝhokas sola en la neĝvetero.*

La poemo figure priskribas maljunulon, kiu sola fiŝhokas ĉe neĝa rivero. Ĝi aludas la solecon kaj fierecon de la poeto.

Ankaŭ Meng Ĝjaŭ (751-814) estis influa poeto en la meza periodo de Tang-dinastio. Liaj poemoj estis plurfoje laŭdataj de Han Ju. Ĝenerale, la poemoj de



Liŭ Juŝji

Han Ju estas imponaj, dum tiuj de Meng Ĝjaŭ profundpensaj. Iliaj poemoj estas egale bonaj, ĉiu kun siaj propraj trajtoj. Nemalmultaj poemoj de Meng Ĝjaŭ, ekz. "Frua Printempo de Ĉang'an" kaj "Sur Vojo de Ĉang'an", tuŝas la realajn kontraŭdirojn de la socio kaj mokas la diboĉan vivon de nobeloj; "Malriĉulino" kaj "Tekstistino" montris profundan simpatian al laborantaj virinoj. "Ĝemo de Popolanoj en Malvarmo" diras, ke la popolanoj preferas esti falenoj sin ĵetantaj al fajro ol suferi froston. La poemo prezentis klaran kontraston de malriĉaj popolanoj ĝemantaj en frosta nokto kaj riĉuloj en tutnokta orgio kaj vidigis la indignon de la poeto. "Printempa Plago" bildigas separatisman militon inter lokaj militaristoj, la suferantan popolon kaj la dezertigitajn kamparon kaj urbojn. En la poemo legiĝas:

*Pro printempherboj mare klaras jen la du riveroj,
Fetoras urboj pro l' jardeko de militsuferoj.
Militistaĉoj virojn buĉis kaj virinojn kaptis,
Funebro ombris ĉiujn florojn de la primavero.
Sur la senhoma stepo viglas kirloventa kreo,*

*En urb' dezerta birdoj kantas kvazaŭ trista veo.
La branĉojn ĉe la tomboj ja printempo ne ektuŝis,
Kun la printempo belulinoj pasis al perejo.*

Meng Ĝjaŭ estis fama diligenta poeto. Multaj el liaj poemoj estis verkitaj post longa cerbumado kaj ripeta polurado, ke ili sin montras enhave pli profundaj kaj sentencaj, eĉ liaj pejzaĝaj poemoj atingis neatenditan efekton, ekz. "Vespera Rigardo al Lŭoĉjaŭ-ponto" kaj "Ekskurso al Ĝongnan-monto". Meng Ĝjaŭ verkis ankaŭ iujn facile kompreneblajn poemojn vaste cirkulantajn, ekz., "Kanto de Vaganta Filo":

*Per la faden' en la patrino mano
Kudriĝis la surkorpa fila vesto.
Ĉe l' ekforir' ŝi dense dense stebis
Pro timo, ke longdaŭrus la foresto.
Kiel herbet' repagu per dankemo
La sunan varmon de l' printempa festo!*

En tiu periodo estis alia diligenta poeto Ĝja Daŭ (779-843). Lia atingo en poezio estis malpli alta ol tiu de Meng Ĝjaŭ. Li prenis poemo-verkadon kiel solan enhavon de la vivo kaj metis sian tutan energion sur rafinadon de la versoj. El liaj poemoj "Kavalireca Viro" estas relative bona:

*Jen spado post dekjara klingakrigo,
Akrecon ĝian mi neniam provis.
Kaj nun mi montras ĝin al vi, amiko.
Ĉu ie vi maljustan faron trovis?*

La poemo vivece reaperigis kavalirecan viron.

Liŭ Juŝji (772-842) kaj la granda poeto Baj Ĝjuji vivis en la sama tempo. Kiam Baj Ĝjuji okupiĝis pri verkado de novaj *jüefu*-poemoj, Liŭ Juŝji, malpromociite, loĝis en la loko, kie situas la nuna Siĉŭan-Hunan-regiono. En tiu tempo li atente lernis la lokajn popolkantojn kaj ariojn kaj verkis multajn popolkantojn, kiuj esprimis sinceran senton de la popolo kaj havis fortan lokan koloron. Lingve polurite, tiuj popolkantoj fariĝis pli belaj kaj lakonaj kaj estas la plej eminenta parto de liaj poemoj. Liŭ Juŝji verkis 11 tiajn popolkantojn, el kiuj iuj estas amoplenaj poemoj, ekz.:

*Salikoj verdverdas, rivero ebenas spegule,
Mi aŭdas kantadon de mia amat' sur rivero.
Eoste sunbrilas, ueste pluvetas murmure.
Ĉu malserenas? Sed tamen serenas en vero.*

La poeto aplikis komparan manieron ofte uzatan en popolkantoj. En la ĉina lingvo la vorto "serenas" homofonas kun "amsentas". Per tiuj vortoj la poeto bildigis la animstaton de knabino en la unua amo, aŭdinta kantadon de sia amato sur rivero, kaj prezentis ŝiajn kuraĝan strebon kaj serenajn humoron al la amo.

El liaj popolkantoj iuj priskribas morojn kaj laboradon de la popolo, ekz.:

*Surmonte abundas persikaj kaj prunaj la floroj,
Fumstrioj leviĝas de domoj de l'monta popolo.
Knabinoj malsupren aliras por preni jen akvon,
Junuloj kun ŝpato aliras al kampa laboro.*

La monto kun buntaj floroj estis vualita de nuboj, leviĝis fumo el kuirejoj de montanaj domoj, por akvo venis aroj da knabinoj kaj laboris surkampe junuloj. Jen vere rava ĝenro.

El liaj popolkantoj iuj estis lirikaj kaj indigno-esprimantaj, ekz.:

En Ĉjutang-gorĝo bruas dek du flu-malprofundajoj.

*De antikveco ili estas akvovojaj baroj.
Mi bedaŭregas ke fihomoj estas pli danĝeraj,
Ke ili ofte vin surprizas per subitaj faroj.*

Liŭ Juŝji havis plurflankajn sukcesojn en poezio. En la tempo, kiam li estis en flora aĝo, li estis malpromociita. Tio vekis ĉe li indignon, ke li ne povis kvietiĝi. Pro tio li verkis nemalmultajn satirojn. El ili la plej fama estas "Al Sinjoroj Floraprecantaj", kiun li verkis en ekskurso al Ŝjŭandu-templo:

*Sur la purpura vojo polvo al nebul' similis.
"Rigardis florojn kaj revenas,"
l' ekskursantoj diris.*

*En Ŝjŭandu-templo nun prosperas
milpersikaj arboj,
Ĉiuj plantitaj nur post kiam mi de ĝi foriris.*

La poemo estis verkita de li, post kiam li revenis al la ĉefurbo post sia dekjara malpromociiteco. En la poemo li aludis per persikaj arboj la nove leviĝintajn potenculojn. Lia senkaŝa moko ofendis la regantojn, tial li estis refoje malpromociita. Post 14 jaroj li estis revokita al la ĉefurbo, li tamen persistis ĉe sia antaŭa opinio kaj verkis alian poemon "Refoja Ekskurso al Ŝjŭandu-templo", kun pli akra moko kaj pli obstina sinteno.

Ankaŭ la antikvo-sopiraj poemoj de Liŭ Juŝji estas eminentaj. La "Kvin Poemoj pri Ĝinling" estas rigardataj kiel famaj antikvo-sopiraj verkoj. El ili "Uji-strato" priskribas la dekadencan de 200-jare prosperaj nobeloj kaj "Ŝtona Urbo" estas plena de profunda meditado pri la varia pasinteco. Lia alia poemo "Respondo al Baj Ĝjuji" ne estas antikvo-sopira verko, sed havas certan rilaton en la penso:

*En lokoj de Ba kaj Ŝu, kie regas izoleco,
Mi vivis dum dudek tri jaroj post malpromocio.
Mi sopiradis al amikoj en rezignacio,
Je la reveno mi rimarkis, ke ŝanĝiĝis ĉio.
Dronintan ŝipon preterpasas milo da velŝipoj,
Prosperas antaŭ arb' malsana ĉiaj plantspecioj.
Hodiaŭ aŭskultinte vian verkon poezian,*



Meng Ĝjaŭ

Per glas' da vino nun plenigas mi je energio.

La ĝenerala fenomeno de la naturo, ke mil velŝipoj konkuras preter dronintan ŝipon kaj diversaj arboj prosperas antaŭ malsana arbo, montris la metabolan leĝon de la universo. La poemo sentigis la vivforton de la naturo, malgraŭ siaj multaj tristaj suspiroj.

Li He (789-816) estis poeto kun apartaj atingoj en la ĉina literatura historio. Jam en sia aĝo de pli ol dek jaroj li vekis la atenton de famaj poetoj. Han Ju vizitis lin, mirigite de lia poezia talento. Li He vivis nur 27 jarojn. En la malriĉa kaj malfacila vivo li verŝis sian tutan energion sur poezian verkadon. Laŭdire, li ĉiumatene ekskursis rajdante sur-malforta ĉevalo. Kiam li elpensis bonajn versojn, li tuj notis ilin kaj metis la notojn en sian sakon. Vespere post hejmeveno, li elprenis la notojn kaj verkis poemon. Liaj poemoj estas fantaziaj, kolordensaj, ekstravagancaj kaj variaj en priskribo kaj havas romantikan stilon.

Li He vivis mallonge kaj neniam havis ŝancon por elmontri sian talenton en politiko. La konflikto inter la alta idealo kaj la reala vivo vekis ĉe li indignon kaj melankolion. Li kriis en sia poemo:

*Mi havis ja animon migran kaj nerevokeblan,
Sed je virkoka kokeriko ĉie iĝis helo.*

*Junula koro devas strebi ja al alta celo.
Ja kiu zorgus pri veanto en malluma ĉelo?*

Sed li plejofte esprimis sian fortan senton, mokante la aktualaĵon per antikvaĵo, uzante metaforajn esprimojn aŭ nerealajn iluziojn, eĉ diojn kaj diablojn, ekz. liaj poemoj “Kanto de Orkupra Feo por Adiaŭi Han-dinastion”, “Ekskurso al la Luno en Songo” kaj “Biografio de Su Ŝjaŭŝjaŭ”. La unua rakontas, ke la kupra homo ne volas forlasi la hejmlokon kaj, elurbiginte, li larmas kaŝe. La febla orkideo adiaŭas lin triste. La atmosfero estas malgaja. Ankaŭ la ĉielo maljuniĝas pro sia simpatio. La poeto ekpensis pri la senkompata realo kaj tre ĉagreniĝis pro sia malfeliĉa sorto. En la poemo “Ekskurso al la Luno en Songo” li diras:

*La Bufo kaj Leporo¹ larmis pro la nubvetero,
Oblikva lum' blankigis muron de miraĝ-kastelo.
La Jada Rado² malsekiĝis sur la rosa vojo,
Sur Pad' Osmanta³ mi renkontis nimfojn de fabelo.
La flavaj montoj, bluaj akvoj de la homa tero
Alternis rapidege kiel ĉevalkur' en vero.
La naŭ landpartoj⁴ de Ĉinio etis kiel punktoj,
La mar' similis al verŝita akvo el kulero.*

En songo li vidis sur la fora luno malgrandan homan mondon kaj la alternan ŝanĝigon de la tero kaj maro. Li estis konfuzita kaj afliktita. “Biografio de Su Ŝjaŭŝjaŭ” bildigas ekstravagancajn kaj misteran mondon de pimpaj kaj solecaj spiritoj. Ĝi estis verkita tuj sub la influo de Ĉju Jŭan, fama poeto de la Periodo de Militantaj Regnoj. Per siaj ekstravagancaj iluzioj Li He revivigis la spiriton de la fama amoristino Su Ŝjaŭŝjaŭ. Akvo kaj vento fariĝis ŝiaj vestoj kaj ornamaĵoj. La poemo, plena de fantazio, tristo kaj belo, vekis misteran kaj belan iluzion, kun forta romantika lirika gusto.

Li He verkis ankaŭ verkojn pri la reala vivo. “Kanto de Jado-kolekta Maljunulo” priskribas la mizeran sorton de jado-kolekta laboristo kaj spegulis kontraŭdirojn inter riĉuloj kaj malriĉuloj. “Laŭ Melodio ‘Janmen Tajsoŭ Ŝin’ ” bildigas streĉan atmosferon de milito, bravan martiriĝon kaj respektindan heroismon de la landlim-gardaj militistoj.

La vivsfere de Li He estis malvasta. En arto li tro strebis al ekstravagancaj esprimoj, kio mankis al iuj liaj poemoj je idealo. Sed li ĉiamaniere strebis al novaj esprimoj, ke liaj poemoj fariĝis neordinaraj. Oni povas diri, ke li estis poeto kun grava influo ne nur en la meza periodo de Tang-dinastio, sed eĉ en la poezia kaj literatura historio. ■

1. Laŭ ĉina legendo bufo kaj leporo estas bestoj vivantaj en la luno.
2. Ĉi tie la Jada Rado estas la luno kun haloo.
3. Pado Osmanta estas vojo sur la luno laŭ ĉina legendo.
4. Ĉina legendo diras, ke la antikva Ĉinio konsistas el naŭ partoj.

POEMOJ EL LA MEZA PERIODO
DE TANG-DINASTIO

HAN JU:

Vortoj al nepo Ŝjang ĉe
Langŭan okaze de mia
malpromociiĝo

*Prezentis mi admonon al la tron' en matenhoro,
vespere degradiĝis jam al okmil-lia¹ foro.
Ke lia Majesto imuniĝu tute de damaĝo,
lojale mi admonon faris malgraŭ granda aĝo.
Ĉu same hejme, kiel ĉe Ĉinling² ŝvebas nun nubaro?
Pro peza neĝo ĉe Langŭan³ jen haltas la ĉevalo.
Mi scias, ke de fore venis vi kun certa celo:
kolekti miajn ostojn ĉe l' miasm-rivero.*

LIŬ ZONGJŬAN:

Poemo al parencoj kaj amikoj
en la ĉefurbo pri mia
rigardado al montoj kun
bonzo Haŭĉu

*Ĉe l' mara bordo spade staras montoj sur la tero,
aŭtune ili pikas mian koron, sen tenero.
Se povus mi dividi min en milionajn korpojn,
rigardus la hejmlokon mi de supre en l' aero.*

MENG ĜJAŬ:

Teksistino

*Mi estas ja virino de kamparo,
vi estas same terkultura viro.
De kiam iĝis ni geedza paro,
mi laboradas por vi sur teksilo.
Forpasis jaroj, mi jam ne plu fortas,
sub la fenestro mi plu tekse sportas.
Silkaĵojn blankajn mi permane faras,
sed ĉiam ĉifonaĵojn mi surportas.
Dekreto publikigis ĉe vojrando:
Pliigu morusarbojn per ekplanto.*

LIŬ JUŜJI:

Uji-strato

*Ĉe Ĝuĉjŭe-pont⁴ mokridas floroj de sovaĝherbaro,
al Uji-strato⁵ strabas jen la vespersuno pala.
Hirundoj el palacoj de Ŭang- kaj Ŝje⁶-familioj
enflugas jen en domojn de popolo ordinara.*



LI HE:

Laŭ melodio "Janmen Tajŝou
Ŝing"

*La urbo kvazaŭ disrompiĝos sub la plumbaj nuboj,
orskvame brilas en la sun' kirasoj de la trupoj.
Purpuras sango en vespero sur la norda stepo,
l' aero plenas je signaloj el la kornaj tuboj.
Kun flagoj duone volvitaj ni al Jiŝuj⁷ venas,
pro peza prujno kaj frostego tambursonoj svenas.
Por danki altan orpremion de l' imperiestro,
mortspite per la akraj glavoj ni batali penas.*

Elĉinigus LAŬLUM

1. Unu li-o egalas al duonkilometro.
2. Ĉinling-montaro troviĝas sudokcidente de la ĉefurbo Ĉang'an, de kiu Han Ju devis veturi al Ĉaŭjang (nun Ĉaŭĝou en Ĝuangdong-provinco) pro malpromociiĝo.
3. Langŭan, pasejo en Ŝenŝji-provinco, sudokcidente de Lantjan.
4. Ĝuĉjŭe-ponto, fama ponto sur Ĉinhŭaj-rivero en Nankino. Ĝi troviĝis proksime de Uji-strato, ĉe kiu loĝis alt-ranguloj, kiaj ĉefministroj Ŭang Daŭ kaj Ŝje An en la Orienta Ĝin-dinastio.
5. Uji-strato (strato de Nigravestuloj) ricevis sian nomon pro tio, ke tie garnizonis soldatoj en nigraj vestoj de regno U en la periodo de la Tri Regnoj (220—280 p.K.).
6. Vidu noton 4-an.
7. Jiŝuj troviĝas en Jiŝjan-gubernio de Hebej-provinco.

Mondfamo el “sorgokampo”

Ĉinaj filmistoj, precipe tiuj de la juna kaj mezaĝa generacioj, de longe aspiras premiojn de monda influo.

Ili estis kuraĝigitaj kiam kelkaj “eksperimentecaj” filmoj, kia “Leŭso”, filmo pri moroj de la Leŭsa Altebenaĵo en norda Ĉinio, gajnis premiojn en nefamaj internaciaj filmofestivaloj aŭ tiuj ekskluzive por artaj filmoj. La premioj fakte signifas konfirmon pri la potencialo de ĉinaj filmoj.

Oktobre lastajare, en la 2-a Internacia Filmofestivalo de Tokio la unuan premion gajnis filmo “Malnova Puto”, kiu prezentis la malglatan vojon por fosi puton en malriĉa vilaĝo en Tajhang-montaro. Ĉina filmo unuafoje en sia historio gajnis gravan premion en grandskala internacia filmofestivalo, kie kaj okcidentaj kaj orientaj unuaklasaj

filmoj konkuris. Eble pro tio, ke la festivalo en Tokio daŭris mallonge, tiu premio ne vekis grandan resonon en kaj ekster la filmistaj rondoj. Oni nur esperis, ke la ĉifoja premio komencos vojon al pli granda sukceso.


Kvar monatojn post la premio de “Malnova Puto”, kiel atendite, “Ruĝaj Sorgoj” gajnis la premion por longaj rakontaj filmoj, premion “Ora Urso”, en la 38-a Internacia Filmofestivalo de Okcidenta Berlino. Tiu filmofestivalo ekfunkciis en 1951 kaj estas unu el la prestiĝaj internaciaj grandskalaj filmofestivaloj. En la lastaj pli ol 30 jaroj neniu azia filmisto, krom la hinda filmo-majstro Satyajit Ray, gajnis la premion “Ora Urso”. Tial la aljuĝo de ĝi por “Ruĝaj Sorgoj” nature faris sensacion en kaj ekster la filmistaj rondoj.

“Ruĝaj Sorgoj” rakontas pri la amolegendo inter kampulo kaj malriĉa junulino. La rakonto okazis en la 20-30-aj jaroj de la 20-a jc., kiam la ĉina popolo baraktis en mizero. Ili, neklerigitaj, kondukis krude, tamen instinkte aspiris al disvolvo de homa naturo, montris sin kuraĝaj en amo kaj malamo, strebis por vivo defiante morton. Kun simplaj intrigoj inter la personoj, la filmo estas saturita de riĉaj sentoj. Ĝia filozofia implicaĵo — lando al libera vivo — tute solvigis en la spektindaj scenoj.

Ĝang Jimoŭ, la reĝisoro de la filmo, estas honorata kiel talentulo en la ĉina filmista rondo. Kiel eminenta kameraisto li debutis per animskua arta figuro en “Unu kaj Ok”, filmo pri batalo de la ĉina popolo kontraŭ invadantoj. Poste la de li reĝisorita filmo “Leŭso” estis premiita kiel la plej bona filmado en la samjara “Orkoka” premio pro siaj fortimpresaj scenoj, montrantaj la belon de “vasta firmamento kaj grandioza tero”. Poste li ludis ĉefrolon en rakonta filmo “Malnova Puto”, kaj per siaj “nerimarkeblaj prezentadoj” plene reliefigis la vivkonscion kaj la latentan spiritan forton de la heroo Sun Ŭangĉjŭan, kaj pro tio li gajnis la premion por plej bona aktoro en la 2-a Internacia Filmofestivalo de Tokio. Ĉifoje li unuafoje reĝisoris filmon, en kiu li kreis originalajn, bonstilajn kaj majestajn scenoseriojn.

En la komenco de la filmo “Ruĝaj Sorgoj” la heroino per portseĝo veturas al sia edzo por geedziĝo. La sceno pri “portseĝoskuado” certe estas majstraĵo. La

Ĝang Jimoŭ



portantoj per raŭka voĉo kantas kaj paŝas stumble. La portseĝo skuigadas dekstren kaj maldekstren tiel forte, ke la novedzino larmas, kaj falas el la portseĝo tondilo, kiun ŝi portas por sin defendi en eventuala okazo. La portantoj simpatias kun la novedzino, kiu devas edziniĝi al leprulo kaj postulas, ke ŝi reciproke ilin per teneraj vortoj kaj amkantoj. Rifuzite, ili komencas molesti ŝin per skuado de la portseĝo. Tion ili tamen ĉesigas aŭdinte ŝian plorsingultadon. En silento ili rapidas antaŭen. La sceno daŭras 10 minutojn. Rigardate en la tuto, la sceno prezentas okulfrapajn bildojn per arte aranĝitaj sonoj, lumoj kaj koloroj. Kelkaj el la bildoj estas sendube hiperbolaj, sed rigardate en detaloj la sceno estas preciza reaperigo de tiama vivo de la loĝantoj. Harmonia aranĝo de la du flankoj dotis la scenon per forta estetika ĉarmo, kiu ne nur psike proksimigis la spektantojn al la sceno, sed ankaŭ kondukis ilin en mondon de vivenergio kaj spirita libero, kio donis al la tuta filmo la ĝeneralan tonon de la filozofia implicaĵo kaj estetika eco.

Post kiam la "Ruĝaj Sorgoj" estis projekciita en la Filmofestivalo de Okcidenta Berlino, la tieaj ĵurnaloj laŭdis ĝin kiel "epopeon prikantantan liberon per unikaj kaj superaj artaj ĉarmoj", opiniante, ke ĝi "per originale hiperbolaj koloroj, ritmoj, bildoaranĝo kaj muzikoj vide kaj aŭde ravis la spektantojn."

La historio de la premi-aljuĝo montris, ke la Internacia Filmofestivalo de Okcidenta Berlino ĉiam atente elektas filmojn arte eksterordinarajn. Ne mankas filmoj aŭ reĝisoroj, kies mondan famon estigis aljuĝo de tiu premio.

Nun la ĉinaj filmistaj rondoj metas grandan esperon sur Ĝang Jimoŭ. Oni opinias, ke ĉina filmo okupos sian lokon en la mondo nur tiam, kiam aperos ĉinaj majstroj eminentaj en la monda



Ĝang Jimoŭ eksplikas "Ruĝajn Sorgojn" al ĉefrolulino Gong Li.




La fama reĝisoro Ŝje Ĝin kaj juna reĝisorino diskutas pri filmarto.

filma historio. Krom Ĝang Jimoŭ, promesplenaj reĝisoroj estas ankaŭ U Tjanming, Ŝje Ĝin, Ĉen Kajge, Ding Jinnan, U Jigong k.a.

Kiel direktoro de la Ŝji'an-a Filmstudio, U Tjanming gvidis

plenumadon de nemalmultaj filmoj kun lokaj koloroj de okcidenta Ĉinio. Li reĝisoris "Rivero sen Signala Lumo", kiu priskribas amaferon inter modestaj kaj honestaj laboruloj, kaj



Reĝisoro U Jigong (dekstre) kaj malgranda aktorino Ŝen Ĝje (meze)

“Vivon”, kiu priskribas amon kaj ĉiutagan vivon de klerigitaj kamparaj gejunuloj; poste li aperigis sian majstraĵon “Malnova Puto”.

En siaj filmoj U Tjanming ofte per honesta kaj kruda stilo, profundpensaj temoj, fortimpresaj personoj kaj simplaj moroj prezentas tipajn kaj tragediajn vivscenojn sur ampleksaj tempofonoj. Se en “Rivero sen Signala Lumo” lia stilo burĝonis, “Vivo” kaj “Malnova Puto” do markis ĝian maturecon.

En ĉinaj filmistaj rondoj Ŝje Ĝin estas reĝisoro plej ŝatata de la spektantoj. Filmoj de li reĝisoritaj ĉiam kaptas la plej grandan spektantaron. En la lastaj jaroj li proponis, ke reĝisoro devas havi konscion pri “giganta filmo”. En 1986 li plenumis filmon “Urbeto Fujung”, dank’ al kiu li gajnis du gravajn enlandajn premiojn — “Orkoka premio” kaj premio “Cent Floroj”. La filmo pri malglata amohistorio de ordinara paro en ordinara ĉina urbeto spegulas la mizerojn de la ĉina popolo en la tumulta periodo antaŭ dekkelkaj jaroj. Ĝi per granda spaco montras relative plenan historion, kaj meditigas el kinarta intuicio. Tio enkorpiĝis

lian konscion pri “giganta filmo”.

El junaj reĝisoroj, Ĉen Kajge estas figuro kompare multe atentata. Kvankam la de li reĝisorita filmo “Leŭso” estas kaj laŭdata kaj mallaŭdata, ĝi tamen estas eksterlande aprobita de nemalmultaj personoj, inter kiuj veterana japana filmisto Hashimoto Shinobu diris: “Leŭso estas verko de monda nivelo. Ĉinio produktis tian verkon, ĝia kinoarto certe mirinde progresos estontece.” Nun lia antaŭdiro pruviĝis. “Knaba Reĝo”, filmo plenumita de Ĉen Kajge antaŭ nelonge, kiu priskribis urbajn gejunulojn harditajn en kampara laboro, jam estis sendita al la Internacia Filmofestivalo de Cannes, Francio.

Oni rajtas diri, ke aro da junaj kaj maljunaj talentaj reĝisoroj en Ĉinio faras ĉion eblan por ke ĉinaj filmoj akiru mondan aprobon. Trafe diris Ĝang Jimou: “Ĉinio kiel granda lando kun 5000-jara civilizacio kaj miliardo da loĝantoj devas havi sian lokon en la mondo. Ĉar ĉinaj filmoj sinteze prezentas ĉinan kulturon, mi sentas la ŝarĝon sur miaj ŝultroj tre peza. La jamaj atingoj signifas nenion. Ni devas labori bone por produkti pli da bonaj filmoj.” ■

KORESPONDI DEZIRAS

- * 16-j lernanto dez. kor. kun aliaj esperantistoj. Adr.: Mohammad Sadizadeh, Sarbaz Shahid str. End of Vahdat str. 79, In front of Cafe Amani, I.R. 51437, Tabriz, Irano.
- * 24-j. studento dez. kontaktiĝi kun junaj esperantistoj el Ĉinio kaj povas skribi Esperante kaj germane. Adr.: Piotr Cymerman, Mariandw 11, 98-105 Wodzierady, Pollando.
- * Henryk Madziar, 25-j., dez. kor. kaj interŝanĝi pm. Adr.: Kadcza 25, 33-389 Jazowsko, Pollando.
- * 14-j. lernantino dez. kor. kun gejunuloj pri turismo, muziko kaj ĉiutaga vivo, interŝanĝi pm, revuojn kaj aliajn. Adr.: Beata Kopczynska, 50-101 Wroclaw, Rynek 26 m. 1, Pollando.
- * 40-j. vidvino dez. kor. tm. pri vojaĝado kaj diversaj temoj. Adr.: Zofia Kopczynska, 50-101 Wroclaw, Rynek 26 m. 1, Pollando.
- * Szabo Tamas, 17-j., volas kor. tm., interesiĝas pri ornitologio, muziko kaj literaturo. Adr.: Str. Tihadar no. 3/12, 4150-Odorheiu Secuiesc, Rumanio.
- * 20-j. kroata junulo Branko Dolenc, Palih boraca 13, 42-320 D. Kralevec, Jugoslavio, dez. kor. kun geesperantistoj el tm pri muziko, sporto, turismo ktp., kolektas bk. pm. el tm. Bonvolu skribi, certe pondos.
- * 26-j. instruistino dez. kor. tm. pri ĉiuj temoj, interesiĝas pri muziko kaj jogo, kaj kolektas bk kaj malnovajn fotojn. Adr.: Dana Šilhankova, Nabr. L. Svobody 8, 110 00 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.
- * 18-j. lernanto dez. kor. kun knabinoj, kiuj konas ĉinajn artojn kaj historion. Adr.: Tibor Keresztesi, Budapest, Tass u. 12., 1183, Hungario.

Antikva eduk-sistemo de Ĉinio — ŝu'jŭan-o

de LAN ŜAN

Ŝu'jŭan-o estis aparta formo de eduko en la ĉina feŭda socio. Ĝi aperis en Tang-dinastio (618-907 p.K.). Komence ĝi funkciis kiel ŝtata librotenejo, libro-reviziejo aŭ privata loko por lerno kaj studo. Poste iuj el ili komencis instrui disĉiplojn. En Song-dinastio (960-1279) iom post iom formiĝis ŝu'jŭan-sistemo sub la aŭspicio de la registaro, kiu daŭris preskaŭ mil jarojn. Ŝu'jŭan-o diferencis de la ŝtata altlernejo kaj provincaj kaj guberniaj lernejoj en la organizo, administrado kaj instru-metodoj kaj havis siajn apartajn trajtojn. Ĝi donis gravan influon al la disvolviĝo de la eduko en la ĉina feŭda socio.

La fondintoj aŭ prezidantoj de ŝu'jŭan-oj ĝenerale estis famaj kleruloj. Ili estis ankaŭ ĉefaj kursogvidantoj. Ŝu'jŭan-o estis ne nur institucio eduka, sed ankaŭ loko por akademia studo kaj diskuto. Ankaŭ diversskolaj instruituloj de aliaj lokoj faris prelegojn kaj diskutadojn. Famaj

kleruloj prelegis pri aparta temo, dum la lernantoj libere aŭskultis lekciojn. Krom la propraj lernantoj de la ŝu'jŭan-o, ankaŭ alilokaj lernantoj povis aŭskulti lekciojn. Ŝu'jŭan-o havis abundon da libroj, tial ĝi ofte funkciis kiel loka kultura centro.

En Song-dinastio estis multaj famaj ŝu'jŭan-oj, el kiuj la plej famaj estis Bajludong, Jŭelu, Sujjang kaj Songjang.

Bajludong ĉe Ulaŭ-montpinto de la fama pitoreskejo Luŝan, brakumate de montoj kun rojoj, pinoj kaj bambuoj, estis templo. En la unuaj jaroj de Song-dinastio oni plikonstruis kaj faris ĝin ŝu'jŭan-o. Poste ĝia influo fariĝis pli kaj pli granda. Precipe post kiam Ĝu Ŝji, fama filozofo kaj edukisto, eksoficistiĝis kaj ekprezidis Bajludong-an Ŝu'jŭan-on, ĝi fariĝis la plej grava altlernejo en Ĉinio siatempe. Ĝu Ŝji plikonstruigis ĝin, ellaboris edukan regularon kaj persone faris lekciojn kaj respondojn pri malfacilaj pro-

blemoj. La regularo ellaborita de li mem por la ŝu'jŭan-o funkciis kiel ĝenerala regularo por ĉiuj ŝu'jŭan-oj siatempe kaj donis profundan influon al la disvolviĝo de ŝu'jŭan-oj.

Jŭelu-a Ŝu'jŭan-o sin trovis sur Jŭelu-monto apud Ĉangŝa, Hunan-provinco. En 976 oni plikonstruigis Jŭelu-an Ŝu'jŭan-on sur la bazo de privata lernejo, kiu daŭris poste 927 jarojn. En 1903 Jŭelu-a Ŝu'jŭan-o alinomiĝis kiel la Hunan-a Altlernejo, poste la Hunan-a Instruista Altlernejo, la Hunan-a Politekniko kaj en 1926 alinomiĝis kiel la Hunan-a Universitato. Jŭelu-a Ŝu'jŭan-o estis lulilo de la Hunan-a skolo. Multaj famaj kleruloj kaj reprezentantoj de diversaj skoloj faris prelegojn aŭ prezidon tie. Ĝi ĉebakis multe da famaj personuloj en la historio kaj ludadis gravan rolon en la ĉinaj akademia kaj eduka historioj. Ĝi estas mil-jara altlernejo, kia estas rare trovebla en la mondo.

La Bajludong-a Ŝu'jŭan-o



La Jŭelu-a Ŝu'jŭan-o



Sujjang-a *Ŝu'jŭan*-o estis en la nordokcidenta angulo de la gubernia urbo Ŝangĉiŭ, Henan-provinco. Origine ĝi estis loĝdomo de iu klerulo, poste oni konstruis domojn kaj komencis doni lecionojn tie. Ĝia influo pli kaj pli grandiĝis kaj estis siatempe laŭdita de la imperiestro Ĝenzong (998-1022 sur trono) de Song-dinastio.

Songjang-a *Ŝu'jŭan*-o troviĝas ĉe la piedo de Tajŝi-monto en Dengfeng-gubernio, Henan-provinco. Antaŭ ĝi preterfluis rojoj, brakume staris ambaŭ-flanke montoj. La medio estis kvietaj kaj ĉarma. En 997 p.K. oni konstruis Songjang-an *Ŝu'jŭan*-on surbaze de la antaŭa templo. La famaj filozofoj Ĉeng Ji kaj Ĉeng Haŭ iam faris instruadon ĉi tie al siaj centoj da disĉiploj, el kiuj pluraj poste famis pro siaj oficistaj sukcesoj. Nun Songjang-a *Ŝu'jŭan*-o ankoraŭ konservas multajn rarajn historiajn objektojn.

Krom la kvar supre menciitaj estis ankaŭ aliaj famaj *ŝu'jŭan*-oj en Song-dinastio kiel Ŝigu kaj Maŭŝan. *Ŝu'jŭan*-o ĝuis altan reputacion en la tiama socio, ludis grandan rolon kaj havis influon pro siaj riĉaj lerno-objektoj kaj serioza instruado. Tiam elstaraj lernantoj de registaraj lernejoj venis al *ŝu'jŭan*-o por sin

perfektigi. Estis evidente, ke ĝia reputacio superis tiun de la ŝtataj lernejoj.

De post Song-dinastio ĉiuj registaroj donis grandan atenton al *ŝu'jŭan*-oj. La registaroj aktive proponis kaj subtenis funkciigon de *ŝu'jŭan*-o unuflanke, kaj plifortigis paŝon post paŝo administradon kaj kontroladon super ĝi, ke *ŝu'jŭan*-o finfine transformiĝis en registaran lernejon. La registaroj tenis en siaj manoj ĝian gvidantecon, nomumis ĝiajn respondeculojn, kaj eĉ instruistojn. *Ŝu'jŭan*-oj perdis sian vivecon kaj tendencis al kadukiĝo.

En la periodo de la imperiestro Ĝjaĝing (1522-1566 sur trono) la malprosperaj *ŝu'jŭan*-oj reprosperiĝis. El ili la plej fama estis Donglin-a *Ŝu'jŭan*-o de la nuna Ŭŝji, Ĝjangsu-provinco, kiu adoptis la regularon de Bajludong kaj ĝin nomis "Regularo de Donglin". Ĝi dediĉis apartan atenton al kultivado de honesteco kaj mal-estimo al insidemaj altranguloj. La personoj lernintaj en Donglin-a *Ŝu'jŭan*-o kuraĝis kritiki la politikojn de la kortego kaj altrangulojn. La *ŝu'jŭan*-o fariĝis la centro de politikaj aktivadoj kaj ludis gravan rolon en la tiama socio. La Ming-registaro perceptis minacon de la *ŝu'jŭan*-oj kaj kvarfoje ordonis fermi *ŝu'jŭan*-ojn

kaj malpermesi ilian agadon en la tuta lando. Sed la *ŝu'jŭan*-sistemo jam profunde enradikiĝis en la koro de intelektuloj. Tial la kortega ordono ne nur ne funkciis, sed male akcelis ĝian disvolviĝon.

En Ĉing-dinastio (1644-1911) la registaro prenis bridan politikon kontraŭ *ŝu'jŭan*-oj por subpremi publikajn opiniojn. Sed popolanoj ŝatis *ŝu'jŭan*-ojn, kio devigis la Ĉing-registaron ŝanĝi sian sintenon de brido al aktiva funkciigo kaj samtempe plifortigi la superregadon al ĝi. Tial rapide kreskis *Ŝu'jŭan*-sistemo tiutempe, eĉ en la malproksimaj limregionoj troviĝis la establo. Sed tiaj *ŝu'jŭan*-oj fundamente estis funkciigataj de la registaro.

En la lastaj jaroj de Ĉing-dinastio tute kadukiĝis la feŭda sistemo en Ĉinio. La malnova *ŝu'jŭan*-sistemo jam ne povis akordiĝi kun la tiama socio. Pli kaj pli multiĝis la proponantoj por novtipa lernejo. En 1901 la imperiestro Ĝuangŝju donis edikton transformi *ŝu'jŭan*-ojn en novtipajn lernejojn, tiun de provinco en altlernejon, tiun de subprovinco en mezgradan lernejon kaj tiun de gubernio en elementan lernejon. Sekve la antikva *ŝu'jŭan*-sistemo de Ĉinio radikale malaperis. ■

(Daŭrigo de p.12)

konstruaĵo karakteriziĝas per evidentaj superecoj en lumigado, varmoteno, kontraŭtertreto kaj kontraŭŝtelo. La "Gubernia Kroniko de Jongding" notas, ke iutage en 1918 okazis forta tertremo daŭrinta pli ol 20 minutojn. Kaj la posttremo okazis en nokto, tamen la kasteloj restis firmaj.

En milito la kasteloj rolis kiel fortikaj fuortoj. Por manrame konstrui murojn, oni miksis en

argilon fajnan sablon, kalkon kaj iam eĉ gluecan rizaĵon kaj sukeron. Ripetada knedado kaj manramado faris la murojn senkompare fortikaj. En la kasteloj estas rezervita akvo por eventuala incendio. Ili estis facile defendeblaj kontraŭ atako. Ĉiu ĉambro de la kasteloj havas fenestron al la ekstero, oportunan por gvatado kaj pafado. Muroj de iu kastelo estas malplenaj interne, kun tuneloj larĝaj je 1.5 metroj. La tuneloj kunligas ĉiujn partojn de la kastelo. Se falos la eksteraj muroj,

la internaj samefike defendos la kastelon.

La teraj kasteloj estas alte taksataj de en- kaj eksterlandaj fakuloj. En 1985 en Pekino okazis la Internacia Kolokvo de Argila Konstruaĵo, kaj la teraj kasteloj de Fuĝjan-provinco tre interesis ĝiajn partoprenantojn. Delegito de Unesko s-ro Stivens Andre speciale iris rigardi kastelojn kaj diris kun admiro, ke la formo de la originala montvilaĝa konstruaĵo estas unika en la mondo. ■

Helluna bongusta koko

de SUN GŬOLJANG

Jam de antikve la ĉinaj pladoj estas tre ŝatataj pro siaj bela koloro, aromo, bongusto kaj riĉa nutro. Nemalmultaj famaj tradiciaj pladoj portas belan nomon, kaj pri ili cirkulas interesaj legendoj. Famaj pladoj ofte ligiĝas kun belaj legendoj, kio vekis admiron ĉe la frandemuloj. De la nuna numero ni havas apartan rubrikon por konigi al niaj legantoj famajn tradiciajn kaj facile prepareblajn pladojn.

La Red.

“Helluna bongusta koko” estis fama palaca plado aperinta en Song-dinastio (960-1279). Ĝi, belkolora kaj bongusta, estas facile preparebla. Laŭdire, ĝi estis ŝatata de Ĝaŭ Kŭangjin, la unua imperiestro de Song-dinastio. Ĝaŭ estis ŝakomaniulo en sia juneco. Ludante ŝakon, li ofte forgesis malsaton kaj dormon.

Iun tagon, li ŝakludis ĉe sia bona amiko Ĉen Ping. Ili ludis de tagmezo ĝis vespero, sed neniuj gajnis la ludon. Fine ili nevolonte paciĝis. Ĝaŭ Kŭangjin stariĝis kaj volis foriri. Ĉen Ping insistis lin regali, sed Ĝaŭ Kŭangjin ne volis, dirante: “Antaŭ ol mi venkos vin, mi ne drinkos ĉe vi.”

Eldomiĝinte, Ĝaŭ Kŭangjin levis la kapon kaj rigardis al la luno, kiu kvazaŭ granda arĝenta telero brilis sur la ĉielo kaj verŝis lumon sur la teron. Li volis hejmen iri, sed pretervole venis al rivero en meditado pri la ĵusa ŝaka manovro. Rigardante la spegule brilan riveron, Ĝaŭ Kŭangjin pensis en si: “Kial mi ne refreŝigos min en la akvo en tiel bela nokto kaj poste reiros al Ĉen Ping por daŭrigi la ŝakludon. Li tuj plongis kaj naĝis al la rivermezo. Subite lin stakis sura kramfo. En la kriza momento li vidis, ke proksimiĝas boato. Li do haste vokis por helpo. La boatisto aŭdis la vokon kaj fine savis lin.

Elsavite, Ĝaŭ Kŭangjin revenis al la hejmo de Ĉen Ping. Vidinte lin, Ĉen Ping demandis ridete: “Frato, kian novan manovron vi elpensis?” Ĝaŭ rakontis la okazintaĵon kaj ili ne povis ne teni al si la ventron de ridego. Sekve ili denove komencis ŝakludon. Ĉi-foje Ĝaŭ Kŭangjin vere venkis.

Ĉen Ping do ordonis fari festenon. Dum la drinkado, oni surtabligis pladon, similan al hela luno, molan kaj bonodoran. Ĝaŭ frandis gaje kaj demandis: “Frato, kian nomon havas ĉi tiu plado?”

“Kokaj-kuko kun tigra felo. Ĝi estas preparita de mia nova kuiristo. Pardonu, ke ĝi ne estas bone farita!”

“Kion vi diras? Ĝi estas tre bongusta! Nur la nomo iom netaŭga. Ĉu mi povus ŝanĝi ĝian nomon?”

“Certe! Dankon!”

Ĝaŭ Kŭangjin iris al fenestro kaj diris, montrante fingre la noktan ĉielon ekstere: “Rigardu! Kiel ronda, hela kaj bela estas la luno! Ni nomu la pladon ‘helluna bongusta koko’, ĉu bone?”

“Bone!” ĉiuj ĉeestantoj unuvoĉe aprobis.

Post kiam Ĝaŭ Kŭangjin



Por plibonigi “El Popola Ĉinio”

Por peti opiniojn de niaj legantoj pri nia revuo, ni dissendis enketilojn kune kun la 12-a numero. Ĝis la fino de marto revenis al ni 831 enketiloj el 38 landoj kaj regionoj. La nombro estis la plej granda dum la pasintaj 23 jaroj. Kaj ni kore dankas niajn legantojn, kiuj varme subtenas nian laboron. Sube estas la rezulto de la enketo.

1. La plej bonaj artikoloj: “La mondo bezonas Esperanton” (Ingemund Bengtsson, n-ro 5), “Internacieco de Esperanto” (Ivo Lapenna, n-ro 6), “Esperanto havas pli brilan perspektivon ol iam ajn antaŭe — Interparolo inter ĉina kultura vicministro Jing Ĵuoĉeng kaj s-ro Tibor Sekelj” (n-ro 1), “Ĉinio: Aplikado de Esperanto en scienc-teknika kampo” (Ŝen Ĉengĵu, n-ro 10),

“Brodarto” (Cang Jan, n-ro 10), “Reformado — la dua revolucio de Ĉinio” (Bi Gong, n-ro 10), “Ŝjaŭŝjaŭ” (Novelo, Ŝen Congŭen, n-roj 10 kaj 11), “Iom pri la historio de la ĉina Esperanto-movado” (Hoŭ Ĝi-ping, n-ro 7), “100 jaroj de literaturo en Esperanto” (William Auld, n-ro 4), “Lingvistikaj trajtoj de Esperanto kaj ĝia maŝin-traktado” (Li Ŭej, n-ro 12), “Progresas la reformo de ekonomia sistemo de Ĉinio” (U Pejlung, n-ro 1), “Akupunkturo kaj kaŭterizo servu al pli da suferantoj” (Da Ŭej, n-ro 12) kaj “Amo de maljunuloj” (Ĝang Ĉingĝen, n-ro 2).

2. La plej bonaj koloraj bildoserioj: “Kazaĥoj sur stepo” (Ŝen Ĉen k.a., n-ro 12), “La naturparko Ŝjiŝŭangbanna” (Liŭ

Sigong, n-ro 6) kaj “Oazo en dezerta tropika zono” (Gaŭ Mingji, n-ro 4).

3. La plej bonaj kovriloj: “Neglotusoj” (Kazaĥa ĝenro, Ŝa Gengŝi, n-ro 7), “Geamantoj sub vinberujoj” (Ujgura ĝenro, Ŝa Gengŝi, n-ro 12) kaj “Rakonto pri la lago Ĵijŭetan” (Ĝenro pri Gaŭŝan-nacieco, Ĝaŭ Ŝiŭĉing, n-ro 11).

4. La plej bonaj rubrikoj: “Ĉinaj Artoj”, “Jubilea Jaro de Esperanto” kaj “Ĉina Literaturo”.

5. Niaj legantoj proponis al ni 170 temojn pri politiko, ekonomio, kulturo, eduko, scienco kaj tekniko, higieno, fundamentaj scioj, socia vivo, Esp-movado, internaciaj rilatoj k.a., kiuj estas tre utilaj por plibonigi nian revuon.

La Red.

imperiestriĝis, li ordonis enlistigi la pladon en la palacan menuon.

* * *

Ĉefaj materialoj: kokino kun pezo de unu kg. kaj 10 kokaj femuroj.

Akcesoraĵoj: 200 g. da freŝaj senkrustigitaj salikokoj; 100 g. da graso porkaĵo; 250 g. da ovoblanko kaj 50 g. da ŝinko.

Kondimentoj: 150 g. da arakida oleo; 40 g. da amelo; 25 g. da rizvino; 10 g. da salo; 5 g. da bongustiga pulvoro (mononatria glutamato); iom da faruno kaj pistitaj ŝenoprazo kaj pipro; 15 g. da cinamo; 25 g. da blanka sukero; 40 g. da sojo; 25 g. da sezama oleo; unu peco da ŝenoprazo kaj unu peco da zingibro kaj 1 000 g. da porka graso (ĉ. 100 g. konsumota); iom da koriandro.

Preparado: I. Malfermu la

kokinan korpon ĉe ĝia dorso, elprenu la internaĵojn, lavu la kokinon, forhaku ĝiajn kapon kaj piedojn, plene kuiru ĝin, elakvigu ĝin, ŝmiru ĝin per sukero kaj fritu ĝin ĝis bruniĝo.

II. Kuiru la lavitajn kokajn femurojn, elakvigu kaj fritu ilin ĝis helflaviĝo. Eloleigu kaj metu ilin, la preparitan kokinon kaj 40 g. da sojo, 15 g. da rizvino, 15 g. da cinamo, 5 g. da salo, 3 g. da mononatria glutamato, 25 g. da sukero, iom da pistitaj ŝenoprazo kaj pipro, unu pecon da ŝenoprazo kaj unu pecon da zingibro en kaserolon kaj stufu ilin plene. Elprenu la kokinon kaj forigu ĝiajn ostojn.

III. Faru la senkrustigitajn salikokojn kaj grasan porkaĵon en farĉon, aldonu al ĝi 10 g. da rizvino, 5 g. da salo, iom da pipra pulvoro, mononatria glutamato kaj 1.5 ovojn, kirlu ilin en kaĉon.

IV. Disŝiru la kokajon en malgrandajn pecojn, metu ilin en la salikokan farĉon, kirlu ilin plene kaj metu la miksaĵon en pladon, premu ĝin rondkukforma, vaporumu ĝin dek minutojn.

V. Kirlu la ovoblankon en ovan ŝaŭmon, aldonu al ĝi iom da amelo kaj faruno kaj denove kirlu ĝis ĝi fariĝis ovoblanka kaĉo. Disŝutu farunon sur la vaporumitan kokan kukon, ŝmiru sur ĝi la preparitan ovoblankan kaĉon kaj faru sur ĝi florojn kaj herbojn el koriandro kaj ŝinkaj pecetoj. Verŝu oleon en kaserolon, duonkuiru ĝin, metu en la oleon la kokan kukon, daŭre fritu ĝin per milda fajro kaj metu ĝin en pladon. Rekuiru la kokajn femurojn por densigi la buljonon, elprenu la femurojn kaj metu ilin ĉirkaŭ la kokan kukon. Ŝutu sur la kukon la buljonon kaj sezaman oleon. Jen estas preta la plado. ■

Taj'ŭan-insulo, perlo en maro

de ŜEN AJMIN

Taj'ŭan estas la plej granda insulo de Ĉinio, kun pli ol cent insuletoj ĉirkaŭ si. Ili kovras areon de 36 000 kvadrataj kilometroj. Taj'ŭan estas altmonta insulo malofte videbla en la mondo. En ĝia mezo majestas Juŝan-montaro kun ĉefpinto 3 950 metrojn super la marnivelo. La montpinto estas la plej alta en la orienta parto de Ĉinio. Sur la insulo kuŝas kvar montaroj. Ali-montaro kaj la Lago de Suno kaj Luno estas allogaj pitoreskejoj. La originala Datun-vulkanaro, la imponaj akvofaloj kaj faŭltoj kaj la dua granda kanjono de la mondo vekas admiron ĉe vizitantoj. La multeco de grandaj akvofaloj estas unu el la karakterizaĵoj de la pejzaĝoj de Taj'ŭan. El la akvofaloj Ulaj estas la plej fama.

La norda tropiko trairas la mezon de la insulo, kaj tial la insulo troviĝas en tropika kaj subtropika

zonoj. Ĝi estas tutjare varma, sen vintro. Pro varma klimato kaj abunda akvo tie estas animaloj kaj vegetaĵoj de diversaj specioj. Tie ne mankas raraj birdoj kaj bestoj, tial ĝi estas nomata "natura botanika ĝardeno".

Tajbej estas la plej granda industria kaj komerca urbo kaj la politika kaj kultura centro de Taj'ŭan-provinco. La provinco havas kvar municipojn, t.e. Ĝijilong, Tajĝong, Tajnan kaj Gaŭŝjong, 16 guberniojn kaj tri administrajn distriktojn. Nun ĝi havas 19 000 000 loĝantojn, el kiuj 97% estas hanoj, posteuloj de elmigrintoj el la kontinento. Gaŭŝan-nacieco kun 300 000 membroj estas ĝia ĉefa nacimalplimulto kaj havas siajn proprajn lingvon, kostumon kaj vivkutimon.

La urbo Tajbej






Pagododuo en la urbo Gaŭŝjong



Ĉangĉun-templo ĉe Tajluge en malproksimo

Muzeo





Ĉiĉjan-turo de Tajnan, kie la ĉina nacia heroo Ĝeng Ĉenggong gvidis siajn trupojn en batalo kontraŭ agresantoj en 1661

Danco de amej-aj knabinoj



ĈINAJ POŝTMARKOJ

Pejzaĝoj de Taj'ŭan

de LU DONG



Taj'ŭan havas mildan klimaton kaj abundan pluvon. Ĝiaj montoj, ebenaĵoj, riveroj kaj lagoj plektiĝas en ĉarmajn tropikajn kaj subtropikajn pejzaĝojn punktitaĵojn de vidindejoj kaj historiaj restaĵoj. Ĝi estas unu el la famaj turismaj lokoj de la mondo.



La poŝtmarkoserio "Pejzaĝoj de Taj'ŭan" el ses pecoj estis emisiita de la Poŝta kaj Telekomunika Ministerio de Ĉinio en la 20-a

de oktobro 1979. La supra peco prezentas Juŝan-monton, la mezaj tri pecoj (de maldekstre) la Lagon de Suno kaj Luno, Ĉibi-turon kaj

apudmaran ŝoseon de Suhŭa, kaj la subaj du pecoj (de maldekstre) Tjanŝjang-akvofalon kaj lunan nokton de Banping-monto.

81577

